



EREVANA ŜTATA UNIVERSITATO
INSTITUTO DE ARMENSCIENCAJ
ESPLORADOJ

EDGAR HILZENRAT

LA FABELO DE
LA LASTA PENSO

ROMANO

LIBRO UNUA

EREVAN

ELDONEJO EŜU
2013

ՀՏԳ- 830-31 Հիլզենրաթ
ԳՄԳ- 84.4 Գերմ-44
Հ 585

Հայերենից էսպերանտերեն թարգմանեց **ՍՈՒՄԱՆՆԱ ԳԵՎՈՐԳՅԱՆԸ**
Մասնագիտական խմբագիր՝ **ԵՐՋԱՆԻԿ ԳԵՎՈՐԳՅԱՆ**

ՀԻԼԶԵՆՐԱԹ ԷԴԳԱՐ

ՎԵՐՋԻՆ ՄՏԶԻ ՀԵՔԻԱԹԸ: ՎԵՊ/Է. Հիլզենրաթ:
Հ 585 ԵՊՀ. – Եր.: ԵՊՀ հրատ., 2013. – 158 էջ:

Գերմանագիր հրեա Էդգար Հիլզենրաթի այս վեպը նվիրված է 1915 թ. Հայոց ցեղասպանությանը: Այն լույս է տեսել 1989 թ. և նույն տարում արժանացել «Ալֆրեդ Դյոբլին» մրցանակի:

Esperantigis: doktorino **SUSANNA GEVORGJAN**
Speciala redaktoro: profesoro **JERĜANIK GEVORGJAN**

Hilzenrat E.

La fabelo de la Lasta Penso Romano
(Edgar Hilzenrat), esperantigis S. Gevorgjan.
Eldonejo de Erevana Ŝtata Universitato.
2013j, 158 paĝoj.

Origine judo Edgar Hilzenrat estas germanskribanta verkisto. Li naskiĝis en Lejpcigo, en 1926. En 1938-a jaro li elmigriĝis el Germanio kaj, trapasinte multajn landojn en 1951 ekloĝis en Usono. En 1975 Edgar Hilzenrat revenis Germanion – Berlinon. Jam estinte aŭtoro de kelkaj romanoj, Hilzenrat en 1989 eldonis tiun ĉi romanon, dediĉitan al Armena genocido. La verko tuj meritis al premion “Alfred Djoblin”. Unu el herooj de romano Tovma Ĥatisjan – filo de ĉefa heroo, naskiĝis en 1915 dum la tagoj de Armena Granda masakro dum la deviga perforta elpelado el patrujo kaj mortis en 1988, en jaro de masakro de armenoj en azerbajĝana urbo Sumgaito. El lia lasta penso naskiĝas kruela fabelo. Pere de dialogoj inter la fabelisto kaj la heroo antaŭ ni reviviĝas teruraj eventoj de Granda masakro.

La romano estas tradukita en multnombrajn lingvojn.

ISBN 978-5-8084-1723-6

ՀՏԳ- 830-31 Հիլզենրաթ
ԳՄԳ- 84.4 Գերմ-44

© “Eldonejo de Erevana Ŝtata Universitato”, 2013
© Susanna Gevorgjan, 2013

La armena genocido kaj la romano de Edgar Hilzenrat

Kiel atestas faktoj, diference senmoralaj registantoj pli humana kaj sentema estis inteligenta Eŭropo kaj Okcidento – de Anatole France ĝis Gerard Guega, de Valerij Brjusov ĝis Osip Mandelŝtam, de Ernest Heminguej ĝis Kurt Vonegut... Ĉirkaŭ armena problemo malkonsentoj de registaroj kaj inteligencio pli emfazite elaperiĝis en Germanio. Estas ĉiukonata realeco prezentitaj servaĵoj de kajzera Germanio al junturka registaro – efektiviĝi siajn monstrajn programojn. Tamen, germana inteligencio kreis dokumentojn, publicistajn kaj belartajn verkojn, kies valoro hodiaŭ ankaŭ taksigas tro alte. Temas pri publikigaĵoj de Johan Lepsius, Paul Rohrbaĥ, Armin Vegner, kiuj fondis en Germanio esploron de armenaj amasbuĉoj kaj ekzaktan koncepton de ilia eksplikado.

En 1933 estis eldonita la romano de Franc Verfel “Kvardek tagoj de monto Musa”. En tiuj malfacilaj tagoj por nia popolo ĝi, reale, estis fenomeno.

En 1970-80-aj jaroj al ĉi tiuj inteligentularo aliĝis ankaŭ Edgar Hilzenrat. En 1989 en Munkeno estis eldonita la romano “La fabelo de la Lasta Penso”. Laŭ deveno estante judo, Hilzenrat estis devigita travivi malfeliĉojn kaj plagojn, vidi premadojn kaj terurojn. Kiel verkisto kaj kiel homo, li formiĝis en medio de naciaj persekutoj, do kun nacia emfazita memkonscio, por kio li estis ŝuldanta al precipe germanaj nazioj. Post la dua Mondmilito Hilzenrat estis la unua, kiu en literaturo prezentis la judan problemon kaj skribis ĝustecon pri sia popolo.

Kvankam la temo de romano “La fabelo de la Lasta Penso” estas Armenio kaj tragedio de armena popolo, ĉie videblas juda sentemo de la aŭtoro. 20 jarojn de sia vivo E. Hilzenrat dediĉis al internaciaj esploradoj, kaj pro tio mirigas lia nuanca kaj profunda scio pri armena popola psikologio, historio, nacia aspekto kaj samtempe scio pri turkoj, ilia neimagebla malamikeco koncerne al ĉiuj kristanoj.

Por tiu ĉi romano en 1989 la aŭtoro ricevis la honoran premion “Alfred Djoblin”. Tiamaniere okcidenta germana literatura socio esprimis konsenton kun historiaj kaj politikaj perceptoj de la aŭtoro. Skribante pri la teruraĵoj faritaj kontraŭ la armena popolo en XX jarcento, pere ĝusta elekto pri ĝenro (fabelo) kaj stilo (grotesko), verkisto sukcesas atingi novan prezenton de historia materialo.

Kelkaj vortoj pri aŭtora tasko.

Ĉefa aganta persono de la romano estas fabelisto – Meddah. Li estas nevidebla, kaj povas esti en estinteco, estanteco, estonteco kaj ĉie. Tovma Ĥatisjan – la filo de Vardan Ĥatisjan, troviaĝs en stato de klinika morto kaj ĉiujn demandojn akumulitajn dum sia tuta vivo, rimede sia “lasta penso”, direktas al la fabelisto. Meddah rakontas al li, komencante de lia nacia malproksima estinteco ĝis lia naskiĝo – en 1915, en jaro de Armena Granda masakro kaj pri vivo de lia patro – Vardan Ĥatisjan – ĉefa heroo de la romano.

La verkisto ĉimaniere kun granda sperteco solvas du taskojn el aliaj ĉefaj problemoj:

1. Tovma Ĥatisjan foriras de vivo almenaŭ ricevinte respondojn al ĉiuj siaj demandoj, malgraŭ la realeco estis tre kruela kaj terura. La realecon kun li ekkonas ankaŭ alioj.
2. Fiziologie mortanta Tovma Ĥatisjan plu nenion povas fari, ĉar li forpasas el vivo.

Tiuj demandoj kaj respondoj havos decideman praktikan signifon por vivanta kaj aganta leganto.

ANTAŬPAROLO

- Mi estas fabelisto en via kapo. Nomu min Meddah!

- Kaj vi, Tovma Ĥatisjan, nun entute estu trankvile. Tute trankvile. Ĉar tio nedaŭros longe. Ĉio baldaŭ finiĝos. Kaj poste... kiam via vivlumo grade ekfinbruliĝos ... mi rakontos al vi fabelon.

- Kian fabelon, Meddah?

- La fabelon de la Lasta Penso. Mi rakontos al vi: **Estas, ne estas, estas**¹ unu Lasta Penso. Ĝi trovas lokon en la lasta terurkrio kaj kaŝiĝas tie.

- Kial, Meddah?

- Do, kiel-kial, Tovma Ĥatisjan? Kia demando tio estas? Ĉu vi tute freneziĝis? Ja, ĝi estas tre klara. Ĝi kaŝiĝas tie, por ke per terurkrio libere elflugu... el via larĝmalfermita buŝo.

- Kien, Meddah?

- En Armenion!

- Ĉu en Armenion?

- Jes, Tovma Ĥatisjan!

- Ĉu al la lando de miaj antaŭuloj?

- Jes, tien.

- Ĉu ĝuste tien?

- Sed kien do, Tovma?

- Ĉu al la sankta tero de armenoj, kiun turkoj malsanktigis?

- Jes, ili malsanktigis, Tovma. Turkoj malsanktigis ĝin.

- Ĉu tien, kie la Kristo estis krucumita duan fojon?

- Vi diras tion, Tovma!

- Ĉu verŝajne lastfoje? Laste kaj fine.

¹ Tiel komenciĝas armenaj fabeloj (trad. S.G.)

- Tio ne estas klara.
- Diru al mi, Meddah, kiel tio okazis reale?

- Kio, Tovma?
- Kie estas armenoj de Armenio?
- Ili malaperis, Tovma.
- Sed tio ne estas ĝusta, Meddah.

- Kiel ne estas ĝusta?

- Ĉar mi scias, ke ili ankoraŭ estas tie. Iliaj mokofenditaj kadavroj profunde enteriĝis en sankta tero.

- Vi pravas, Tovma. Vere vi ne estas tiel stulta, kiel ŝajnas.

Verŝajne, vi scias multon.

- Similajn aĵojn mi sufiĉe scias, Meddah.
- Do, kial vi demandas min?
- Nu, simple, Meddah.
- Ĉu vi volas konsideri min stultulon?
- Ne, Meddah.

- Diru al mi, Meddah...

- Kion vi plie deziras?

- Kiam mia Lasta Penso elflugos al la libero, ĉu li trovos Armenion?

- Kia malsaĝa demando, Tovma Ĥatisjan. Certe li trovos!
- Ĉu vi estas konvinkita?
- Tute konvinkita!
- Vi devas diri al li: Armenio estas tie, kie sunfloroj altiĝas ĝis ĉielo.
- Ĉu ĝis ĉielo?
- Aŭ ĝis la pordo de paradizo.
- Sed ĝi estas trograndigo, Tovma Ĥatisjan.
- Ĉu vi tiel pensas?
- Certe.

- Armenio... kie akvomelonoj estas pli rondaj, pli grandaj kaj pli sukozaj, ol ie en la mondo.

- Tie estas Armenio.

- Ĉu tie, kie oni kun blghuro² miksas mielon? Kaj ĉu sukoni de maturaj morusoj oni sekigas sur tegmentoj?

- Jes, Tovma Ĥatisjan.

- Ĉu tie, kie oni laktokremon skuetas en kaprohaŭta sako, por ke fari buteron?

- Ĝuste tie.

- Aŭ ĉu en argilaj potoj, kiujn havis mia avino? Ŝi, metinte poton sur la genuoj, lulis ĝin, kiel lulis mian patron. Kaj samtempe ŝi kantadis buterkanton: **garak gŝinem**... Mi preparas buteron... Por Hakob mi preparas buteron...

- Estas tiel.

- Kie virinoj havas streĉajn mamojn, brilajn, malseketajn... kiel frumatenaj roskovritaj, freŝaj granatoj.

- Nur kiam ili estas junaĝaj kaj se ili ŝvitas.

- Jes.

- Jes, Tovma Ĥatisjan.

- Kie junaj kaj maljunaj viroj paŝadas ĉirkaŭ puto, kiam virinoj prenas akvon el ĝi. Ĉar virinoj kliniĝegas sur putbordo tiel malsupren, kiel nenie en mondo.

- Jes.

- Ĉu en Armenio...? Tie, kie montoj tuŝas nubojn. Kie fortegaj homoj jungiĝas **je kutan**, je la granda armena plugilo; tie, kie sur la zorgozaj kampoj, homoj, konkurante kun bovoj, tiras plugilon. Kie mia praaŭo draŝinte grenventadis, kaj armena vento ĝin forportadis al montoj, aŭ al maro, kie estas sebvostulaj ŝafinoj, ŝafaĵo kaj jogurto. Ĉu vi scias kio estas jogurto? Ĝin via avino nomis madzun³.

- Jes, matsun⁴.

- Diru al mi, Meddah, kiel aspektas mi?

- Vi estas tre malbela, Tovma Ĥatisjan. Neniu virino amas vin, krom via patrino. Viaj okuloj iomete strabatas, ili rigardas al planko. El via duonmalfermita buŝo fluas fiodora muko. Baldaŭ vi larĝe malfermos buŝon, por ke forlasu Lastan Penson, kiu... kiel mi jam diris al vi, kun la lasta terurkrio elflugos en aeron.

² Kuirita kaj muelita greno.

³ Armena dialekta formo de vorto matsun.

⁴ Armena literatura formo de tiu ĉi vorto.

- Kaj ĉu miaj manoj? Diru al mi, Meddah. Kio okazis kun miaj manoj?

- Ili jam ne ŝvitas. Signifas – ili estas mortintaj.

- Kaj ĉu miaj piedoj?

- Ankaŭ.

- Malgraŭ, vi tute ne estas maljuna, Tovma Ĥatisjan – naskita en 1915jaro. Vi estas 73 jaraĝa. Nerespektema junulo, kiu tutforte devas urini kontraŭ vento. Kio okazis kun vi?

- Mi ne scias, Meddah.

- Tute aliaj estis viaj antaŭuloj, Tovma Ĥatisjan. Precipe unu el ili – via prapraavo, estis konstruita el alia materialo. Lia aĝo superis centjaron.

- Jes, Meddah.

- Tamen, ĝi estas tiel, Tovma Ĥatisjan. Tiuj armenoj de Armenio atingas tro aĝan maljunecon dank'al riĉa seksvivo kaj abunda jogurto, kiun ili nomigas **matsun**, kaj trinkas po tutaj bareloj.

- Jes, Meddah.

- Ili mortas junaĝaj, nur kiam turkoj aŭ kurdoj tranĉas iliajn kapojn.

- Jes, Meddah.

- Aŭ oni mortigas ilin alimaniere, ekzemple, per kurba glavo.

- Jes, Meddah.

- Aŭskultu min, Tovma Ĥatisjan. Precipe unu via gentulo – praavo de via avo, estis konstruita el alia materialo. Li en naŭdeksepjara aĝo aferon de viroj ĉiutage faradis dufoje: unue – antaŭ dormo, due – frumatene.

- Kiel, Meddah?

- Jen kiel. Antaŭ dormo li faris tion kun praavino de via avo, ĉar li estis saĝa, kiel ĉiuj armenoj, tion scias ĉiuj, ili estas pli saĝaj ol judoj kaj grekoj.

La praavo de via avo diris al si mem: se mi ne farus tion kun ŝi, matene ŝi anstataŭ mielo miksos bovsterkon kun mia blghuro. Kaj bone, mi ne danĝeros min, malgraŭ mia gastro estas en bonstato, kaj mi povas furzi kiel sepdektriaĝa malrespektema junulo.

- Ĉu ĝuste tiel?

- Ĝuste tiel.

- Kaj ĉu frumatene?

- Kiam praavino de via avo dume dormis, li sekrete iris brutstalon kaj tie faris tion kun juna kurdino. Ŝi estis malgranda kaj similis kolombeton. Ĝuste tiel, Tovma Ĥatisjan. Estis bravulo via praavo. Sed unufoje kurdineto ne volis cedi kaj obstine staris ĉe muro de brutstalo.

- Kaj kio okazis poste?

- Via gentulo kun erektita membro furioze atakis ŝin. Sed la diabetino rapide forsaltis. Kaj via gentulo membromezurano truen faris en muro. Tia viro estis li!

- Ĉu la brutstalmuro estis ligna?

- Ne. Argilo kaj seka sterko, kiun tiulandaj homoj nomas **tecek**.

- Aŭskultu min, Meddah. Pli bone ankoraŭ diru al mi, kiel mi aspektas?

- Sed mi jam diris. Vi aspektas tiel, kiel iu, kiun nur lia patrino povas ami. Ĉar nur al patrino povus ŝajni bela anĝelete tia eluzita saketo, kia vi estas. Via patrino ne vidos viajn elturmentitajn okulojn, ne sentos fiordon de via abomena muko. Ĉu vi sentas Tovma Ĥatisjan, ke via patrino estas ĉe vi? Ŝi karesas viajn manojn, palpas vian malbelan kalvaĵon kaj kisas viajn duonmortintajn okulojn.

- Kie estas mia patrino?

- Ree foriris ŝi, Tovma Ĥatisjan.

- Diru al mi, Meddah, kiel mi naskiĝis, ĉar mi neniam konis mian patronon?

- Vin naskis Armenio, Tovma Ĥatisjan. Kaj vento, blovanta de Kurdistanaj montoj. La polvo naskis vin. Kaj tiama varmega suno survoje.

- Sekve, ĉu mi ne havis patronon?

- Neniam vi havis.

- Kaj ĉu tio estas ĝusta?

- Jes, estas ĝusta.

- Kaj tamen ne povas esti tiel, Tovma Ĥatisjan. Ĉar eĉ nia savanto Jesuo Kristo naskiĝis de virino. Ĉu vi pensas, ke Dia spirito ombris sunon, aŭ malfortigis montventon de Kurdistano, aŭ forigis vojpolvon de tiama Armenio?

- Ne, Meddah.

- Do, ĉu vi konvinkiĝis, Tovma Ĥatisjan? Vin naskis virino. Sed vi neniam havis patriron, almenaŭ ne havis patriron, kiu kantis por vi lulkanton, trankviligis vin, aŭ dormigante lulis vin.

- Sed iu trankviligis min.

- Certe, iu trankviligis vin. Sed tiu ne estis via propra patrino.

- Kiu ŝi estis?

- Iu turkino. Ŝi trovis vin tiam. Sur vojo. Kaj kunportis vin. Ŝi trankviligis vin. Kaj lulinte dormigis vin. Kaj kantis multegajn lulkantojn por vi.

- Ĉu armenlingvaj lulkantojn?

- Ne. Turke.

- Ĉu ili estas tiel teneraj, kiel armenlingvaj?

- Jes, estas tiel teneraj.

- Mi imagas jenon, Tovma Ĥatisjan. Tio estas, mi imagas, ke vi, Tovma Ĥatisjan, naskiĝis tra la Kajzera genocido.

- Kiajn absurdaĵojn diras vi, Meddah! Do, kiu devis fari la Kajzeran genocidon sur la fivojo?

- La turko, Tovma Ĥatisjan. Ili estas specialistoj de tio. Do, mi imagas: estas aŭgusto de 1915. Estis varmega tago. Malsataj, turmentitaj miloj da armenoj sub viprapoj de turkaj policianoj, ŝancelinte iradas direkte Mezopotamio, dume tra la Armena montplato, tra la piedoj de Kurdistanaj montoj. Inter ili estas via patrino. Jes, via patrino. Ŝi estas gravedulino. En la naŭa monato. Ĝuste tiatempe ekkomenciĝas ŝiaj naskdoloroj. Estis meztago.

- Daŭrigu, Meddah, daŭrigu.

- Mi precize ne scias, kiom da armenoj estis sur vojo en tiu tago, sed kelkaj miloj ĝuste estis. Ili tutsemajne jam estis sur vojo, ĉar zaptiĥoj (tiel nomiĝas turkaj policianoj) intence pelante alkondukis ilin

el diversaj provincoj. Ili, tiuj armenoj, venadis el Erzrumo, kaj Muŝo, Merzivano kaj Ĥarputo, el grandaj kaj malgrandaj urboj, vilaĝoj kaj urbetoj. Cent miloj estis tiuj, kiujn turkoj forpelis el liaj domoj, eĉ eble milionoj. Sed eble ili ĉi tie ne estis tiel multe. Ĵus kion mi diris al vi? Ĉu kelkaj miloj? Ĉar mi rakontas al vi nur pri unu vojo.

- Diru al mi, fabelisto, diru, Meddah! Ĉu eblas, ke ĉiminite vi vidas mian patron?

- Ne, Tovma Ĥatisjan. Via patro ne estis en ĉi tiu vicgrupo, ĉar zaptiĥoj dispafis ĉiujn armenajn virojn jam sur duonvojo, ĉiujn, kiujn povis stari sur siaj piedoj, kiuj dume ne estis maljunaj, aŭ dume havis dentoj en siaj buŝoj.

- Do, ĉu ili pafis mian patron?

- Ne, Tovma Ĥatisjan. Via patro estis escepto.

- Do, kial li estis escepto?

- Pri tio mi rakontos poste.

- Ĉu poste?

- Jes, poste.

Tie estis via patrino. Ŝi estis pli altstatura ol granda parto de aliaj virinoj en vicgrupo.

- Ĉu ŝi havis belan vizaĝon?

- Ŝi havis nenian vizaĝon. Ŝi havis nur okulojn.

- Kiajn okulojn?

- Okulojn, kiujn havas gravedaj virinoj. Grandajn okulojn havis ŝi, okulojn respegulantajn, tiun, kiun portis sub sia brusto, ĉar en centro de tiu okulspegulo sidis ankoraŭ ne naskiĝinta eta Tovma Ĥatisjan, kaj palpebrumis.

- Ĉu tio estis delonge?

- Jes, estis delonge.

- Estis meztago, Tovma Ĥatisjan... Tra la okuloj de via patrino vi vidis longan vicon de virinoj, infanoj, maljunuloj, kaj demandis mem sin: "Kien iras tiuj strangaj homoj? Kial brilas suno, se neniu ridas? Kial estas tiom varmege? Kaj kial ĉiuj estas nudpiedaj? Kial nenie estas akvo, kaj kial zaptiĥoj batadas, sed neniu iel defendiĝas? Ĉu ili

ne paŝas sufiĉe rapide? Kaj kial ili devas pli rapide paŝi, se vagadas en sama provinco? Kaj kial nun mia patrino haltis? Kaj kial ŝi subite genuis? Atenton, patrino! Sin gardu, ĉar vi povas perdi min!”

Kiam via patrino sentis, ke genuoj senfortiĝas kaj kriante ektorniĝis tien kaj reen kaj kiam subite konsciis, ke devas naski sur vojo, per lasta forto deŝiris larĝan, longan pantalonon, kuŝis sur dorso en polvo de vojo, malfermis piedojn kaj etendis al ĉielo kaj suno.

- Jes, estis tiel, - diris fabelisto. - Gardistgrupo furiozis, ĉar via patrino haltigis tutan vicgrupon. Kaj unu el zaptiĥoj, direktante kapon de sia ĉevalo, kuregis tien, kien en polvo, kun etendaj piedoj kuŝis via patrino. Li eliris el ingo glavon kaj saltis de ĉevalo.

- Ĉu zaptiĥo tranĉis la kapon de mia patrino?

- Ne, Tovma Ĥatisjan... Pli ofte zaptiĥoj tranĉadas kapojn de armenaj viroj, sed ili plezure per glavoj disŝiras ventrojn, precipe de gravedulinoj. Verŝajne, tio ilin amuzas. Jen tiel, Tovma Ĥatisjan. Sed ŝi havis feliĉon, zaptiĥo nur glavpinton metis sur ŝia nuda ventro, kaj ĉar li sin montris pli furioza, ol estis, nur grate vundetis. Do, rigardu ĉi tien.

- Ĉu mi rigardu ĉi tien?

- Jam tie estis vi, Tovma Ĥatisjan, kaj vi glitis el ventro de via patrino. Kiam zaptiĥo per sia glavo, ŝerce tranĉis vian umbilikan ŝnuron, vi ekkomencis krii, kiel la plej unua koko, kreita de Dio, por ke kriinte salutu unuan tagon, starinte sur la plej unua balaajamaso. Kiam zaptiĥo rigardis, ridis kaj eningis glavon, ĉar ne estis tre malbonkora, kiel multegoj servantaj por ŝtato, kiuj humile faras sian devon.

- Sed tio povis esti alimaniere, - diris fabelisto, - povas esti, ke via patrino eltenis sunan, varmegan tagon – ne naskis vin tiam. Kaj nur vespere, kiam vicgrupo haltis, ĉar zaptiĥoj ankaŭ laciĝis kaj ĉevaloj kapricis. Zaptiĥoj ordonis al kaptitoj dissidiĝi, ĉar ili volis nutri siajn ĉevalojn.

- En tiu lando, - diris fabelisto, - frue mallumiĝas, ĉar montaj viglaj kurdoj ĉiuvespere per ŝnuregoj mallevigas la sunon, ĉar timas, ke diablokultantoj, plenintaj ĉi tiun landparton, povas forŝteli ĝin. Nokte kurdoj kaŝas la sunon en granda tendo, ankaŭ plektita de la nigraj

kaproharoj kaj denove ellasas, kiam montaglo vekigis sonigante unuan krion, eĥo de kiu sonoras tra la malproksimaj montoj de la Armenia lando, aŭskultata ankaŭ malalte – en ravinoj, paŝtejoj. Do, tiel, frue mallumis, - daŭrigis fabelisto, - via patrino kun aliaj kuŝis dormi. Ĉiuj kuŝis en polvo de vojo. Iuj vere dormis, alioj nur rigidite kuŝis. Iuj silentis, alioj suferĝemis pro soifo. Kiam obskuro densiĝis, komenciĝis naskdoloroj de via patrino.

- Ĉu sekve mi naskiĝis nokte, kiam kurdoj kaŝis la sunon en granda tendoo?

- Ĝuste tiel estis, Tovma Ĥatisjan. Kiam via patrino sentis, kiel vi malrapide malaperis de siaj okulspguloj, ĝuste malantaŭiĝis al sia interno, kiel memstara vivulo elĵetiĝi al libera mondo, leviĝis kaj genuis sur unu el kavoj.

- Sekve, ĉu ŝi min naskis kaŭre?

- En tiu lando multoj naskas kaŭre.

- Kiel tio okazas, Meddah?

- Ili simple forpuŝas siajn bebojn.

- Kaj kiel tio estis en mia okazo?

- Ĝuste tiel okazis, Tovma Ĥatisjan. Via patrino forpuŝis vin, kiel dum procezo de fekado. Kion fari? Subite meznokte vi falis en vojkavon, kiel krianta balaajo. Zaptihoj nenion ekvidis, ĉar en vicgrupo multaj virinoj havis infanojn, kiantajn kiel vi. Frumatene, kiam kurdoj ellasis la sunon, kaj frumatena nebulo el montaj ravinoj rampis al vojo, mizera amaso daŭrigis sian vojon. Vi simple estis forlasita survoje.

- Kial mia patrino ne kunportis min?

- Tion mi ne scias. Verŝajne, ŝi opiniis, ke la forlasita vojo estis sola saveco por vi. Kaj tio ĝuste tiel estis, Tovma Ĥatisjan. Ĉar pli malfrue – tage, paŝis tra tiu vojo la Sankta Virgulino Maria. Ŝi venis en aspekto de mohametana turkino, akompanita kun sia edzo, kiu tie nomiĝis Jusuf. Kaj Maria tuj ekkonis vin, kaj Jusuf ankaŭ konis vin kaj Jusuf diris al sia edzino:

- Rigardu, tiu estas la plej potenca atestanto en mondo kaj ankaŭ la plej malsaĝa, ĉar eĥ ne scias, kion li vidis.

- Tute egale scias li, aŭ ne, - diris Maria, - estas grava nur tio, ke iutage li atestos : “Ne ĉiuj estas malbonaj”.

Maria ridetis, malsupreniĝis de azeno kaj ĉirkaŭprenis vin. Poste en sia lito ŝi permesis, ke turko Jusuf karesu kaj lulinte dormigu vin.

Nun estas tuta silento en mia kapo, kaj mi pensis: kio estos – tio estos. Mi pensis pri la Lasta Penso, kiu baldaŭ flugos al lando de miaj antaŭuloj, serĉi ilin ĉiujn, kiujn neniam mi konis. Sed mi eraris. Ĉar pri io mi ankaŭ pensis. Tio estis penso, ke mi devus ridi kaj ĝemi.

- Ĝi estis via lasta, - diris Meddah.

- Ĉu ĝenerale?

- Ankoraŭ ne tute, - diris Meddah.

- Verŝajne, ankoraŭ unufoje mi ĝemos, - diris mi.

- Eble, - diris Meddah.

Kaj Meddah demandis:

- Sed kial ĵus vi ridis, Tovma Ĥatisjan?

- Ĉar antaŭ unu sekundo mi parolis kun turka ĉefministro.

- Ĉu li ion diris?

- Jes.

- Finfine mi kaptis lin – turkan ĉefministron. Lia voĉo sonis minace en telefono. Li simple demandis:

- Kiu kuraĝas telefoni ĉi tien?!

Kaj mi, sidinte ĉe la sendanĝera fino de telefondrato, diris:

- Mi kuraĝas.

- Sed kiu Vi estas?

- Mi estas Via armena psikiatro.

- Kaj kion Vi volas de mi?

- Tute nenion.

- Tio signifas, ĉu mi ion volas de Vi?

- Ĝuste tiel!

- Do, morgaŭ mi venos Vian akceptejon.

- Estu trankvile.

Mi donis al li mian adreson. Li venis ĝustatempe.

- Mi sonĝas koŝmarajn sonĝojn, - diris li.

- Ĉiuj turkoj sonĝas koŝmarajn sonĝojn, - diris mi.
- Sed kial?
- Pro armenoj.
- Do, ĉu pro armenoj?
- Jes.
- Sed kio okazis kun armenoj?
- Ilin ekstermis turkoj.
- Tie mi havas nenian aferon. Kaj neniu havas ian aferon. Kaj neniu hodiaŭa turko.
- Tion mi ankaŭ ne insistas.

- Vere tio okazis tre delonge. En 1915 jaro. Dum unua mondmilito. Neniigis tuta popolo.

- Ĉu simple neniigis?
- Simple neniigis.
- Jam mi aŭdis ion pri tio, - diris turka ĉefministro, - sed mi ĉiam opiniis, ke tiuj estas elpensitaj mensogaj fabeloj de niaj malamikoj.
- Tio ne estas fabelo.
- Ĉu estas genocido?
- Ĝuste tiel.
- Ĉu paroksismo de spontana furiozo de turkpopolo?
- Ne.
- Do, ĉu tio ne supreniĝis de malsupro?
- Tio venis de supro. Ĉio okazis laŭ ordono de tiama turka registaro. Ĉio estis absolute organizita. Kaj rilatas al la tiama programita unua genocido de 20-a jarcento.
- Mi pensis, ke tion inventis germananoj.
- Tion ne ili inventis.
- Sekve ĉu ni – turkoj, estis iliaj instruintaj majstroj?
- Estas tiel.

- Sed pri tio nenio estas en niaj historiaj libroj, - diris turka ĉefministro.

- Mi scias, - diris mi.
- Ĉu pro preterlasoj?

- Pro historiaj preterlasoj, - diris mi.

- Kaj ĉu tio estas la kaŭzo, ke mi travivas tiajn terurojn? - diris turka ĉefministro.- Mi sonĝas koŝmarojn nur pri tiaj preterlasoj kaj incidentoj.

- Sidiĝu, - diris mi.

- Sed, kie?

- Ie en mia akceptejo.

- Sed tio ne estas akceptejo, tio estas libro de turka historio.

- Tio ne havas signifecon.

- Ĉu vere, mi devos sidiĝi?

- Jes.

- Ĉu aŭ mi kuŝu?

- Kiel vi volas.

- Pli bone estos, se Vi sidiĝu sur seĝeto.

- Sed mi nenie vidas seĝeton.

- Do, Vi sidiĝu sur mia kanapo. Vi ankaŭ povas kuŝi.

- Sed mi ne vidas kanapon.

- Sekve, Vi sidiĝu, mi pensas, sur planko.

Turka ĉefministro kapjesis. Li nur diris:

- Sed mi plankon ankaŭ ne vidas.

Kaj poste li ekkriis.

- Neniu povas aŭdi vin, Tovma Ĥatisjan, - diris la fabelisto, - ĉar via parolo estas muta. Sed mi aŭskultis vin.

- Ĉu ankaŭ Vi aŭdis krion lian - de turka ĉefministro? kiam li ruliĝis en plankan malplendon.

- Tion ankaŭ mi aŭdis.

- Mi refoje renkontis turkan ĉefministron, - diris mi al fabelisto.

- Kiam?

- Antaŭ kelkaj sekundoj.

- Kaj kie?

- En la granda kunsida halo de Unueco de Konscienco de nacioj. Tio estis dum jam kutimfarita kongreso.

Li sidis apud la reprezentanto de registaro, sole kaj senrigardeble. Kiel poste mi eksciis, li pli ne estis ĉefministro, sed arkivestro de Unueco de Konscienco de nacioj. Tuj vidinte min, li ekstaris kaj malsupreniris al arkivo. Mi sekvis lin.

- Mi serĉas armenajn ratifikaĵojn, - diris mi. - Temas pri forgesita raporto de genocido.

- Ĉu pri forgesita genocido?

- Jes.

- Kaj kiam tio estis farita?

- En 1915 jaro.

- Jam multe da tempo trapasis. Nun estas 1988-a.

- Jes, - diris mi.

- Ja vi vidis, - diris li!

Poste li min alkondukis ĉe ŝranko de ratifikaĵoj. Kaj diris:

- Nia ŝranko de ratifikaĵoj ne havas pardonon. Tiuj estas malfermitaj librobretroj, atingeblaj por ĉiuj, ĉar ĉi tie ni ne havas ian sekreton.

- Do, montru al mi, kie mi povos trovi armenan ratifikaĵon?

- Bedaŭrinde, Vi ne sukcesos, - diris li, - ĉar tiel malnova ratifikaĵo, kiel estas armena ratifikaĵo, jam delonge estas polvokovrita, kaj tiel polvokovrita, ke iĝis netroveblan.

- Do, alvoku Vi purigistinojn kaj ordonu purigi tion de polvo.

- Mi antaŭlonge faris tion, - diris arkivestro, sed tio ne estas simpla afero.

- Kial?

- Ĉar ĉiuj purigistinoj de Unueco de Konscienco de nacioj estas astmulinoj kaj ne volas purigi malnovajn ratifikaĵojn de polvo, precipe tian malnovan, kia estas forgesita ratifikaĵo de genocido. Tio devenigos polvoŝtormon kaj stimulos tuson.

Mi diris:

- Mi povos kompreni.

- La forgesecon oni ne devas senpolvigi,- diris arkivestro. - Tio estas tre danĝera.

Kaj post tiu frazo li malaperis.

Poste mi supreniris grandan halon de kunsidoj. Sidante en socio, mi multfoje indignis, volante interrompi turkan oratoron, sed servistoj pri disciplino forigis min el halo.

Unu foje mi sukcesis ree penetri halon. Mi staris apud ĉefsekretario kaj faris flaman paroladon. Mi rakontis pri mia popolo, kiun turkoj neniigis kaj ĉiuj reprezentantoj de nacioj iomtempe aŭskultis min. Sed baldaŭ ili komencis enui, kaj unu post unu forlasis halon. En fino mi restis absolute sole.

Tiutempe envenis purigistino. Ŝi ĝuste estis astmatulino, kiu tusante diris al mi:

- Kion Vi faris ĉi tie?

- Mi atendis Vin.

- Ĉu min?

- Jes, Vin.

- Ĉu Vi estas unu el diplomatoj, kiuj flirtas kun purigistinoj?

- Ne.

- Do, kion Vi volas de mi?

Mi diris:

- Mi volas, ke Vi senpolvu memoron.

Ŝi nur ridis.

Dume purigistino per broso purigis plankon, mi rakontis al ŝi mian historion, ĉar pensis, ke purigistinoj estas babilemaj, kaj mian historion ili rakontos en la fojeroj kaj koridoroj de Unueco de Konscienco de nacioj, kaj tiel tutaj reprezentantoj de nacioj scios pri tio, sed purigistino tute ne aŭskultis min. Purigante plankon, ŝi daŭre montris al mi sian postaĵon kaj poste foriris el granda halo de kunsidoj.

Nun mi ree estis sole. Iomete hezitinte, mi vagabondis preter la tabloj de apartaj nacioj, legis nacitabulojn kaj finfine haltis antaŭ loko

de la ĉefsekretario. Mi trapaŝis malantaŭon de katedro kaj sin turnis al malplena halo.

Mi rakontis al silento genocidan historion. Mi centrigis la atenton de silento al tio, ke kiel grave estas, kiam malkaŝe paroliĝas pri tio: ĉiu devas scii tion. Do, kiel en estonto oni devos bari genocidon, kiam ĉiu insistas, ke nenion sciis kaj nenion baris, ĉar ion similan eĉ ne povis imagi.. Mi parolis longe kaj cirkonstace. Mi ne celis ion por mia popolo, postulis nenian punon por persekutantoj. Mi diris:

- Mi nur volas fiaskigi silenton.

Nur pli malfrue mi komencis paroli pri mi. Mi rakontis por malplena halo la historion pri mi kaj mia familio. Mi parolis pri mia patro kaj patrino, avo-avino, pri antaŭavoj, pri onklo-onkloj. Mi parolis pri tiuj, kiujn neniam konis, parolis dum tiom da tempo, ĝis konsumite haltis, malfermis miajn okulojn kaj apogis mian kapon sur miaj manoj.

Kiam mi malfermis miajn okulojn, ĉe mi staris la ĉefsekretario. Li diris:

- Vi ne vidis min, sed mi tuttempe staris ĉe Vi.

- Tiele, ĉu Vi ĉion aŭskultis?

- Mi ĉion aŭskultis.

- Ĉu Vi rakontos por aliaj homoj?

- Ne, - respondis ĉefsekretario. - Mi tion por aliaj homoj ne rakontos.

Poste ni kune fumis cigaredon. La ĉefsekretario diris:

- La historio de Via familio ŝajnis precipe intermiksita kaj mi pensas: kiel Vi vivis antaŭ Granda Masakro kaj poste kiel Vi eksterniĝis.

Mi kapijesis kaj nenion diris.

- Sed estas strange, - diris la ĉefsekretario, - ke Vi, sinjoro Ĥatisjan, tiel detale memoras ĉion. Se mi ne eraras, Vi neniun konis de Via familio, eĉ vian propran patrinon. Ĉar kiam Vi naskiĝis, sinjoro Ĥatisjan, en 1915, ili ĉiuj aŭ estis mortintaj, aŭ senspure malaperitaj.

- Mia patrino estis kun mi.
- De kie Vi scias tion?
- Mi ne scias tion, sinjoro ĉefsekretario, tamen mi tre ĝuste scias tion.

- Ĵus nun Vi rakontis al malplena halo, ke tiam du turkoj trovis Vin sur vojo.

- Jes, sinjoro ĉefsekretario. Viro kaj virino.

- Kaj poste, Vi tiel rakontis, ili fordonis Vin al orfejo: multaj similaj estis en tiu tempo.

- Jes.

- Post Granda milito baldaŭ venis du sinjorinoj de "Ruĝa kruco" kaj portis Vin Svislandon. Tion ankaŭ Vi ĵus rakontis.

- Ĝuste, sinjoro ĉefsekretario.

- Tie Vi restis, kaj hodiaŭ Vi estas civitano de Svislando.

- Jes.

- Do, Vi estas svislandano.

- Ne, sinjoro ĉefsekretario, mi estas armeno. Armeno kun svislanda pasporto.

- Sed Via familio, sinoro Ĥatisjan... Vi neniam konis Vian familion. Kaj neniun konis Vi. Eĉ Vi ne scias familnomon de Via familio.

- Estas ĝuste.

- Iutage Vi prenis familnomon Ĥatisjan, ĉar Vi opiniis, ke iel devis esti nomigita Via familio.

- Jes, sinjoro ĉefsekretario. La familnomo Ĥatisjan estas ofte renkontanta armena familnomo.

La ĉefsekretario ridetis. Li diris:

- Vi eĉ ne scias, de kie devenas Via familio, eĉ nek nomon de Via urbo aŭ vilaĝo. Vi nenion scias pri tio. Nenion!

- Vidu, sinjoro ĉefsekretario, - diris mi, - kiam mi estis 13-jara, mi komencis mian esploradon. Kaj dum 60 jaroj daŭre faris nenion, krom la esploradon.

- Kaj ĉu Vi trovis ian spuron?

- Mi trovis multajn spurojn, sed ĉiuj tiuj kondukis al necerteco.
- Do, ĉio estas ĝuste. Vi ne scias, kiu Vi estas.
- Ne, - diris mi. - Mi scias, kiu estas mi.

Dum sesdek jaroj mi senĉese petadis rakonti savitulojn de masakro rakontaĵojn pri Armenio, kiu ankaŭ nomiĝas Turkarmenio aŭ Anatolio, kiel Vi volas, kaj poste el multegaj rakontaĵoj, kiel decas, mi kreis mian propran rakonton. Kaj tiel mi iutage havis ĝustan familian historion. Mi konis miajn radikojn. Denove havis patron, patrinojn, ankaŭ multegajn geparencojn. Havis ankaŭ tradician familnomon, kiun mi povis multigi rime de miaj gefiloj kaj genepoj. Sed, sinjoro ĉefsekretario, ĉi tiu rakonto iomete estas intermiksita en mia kapo. Sed, baldaŭ ĝi havos sian formon, estos tiom ĝuste, kiom estas ĉiuj ĝustaj rakontoj.

- Kaj kiam tio estos?

- Ege baldaŭ.

- La lasta klareco ĉiam venas malfrue, - diris ĉefsekretario kaj preskaŭ ŝerce tuj aldonis. - Ĝi ofte venas kun Lasta Penso.

- Tamen tio ne estas ekstreme malfrue - diris mi. Poste daŭrigis, - kun Lasta Penso ĉio klariĝas. Kaj mi jam vidas: La Lasta Penso ordonos ĥaoson en mia kapo. Kaj la konfirmata ordo en mia kapo, tenere lulante forportos min el vivo. Oni diras pri mi: "Rigardu, tiu homo mortis kiel arbo. La arbo povas perdi foliojn, sed neniam siajn radikojn. Kaj kial ĉe homoj devos esti alimaniere?".

Kaj ree mi kuŝas sur mia mortlito. Kaj en mia kapo Meddah diras:

- Vi estas perfekta atendeco, Tovma Ĥatisjan. Vi atendas vian Lastan Penson, kiel fianĉino atendas sian fianĉon, kiu venas al ŝi montri siajn proprajn radikojn. Kaj mi avertas vin, Tovma Ĥatisjan, la Lasta Penso estas tre mallongtempa.

- Ĉu ne eblas longigi tiun tempon?

- Ne, Tovma Ĥatisjan.

Kaj Meddah diris:

- Tamen mi jam povas rakonti pri via Lasta Penso, kiu sidas en via terurkrio kaj plenita kun atendo devos flugi al via patro, patrino kaj

ĉiuj aliaj geparencoj, kiujn vi neniam konis. Mi ankaŭ jam povas informi vin sekreton, ke via Lasta terurkrio reŝanĝiĝos al alio.

- Kion vi konsideras?
- Tion, ke reŝanĝiĝos al ĝoja atendkrio.
- Sekve, ĉu mi mortos sen teruro?
- Vi ne mortos en sendifineco.
- Ĉu?
- Jes!

Kaj mi diris al Meddah en mia kapo:

- Rakontu al mi pri mia Lasta Penso, por ke vi plenu la momenton de atendeco kaj longigu tion, kio estas pli mallonga, ol sekundo kaj devas bruli en mia kapo. Ja vi promesis al mi tion.

- Mi nur unu fabelon promesis al vi.
- Ĉu fabelon de la Lasta Penso?
- La fabelon de la Lasta Penso.

Kaj Meddah diris:

- Unufoje mi ĉirkaŭprenis vian praavon. Tio estis sur bazarplaco de turka granda urbo Bekiro. Mi turklingve rakontis por li fabelon kaj diris: bir vermiŝ, bir jokmuŝ, bir vermiŝ... Estas, ne estas, estas... Ĝuste tiel komenciĝas ĉiuj fabeloj en tiu lando kaj kial devos alimaniere komenciĝi tiu fabelo, kiun mi rakontos por vi?

Do, aŭskultu min, Tovma Ĥatisjan. Mi diras al vi: bir vermiŝ, bir jokmuŝ, bir vermiŝ... Estas, ne estas, estas...

LIBRO UNUA

1.

Estas, ne estas, estas unu Lasta Penso. La Penso povis flugi tra la tempo al ĉiuj direktoj, ankaŭ al estonteco kaj al estinteco, ĉar li estis senmorta.

Kiam la Lasta Penso kun lasta krio de atendo forflugis el larĝmalfermita buŝo de mortanto, li diris al si: “Ĝis flugo al estonteco vi devos fari mallongan vojaĝon al Bekiro – al granda turkurbo, kie vin atendas viaj gepatroj”. Kaj tio okazis tiel.

La Lasta Penso faris reeflugon tra la tempo kaj malsupreniĝis sur unu printempa milita tago de la 1915, sur kupolo de pordego, nomita Beatecpordego – Bab-i-Se’ adet, en urba orientparto. Tio estis miljara fera forĝa pordego, metita en miljarajn ŝtonojn de urbfortikaĵo de Bekiro.

Neniu vidis malsupreniĝon de la Lasta Penso sur kupolo de urba pordego, ĉar ĝi estis nek videbla, nek audebla. Pro tio li senĝeme, kuraĝe sin turnis al fabelisto:

- Kie vi estas, Meddah?

- Ĉe vi, - diris fabelisto.

- Sed mi estas senkorpa.

- Tio ne gravas.

- Kie vi sidas?

- Mi sidas en vi. Kaj vi estas patro de Tovma Ĥatisjan, kiu ĵus estis ĉi tie, por ke lastfoje elspiru.

- Kiom da tempo necesas por lasta elspiro?

- Pli malmulte ol sekundparto.

- Ne estas multe.

- Ne estas multe, ĝuste. Sed ankaŭ estas ne ĝuste. Ĉar eble eterno estas pli malmulte ol unu parto de sekundo. Simple ĝi devas mezuriĝi alimaniere.

- Diru al mi, Meddah, kie mi estas?

- Vi sidas sur Bab-i-Se'adet, t.e. sur la Beatecordego. Se vi rigardas al sud-oriento, vi rigardas al Mekko, loko, kien almenaŭ, unu foje en sia vivo devos iri ĉiuj mohametanoj, ĉar ĉi tie vivis kaj laboris la profeto. Ĉi tie estas ankaŭ sakramenta Ka'abo.

- Ĉu Ka'abo? Kaj ĉu Mekko? Ĉu Beatecordego? En tiu kazo mi ne komprenas... Kial precize sub pordego estas pendumitaj tri armenoj? Iliaj buŝoj estas larĝmalfermitaj, ŝajnas la lasta terurkrio ankoraŭ restis inter iliaj dentoj. Ili estas pendumitaj per longa ŝnurego, malforte balanciĝas pro vespera vento kaj fikse rigardadas antaŭen.

- Ili estas ŝtataj perfiduloj.

- Kaj ĉu tio estas ĝusta?

- Tion insistas turkoj.

- Ĉu mia patro estas unu el tri mortintaj armenoj?

- Ne. Li ne estas inter ili.

- Ĉu nun vi min alkondukas ĉe mia patro kaj patrino?

- Ankoraŭ ne, - diris Meddah, - iomete atendu vi.

- Viaj sonĝoj daŭre rakontas al vi, ke Bekiro estas la sama bela urbo de mondo, - diris Meddah. - Turkoj nomigas ĝin urbo de mil kaj unu moskeoj. Somere mil kaj unu cikonoj sidadas sur orkovritaj kupoloj. Aŭrore, kiam suno liberiĝas de kaprohara ŝnurego de kurdoj, kaj prepariĝas forigi noktajn lastajn spurojn kun flamaj radietoj el ĉirkaŭaĵo, kiam la unua birdeto provas siajn voĉkordojn, cikonoj, sidantaj sur la kupoloj de moskeoj, banigas siajn blankajn flugilojn en frumatenaj radioj, per longaj bekoj klakadas kaj alvokas muedzinojn-preĝalvokistojn ĉi tien, por ke ili sur minaretoj krii al la ĉielo siajn **Allahu-Akbar**.

- Sed mi vidas nenian ciknonon.

- Ili ankoraŭ estas en Mekko kaj revenos nur kiam tagoj varmiĝos.

- Mi ankaŭ ne vidas multajn moskeojn. Ĉu vi diris mil kaj unu?

- Mil kaj unu.

- Sed mi vidas nur dekunu. Mi ĵus kalkulis tiujn. En Bekiro estas dekunu moskeoj.

- Tio okazas pro tio, ke turkoj ŝatas troigi ĝuste kiel hebreoj kaj grekoj, satanistoj kaj ciganoj kaj ĝenerale ĉiuj en ĉi tiu landparto.

Reale ĉi tie ekzistas nur dekunu moskeoj. Vi pravas. Mi ankaŭ kalkulis. Ok moskeoj troviĝas en turka kvartalo, du – en kurda kaj unu – en armena mahalo (kvartalego – S.G.), kvankam tio havas nenian ligan kun armenoj.

- Kial, Meddah?

- Ĉar la armenoj estas kristanoj. Ja vi – Tovma Ĥatisjan tion scias. Kaj vi certe vidis armenajn preĝejojn.

- Mi tiuj ankoraŭ ne vidis.

- Do ĉirkaŭrigardu, Tovma Ĥatisjan. Ĉirkaŭrigardu! Ĉie vi vidos preĝejojn kaj plej multe en armena mahalo. Sed tiuj ne estas okulfrapaj, mia filo.

- Kial vi min nomas Tovma Ĥatisjan?

- Ĉar vi anstataŭigas lin.

- Kaj kial vi nomas min, **mia filo**?

- Tio nenion signifas. Mi povas nomi vin **ŝafideto mia** aŭ **malgranda paŝao**. Mi povas nomi vin multmaniere, malgraŭ vi havas veran nomon.

- Kiu estas tiu nomo?

- Tovma Ĥatisjan.

- Baldaŭ la suno malaperiĝos, ĉar la kurdoj mallevigis vesperon kaj ektenis sian ŝnuregon, plektitan kun kaproharo. Ĉu necesas rakonti al vi ĉion, kutime plenumitan vespere en Bekiro.

- Jes, Meddah. Nun rakontu mallonge, ĉar mi deziras iri al mia patro, al mia patrino.

Kaj Meddah diris:

- Ĉimomente kvar sinjoroj sidas en oficejo de Bekira poliestro – mjudio, troviĝanta sur supra etaĝo de firmkonstruita registara domo – Hjukjumeto. La domo sur strato “**Rju Hoĝa Paŝa**”, kiel ĝin nomas imponaj, france parolantaj turkoj, kvankam ĝin simple nomiĝas **Haĝa Paŝa Sokakh**. Unu el sinjoroj portas brunan uniformon kaj felan ĉapelon sur kapo, tio estas unuokula mjudio – ĉefpolicisto de urbo Bekiro. Aliaj portas civitanajn vestojn kaj havas nur ruĝajn fesojn⁵ sur kapoj. Du el ili

⁵ Turka ĉapelo.

– kajmakamo (guberniestro) kaj mutesarifo (regiona estro) estas altgradaj servistoj en turka registara malsimpla gradsystemo. Al ili subordiniĝas apartaj regionoj kaj provincoj, (sanĝakoj kaj kazahoj) – administraciaj partoj de bekira vilajeto⁶. La kvara sinjoro estis mem valio – la estro de tuta Bekira vilajeto, vilajeto, tiom granda, kiom estas Vana aŭ Erzuruma vilajetoj. La sinjoroj sidas sur multkosta tapiŝo kaj sub ĉiu po unu kuseno, plenita de ansera lanugo kaj manbrodita per diverskoloraj fadenoj. Sidinte faldpiede, ili trinkas dolĉan kafon en etaj kupraj tasoj kaj fumas siajn pipojn.

- Morgaŭ, antaŭ aŭroro mi ordonos fortranĉi kapon de tiu Vardan Ĥatisjan, - ĵus diris la mjudio. -Kaj lian kapon propramane surpaliĝigos kaj ĝin starigos sur fortikaĵa murzono.

- Sur kia parto?- demandis la mutesarifo.

- Ĉe Beatepordego, - diris la mjudio, - maldekstren kaj malsupren kompare de kapoj de tiuj tri armenoj, kiujn mi hieraŭ ordonis pendumi. La mjudio ridis kaj sian senespriman rigardon de vitra okulo, direktis al du sinjoroj.

- Anstataŭ vi, mi tion ne farus, - nun ekparolis la dikkorpa valio kaj mane faris laciĝan movon. - Ĉar tiu Vardan Ĥatisjan ankoraŭ havas multon diri.

- La valio pravos,- diris la mutesarifo, - vivanta Vardan Ĥatisjan ankoraŭ povas diri multon, sed mortinto ankoraŭ nenion povas diri.

La valio ree mane fariĝis laciĝan movon. Li diris:

- Efendioj, mi foje provis eltiri konfeson de mortinto, sed li estis tiom muta, kiom fiŝo de Vana lago. Mi – valio de Bekiro, neniel povas ricevi ion de ili.

Nun la sinjoroj silentis, brutrinkis dolĉan kafon kaj fumis siajn pipojn. Ili ne povis scii, ke tra dorso de la Lasta Penso de Tovma Ĥatisjan trapasis tremeto, malgraŭ li kiel senkorpa estaĵo, realan dorson ne havis, sed aŭskultante ilian paroladon, timegis kaj nun demandis:

- Meddah, pri kiu estas parolo ĉi tie?

- Pri via patro estas, ŝafideto mia. Pri via patro estas.

⁶ Turka gubernio.

- Kie estas mia patro?
- En karcerio estas.
- Ĉu en karcerio?
- En karcerio.
- Kiam vi alkondukos min ĉe li?
- Baldaŭ, ŝafideto mia. Baldaŭ.
- Ĉu ili fortranĉos lian kapon?
- Baldaŭ tio klariĝos.

Do, nun aŭskultu, ŝafideto mia, - diris fabelisto, - dume tiuj kvar sinjoroj en registarejo klarigas fatalon de via patro, en multaj domoj de Bekiro eklumos unuaj kerosinlampoj.

En bazaroj komercantoj ĉesigas komercon kaj siajn varojn ŝarĝas sur ĉaretoj kun azenoj kaj aliaj junganimaloj, multoj enigis varojn en farunaj sakegoj, ili mem alportas hejmen aŭ donas al **hamal**, penante tiri, por kio donas al ili unu-du kompatindajn paraojn⁷. Bekiraj hamaloj estas pli mallaboremaj ŝarĝportistoj en tuta Turkio, eĉ pli mallaborema, ol hamaloj de Konstantinopolo, kaj ĉu vi scias kial? Mi diros al vi, ŝafideto mia, ĉar ili grandparte estas kurdoj. Kurdoj estas aŭ fieraj kaj liberaj kaj vivas sur altegaj montoj en tendoj, faritaj el nigraj kaproharoj, bredante ŝafojn aŭ rimede rabo, ankaŭ posedas armilon kaj ĉevalon, aŭ rezignas de fiereco kaj libereco kaj samtempe de digneco kaj iĝas hamalon en Bekiro. Tiel estas: tiuj kurdoj, ŝarĝportistoj de Bekiro, kun siaj subordigoj staras sube de azeno.

- Kial vi rakontas al mi tion, Meddah?

- Por ke akriĝu mian lingvon ĝis ekkomencos pli multe rakonti pri via patro, kiu atendas vin, nesciante tion, kaj kiun vi baldaŭ ekvidos.

- Kiam?
- Baldaŭ.

- Do, vi tute ne kontraŭas, ke mi vin nomiĝas Tovma, - diris fabelisto al la Lasta Penso. - Aŭ ŝafideto mia, aŭ filo mia, aŭ alimaniere.

⁷ Turka monero.

- Ne, - diris la Lasta Penso. - Nomigu min kiel vi volas, grave estas tio, ke vi alkondukos min ĉe mia patro.

- Ĉu vi ne volas vidi vian patrinon ankaŭ?

- Certe, - diris la Lasta Penso. - Ŝin – precipe. Sed mi opinias, ĉimomente estas pli grave, ke mi iru al patro, ĉar kontrokaze turkoj verŝajne fortranĉos lian kapon, ĝis mi vidos lin.

- En tio vi estas absolute prava, - diris Meddah. - Sed antaŭe rigardu ĉirkaŭaĵon.

- Tion mi jam faris, - diris la Lasta Penso.

- Kaj kion vi vidas?

- Mi vidas ĉiujn turkojn en Granda bazaro, kiuj nun finis siajn komercojn.

- Ili ne estas turkoj, - diris Meddah, - ili estas armenaj komercistoj, almenaŭ multoj el ili. Jam estas centjaroj, ke ili vivas kun turkoj en la sama lando kaj sufiĉe estas malfacile laŭ ekstero diversi ilin de turkoj. Vi vidas, granda parto de viroj portas ruĝajn fesojn, kaj iliaj longaj kaj larĝaj pantalonoj ŝnurigitaj malsupre al piedoj. Iliaj vestoj sub suprenvestaĵoj estas samaj, kiajn vestas turkoj. Multoj fiere paŝas havante eŭrovestaĵojn, ĝuste tiel, kiel nova idaro de junturkoj, sed ili ankaŭ portas felan ĉapelon aŭ feson. Iliaj krispaj lipharoj sugestas timon en virinoj kaj ne estas malpli dece ol de turkoj aŭ montaj kurdoj. Ili fumas la samajn cigaredojn kaj pipojn, kion, ekzemple, fumas ankaŭ la valio de Bekiro kaj la mutesarifo kaj la mjudio, aŭ fumas nargilon – kun zigzagtuba akvopipo, por kio bezonas tempon kaj nerapidecon. Kaj se vi demandus armenon, ke kian tobakon li enigis sian pipon, li memkompreneble dirus: “Persan tobakon **Abu Rija**”, kiu estas antaŭulo de bonodoro, kaj tiel ankaŭ respondos turko.

Meddah diris:

- Ŝafideto mia, ĉiuj tiuj estas eksteraĵoj. Se vi volas scii, kiu estas armeno, rigardu liajn okulojn.

- Baldaŭ bazaro kvietiĝos kiel mortinto, - diris Meddah, - kaj nur akvovendistoj kun siaj kaprohaŭtaj akvujoj kuros post komercistoj, reventantaj hejmen, por ke ankoraŭ kelkfoje krii: **Lii su, soghuk su, buz gibi, on phara** – bonan akvon, malvarman akvon, glacisimilan

akvon, 10 parao. La akvovendistoj estas la plej lastaj en bazaro, ĉar ili gvidiĝas laŭ la vortoj de profeto, de tiu profeto, kiu diris: “Ĉiu hastemeco venas de diablo”.

- Jes, ŝafideto mia. Ĉiu hastemeco venas de diablo, kaj en nia lando hastas nur surdomutoj, se vespere iras al moskeo senvorte prononci namaz-preĝon, ĉar ili ne aŭdis alvokon de muedzinoj, kiujn tutgorĝe kriegadas el balkonoj de minaretoj.

- Kie preĝadas surdomutoj, Meddah?

- Ĉie, kie preĝadas ĉiuj aliaj mohametanoj, - diris Meddah, - multoj verŝajne en moskeo de **Hirika Ŝerif Ĝami** – de Sakramenta palto, troviĝanta en turka kvartalo, de **Kurusebil Sokhakh** – de Seka akveja interstrata moskeo, aŭ iras de **Deli-Avreth-Ĝami** – moskeo de Stultulino, kiu troviĝas en kurda kvartalo. Mi ne scias tion, ŝafideto mia, sed mi supozas, ke granda parto de surdomutoj iras moskeon de miraklofaranta kuracisto de Mahometo phaŝa – **Ĝerah Muhammed Phaŝa Ĝami**.

- Mi bedaŭras, ke hodiaŭ matene vi ne ĉeestis, - diris Meddah. - Ĉar tiatempe tra la Armena kvartalo pasis novaj rekrutoj. Ili iris el kazerno, trapaŝis sub janiĉera muziko preter de **Bith Bazar**, tio estas bazaro de homlaŭsoj kaj malnovŝtofoj, turniĝis al Divan Joli, strato de urbestrejo, poste kunpaŝante pasis tra la kvartalo armenaj metiuloj, tra la stratoj de potistoj kaj juveliroj, eĉ trapasis preter urbaĝioj – de armenaj tajloroj de Bekiro, ĉe kiuj ankoraŭ via praavo por si mendis unu **pamukhlu** – veston el propra lano, kiu poste, kiel heredaĵo atingis vian avon kaj poste – vian patron. Nu divenu, kien iras novrekrutoj.

- De kie mi sciu, Meddah?

- Ili iras al Thoph Kapi – Pordego de Kanono, kiu troviĝas el Okcidenta parto de urbo. Kaj kiu trapasas tion pordon, iras rekte Erzrumon.

- Kio estas en Erzrumo?

- Turkoj tie koncentras sian trian armejon.

- Kial, Meddah?

- Por ke haltigi aktivegan marŝ-proceŝion de rusoj, ŝafideto mia. Ĉar ili rekte ruliĝas tra la Kaŭkazo, kaj jam estas sur vojo al Konstantinopolo.

- Tutmatene regimentoj iris tra la Bekiro, - diris Meddah, - grandparte estis **redifoj** – rezervistoj de unua kategorio, ankaŭ **mustahfistoj** – rezervistoj de dua kaj lasta kategorioj. Inter ili mi vidis ankaŭ invalidojn kaj diversajn kriptulojn. Kaj vi volas kreu, volas ne kreu: poste mustahfistoj iris kiantaj virinoj, poste ili – **rufaji** – sektantaj derviŝoj, kiuj subite aperigis tie kaj kriadis: **Ja Ghazi, Ja Ŝeid, Ja Allah, Ja Hu** – ho batalanto, ho martiro, ho Alaho, ho li. Kaj sur balkono de Hjukjumeto staris la valio kaj la mutesarifo, la kajmakamo kaj la unuokula mjudio, kiuj, sendube, krucosignus siajn visaĝojn, se estus kristanoj.

- Sed nun la mjudio ne staras sur balkono, kaj nek la valio, nek la mutesarifo, nek la kajmakamo. Ĉar poste, ankaŭ kiel antaŭ tio, ili, sidante en oficejo de la mjudio, konsiliĝis pri via patro.

- Ĉu difino estas akceptita?

- Ankoraŭ ne, ŝafideto mia, ankoraŭ ne. Ĉar la sinjoroj pli malfrue havis unu vizitanton – kun majora grado germanan oficiron, unu el instrukcistoj de turka armeo. Nun ili ĉiuj sidas sur multkosta tapiŝo, po unu kuseno sub ĉiu, trinkas kafon kaj fumas pipon.

- Ĉimatene, - diras germane majoro, - kiam mi kun miaj homoj rajdante eniris urbon, ekvidis tri armenojn ĉe Beatecpordego, pendumitajn per longa ŝnurego.

- Ili estis ŝtataj perfiduloj, - diris la valio.

- Ĉiuj armenoj estas ŝtataj perfiduloj, - diris la mjudio. - kaj ĝustedirante, ilin ĉiujn necesas pendumi.

- Kiom da armenoj estas en ĉi tiu regiono? - demandas la majoro.

- Kvin milionoj, - diras la valio.

- Ne povas esti, - diras la majoro, - ĉar laŭ statistiko en tuta Turkio de tia neordinara popolo vivas 1,2 miliono da homoj.

- Tio estas statistiko de Sultano Abdul Hamid, - diras la valio, - kiun junturkoj delonge fortronis.

- Ĉu tio signifas, ke Abdul Hamid volis malmultigi loĝantaron minoritatoj?

- Ĝuste tiel, binbaŝi bejo, - diras la valio.

- Tiuj armenoj estas danĝera popolo, - diras la valio, kaj ili vivas sur du flankoj de limo. Kvar milionoj sur nia flanko kaj unu miliono ĉe rusoj.

- Sed tio estas tre troigita, - diras la majoro.

- Ne, binbaŝi bejo, - diras la valio, - ili povas esti pli multe, ĉar ĉi tiu popolo multiĝas kiel ratoj. - La valio ridetas kaj brutrinkas dolĉan kafon.

- Kaj ĉiuj estas parencoj.

- Kiel Vi komprenas tion?

- Nu, kiel mi devas kompreni, binbaŝi bejo? **Nun – kiel ĉiam.** Turkaj armenoj havas onklojn kaj onklojn sur alia flanko de limo. Luj havas gefilojn ĉe ni, gepatrojn, geavojn kaj diversajn parencojn. Ĉiuj estas geparencoj.

- Kaj se ili eĉ ne estas parencoj, - nun diras la mjudio, - (mi konsideras oficiale), tute egale estas parencoj, ĉar ili estas la sama neordinara raso, kiu dum miljaroj daŭrigante konservis sian honestgentecon. Ili ĉiuj havas la saman sangon.

- Tio estas malbona sango, - diras la valio, - kaj venas de diablo.

- Kaj ĉiuj armenoj interkonsentiĝis, - diras la mjudio, - vivantaj sur du flankoj de limo. Kaj ĉiuj havas interrilatojn kun rusoj.

- Ĉu tio povas signifi, - diras la majoro, - ke armenoj ĉi tie – en turka flanko, atendas eniron de rusoj Turkion. Aŭ eĉ povas subteni ilin?

- Vi ĝuste divenis, binbaŝi bejo, - diras la valio. Turkaj armenoj atendas siajn parencojn, kiuj batalas por rusa caro. Kaj eniro de rusoj Turklandon trovas plenan subtenon ĉi tie.

- Ĉu Vi havas certantajn pruvojn por tio?

- Ni absolute ne havas bezonon de tio, - diras valio. - Sufiĉas, ke ni scias tion.

- Estas danĝera situacio, - diras la majoro.

- Kaj tio – apud fronto, - diras la mjudio. - Kun turkaj pasportoj milionoj da armenoj estas en nia malfronto, milionoj, pri kiuj ni scias, ke ili havas interrilatojn kun nia malamiko.

- Estas tre danĝera situacio, - diras la majoro.

- Vi komprenas, binbaŝi bejo, - nun diras la mutesarifo, - ke kial, punante tiujn tri armenojn per pendigiloj – ni devas kiel ekzemplon al aliuloj.

- Mi povas kompreni, - diras la majoro.
- Kaj Beatecpordego estas la plej ĝusta loko.
- Jes, - diras la majoro.
- Tiujn tri armenojn ni pendumis tiel, ke ili ne rigardas al Mekko.
- Kaj kien rigardas ili? - demandas la majoro.
- Al erara direkto, - diras la mjudio.

- Ĉe unu el pendumitaj armenoj ni trovis unu botelon da rusa brando, - diras la mjudio. - Tio estas serioza krimo, ĉar Rusio estas malamika teritorio.

- Tiun brandon li kvazaŭ ricevis de sia bofrato, - diras la mutesarifo, - kiu havas branduzinon tie – en erara flanko.

- Tiun brandon li kvazaŭ havas ankoraŭ de pacaj tempoj, - diras la mjudio, - sed ne sukcesis provi.

- Kaj kio estas krimo de aliaj du armenoj? - demandas la majoro.

- Ĉe dua troviĝis letero, - diras mjudio. - Letero el Rusio, de ilia avino.

- Ĉu interkomunikiĝo kun malamiko?

- Ĝuste tiel, binbaŝi bejo.

- Kaj kiel atingis la letero Turkion?

- Nu, binbaŝi bejo. La letero pere de poŝto atingis.

- Sekve, ĉu antaŭ milito?

- Nature, ankoraŭ ĝis milito.

- Ĉu estas la dato kaj sigelo sur koverto?

- Ne, nek sigelo estas sur koverto, nek dato.

- Sekve, koverto mankas, - diras la mjudio, - ĉar poŝtisto malfermis leteron kaj forĵetis koverton.

- Kaj kial li faris tion?

- Ĉar armeno ŝuldis lin trinkmonon, kaj poŝtisto volis teni leteron, ĝis ricevu trinkmonon.

- Ĉu **baĥŝis**⁸?

⁸ Donacmono.

- Certe, baĥŝiŝo. Kutiman trinkmonon. Do kiel alimaniere? Tiuj poŝtistoj estas tre malmultpagitaj oficistoj – koruptintaj kaj atendantaj trinkmonon. Kia utilo, ke ni – junturkoj, depost ŝanĝo de dominado ĉiumaniere provis ĉion – likvidi koruptecon, se tiu poŝtisto ankoraŭ vivas kun spirito de fortfaligita Abdul Hamid kaj novan moralon ne povas percepti.

- Estas ĝuste, - diras la valio.

- Vidu, binbaŝi bejo, - nun parolas la kajmakamo, - la poŝtisto dujare konservis leteron ĉe si kaj nur pasintsabate aldonis al li. Kaj kiam ni trovis tiun senkovertan leteron, do nature ni pensis, ke tio povas esti kontrabana letero. Aliel kion ni povis pensi? Ĉar dum la milito nenio laŭleĝa poŝto de tiu flanko venas. Kaj, ke la letero estis skribita dum paca tempo, ni ne povis scii.

- Sed la poŝtisto ĉu ne donis ian depozicion?

- Kiel ne, binbaŝi bejo. Tamen li donis depozicion, kiam la armeno jam balanciĝas antaŭ la pordego. Antaŭ Beatecpordego. Kaj li rigardis al erara direkto. T.e., ne al Mekko.

- Aha, sekve tiel estis, - diras la majoro.

- Tiel, binbaŝi bejo, - diras la kajmakamo. - Atestanto estas Alaho.

- Kaj kia estas la afero koncerne tria ŝtata perfidulo?

- Li estis armena pastro, - nun diras la mjudio. - Ni lin kaptis dum la prediko.

- Ĉu Vi certe spionon ekspedis kristanan preĝejon?

- Estas milito, binbaŝi bejo. Milito. Kion fari?

- Kaj kion faris la pastro?

- Li kun sia komuno preĝis por venko. Sed ni ne scias, por venko de kiu flanko?

- Sed tion mi ne komprenas, mjudio bejo.

- En fino de preĝo li bondeziris longvivon al mastro de lando, kaj laŭvorte diris: "Vivu la **phadiŝah**⁹". Sed ni ne scias, kiun phadiŝahon li konsideris. Vi komprenas, binbaŝi bejo! Estas rusa phadiŝaho kaj estas turka phadiŝaho. En Rusio estas la caro kaj ĉe ni estas la nova sultano, kiun surtronigis Enver paŝao. De kie ni sciu, kiun phadiŝahon li konsideris?

⁹ Reĝo.

- Tion fakte estas malfacile certigi, - diras la majoro.
 - Sed ni certigis, - jam nun venke diras la mjudiro. - Ĉar prononcante frazon pri phadiŝaho, la pastro metis manon sur kruco.
 - Sur kiu kruco?
 - Sur longa kruco, balancita antaŭ lia brusto. Kaj tiel ni sciis, ke li povis konsideri nur rusan caron. Nur lin.
 - Sed mi ne estas tute konvinkita, - diras la majoro.
 - Nu, ni estas konvinkita, - diras la mjudiro.
-
- Min konsternigas, - diras la majoro, - ke armenoj ne ekribelis. Eĉ hodiaŭ mi aĉetis aĵojn ĉe armenoj. Ĉiuj vendejoj estas malfermitaj.
 - Sed kial ili devos esti fermitaj?
 - Ĉar tri el armenoj, tamen, estas pendumitaj..
 - Sed, binbaŝi bejo, - diras la mjudiro, - tiuj ratoj, tamen, estas tre timemaj por malkaŝa protesto.
-
- Antaŭ kelkaj sabatoj mi estis en Galicio, - diras la majoro, - en Aŭstria militfronto. Ĉu Vi scias, mjudiro bejo, kio tie okulfrapis?
 - Ne, - diras la mjudiro.
 - Tie estas tre multaj judoj. Kaj ĉu Vi scias kiel kondukas tiuj judoj marĉandante?
 - Ne, - diras la mjudiro.
 - Kiel armenoj, - diras la majoro. - Ĉi tiuj du popoloj estas mikseblaj. Tio estas nekredebla.
 - Tio povas esti, - diras la mjudiro.
 - Ĉu ĉi tie Vi ne havas problemojn kun judoj?
 - Ne, - diras la mjudiro. - Ĉi tie ni havas problemojn kun armenoj.
-
- Tiuj armenoj estas pli malbonaj ol ratoj, - diras la mjudiro. - Kie ajn ili vivas, kverelas popolojn, disigas kaj finfine neniigas ilin.
 - Tute estas ĝuste, - diras la valio.
 - Ili ekspluatas nin – turkojn kaj pretendas esti mastroj ĉi tie, - diras la mjudiro.
 - Estas tute ĝuste, - diras la valio.

- Kaj tiuj armenoj naĝas en monoj – estas tro riĉaj, kredu min. Iliaj virinoj estas kovritaj per pluŝo kaj silko, kaj havas plej multkostajn ornamaĵojn. Kiel oni diras: “Ĉiu armenino estas paŝanta juvelira vendejo”. - La mjudiro ridas. - Kaj ĉio estas en iliaj manoj. Bankoj kaj monŝanĝaj oficejoj, metioj kaj komerco. Ili estas kuracistoj kaj advokatoj, siajn filojn kaj filinojn frekventas bonegajn lernejojn.

- Kaj ili interkonsentiĝas kun nia malamiko, - diras la mutesarifo.

- Jes, - diras la mjudiro. - Ĉiu armeno estas vestŝanĝita ruso.

- Ili atendas enpiki glavon en nian dorson, - diras la valio. Kaj mallaŭte suplementas, - ni devas ion fari. - Li kun plezuro brutrinkas kafon, fumas pipon kaj diras: - Vere, ni devas ion fari.

- Kaj kio okazis kun la spiono, kaptita lasttempe? - demandas la majoro. - Ĉu li estas armeno?

- Certe, estas armeno. Do kio povas okazi alie?

- Kiel li nomiĝas?

- Vardan Ĥatisjan.

La majoro ridas. Li diras:

- Sed tio estas la plej ordinara armena nomo-familnomo. Armenoj estas tre malnova popolo, - diras la germana majoro. - Se mi ne eraras, en tiu ĉi lando jam ili vivis, kiam aperis Mahometo.

- Pri tio Vi estas ĝuste, - diras la valio.

- Laŭ mia opinio plej antaŭe, ol ..., - diras la majoro, - ol Jesuo paroladis sian montpredikton, jam tiam.

- Estas ĝuste, - diras la valio.

- Eĉ antaŭ tio, - diras la majoro, - antaŭe de ilia kaj nia numeraleco.

- Jes, - diras la valio.

La valio mediteme tiriĝas al sia pipo kaj ridetas.

- Ĉu eble Vi volas certigi, ke armenoj jam estis en ĉi lando ĝis alveno de turkoj?

- Mi nenion volas certigi, - diras la majoro.

- Supoze jes, tio povas esti ĝuste, - diras la valio, - sed kion signifas tio?

- Nenion signifas, - diras la mjudiro. - Ili estas ratoj, kaj la ratoj estis ĉi tie antaŭ veno de turkoj.

- Kaj denove pri ratoj, - diras la mjudio. Li ridetas kaj diras. - Ĉu vi scias, efendioj, nemalfrue mi en subteraĵo persekutis raton. Mi, certe, havis klapon en mano, ĉar volis mortigi raton.- La mjudio unusekunde fermas okulon, ree malfermas kaj senkulpe rigardas majoron. - Kiam mi estis en subteraĵo, subite vidis alian raton. Ili jam fariĝis du. Poste subite fariĝis kvar. Ili pliiĝis kaj pliiĝis. Ili alvenadis el ĉiuj truoj de subteraĵo. Pli kaj pli multiĝadis, estis centoj kaj miloj. Kie ajn mi paŝis, estis ratoj. Subite iĝis da milionoj. Ili deŝiris vestaĵon de mia korpo kaj fimanĝegis, forglutis mian klapon, saltis sur mia arterio kaj finfine formanĝaĉis min.

- Poste ĉu Vi vekigis? - demandas la majoro.

- Ne.

- Sed tio povus esti nur sonĝo.

Iotempe neniu prononcis vorton. Nur kiam la mjudio incitite aplaudas kaj ordonas enĵetitan zaptihon alporti freŝan kafon, la valio konfuzite tusas kaj direktas al la majoro demandon, kiu longtempe pendiĝas en aero.

- Kiaj estas militaj aferoj, binbaŝi bejo. Ĉu germananoj nun okupos Parizon aŭ ne?

- Tio pli longe ne povas daŭri, - diras la majoro.

- Kaj ĉu Peterburgon?

- Baldaŭ ni estos ankaŭ en Peterburgo.

- Kaj kiaj estas aferoj en Kaŭkazo?

- La armeo de Enver paŝao portempe deviĝas remarŝi.

- Dume turka soldato estas la plej bona soldato en mondo.

- La kaŭzo estas ĥolero, - diras la majoro, - kaj malvarma vintro.

- Sed vintro jam pasis.

- Jes, - diras la majoro.

- Dum tempo, kiam Enver paŝao regis ĉefkomandecon de Kaŭkaza armejo, ĉio bone pasadis, - diras la valio. - Enver paŝao devus daŭrigi sian militiron tiomtempe, ĝis renkontus germanan kajzeron en Peterburgo. Mi tute ne komprenas, kial la fronto mallongiĝis, kaj Enver denove revenis Konstantinopolon?

- Tion neniu komprenas, - diras la mjudio.

- Verŝajne pro ĥolero, - diras la valio. - Aŭ pro manko de vintraj vestaĵoj. Aŭ pro armenoj. Armenaj soldatoj sorĉis niajn armepartojn. Ili estas kulpuloj en ĉio.

- Jes, - diras la mjudio.

Ĉirkaŭ mi ĉio silentiĝis, kaj malgraŭ mi – Tovma Ĥatisjan, estis nur penso ekster tempo, mi aŭdis tik-tak.

- Tio estas nur tempo, - diras Meddah, - kaj volas vi aŭ ne volas, la tempo pasas. Kaj baldaŭ decido akceptiĝos.

- Kia decido?

- De provincestro. Decido de la valio de Bekiro, kiu ordonos al la mjudio, tranĉi kapon de via patro aŭ ne.

- Ĉu nun vi alkondukos min ĉe mia patro?

- Baldaŭ, ŝafideto mia. Baldaŭ.

Kaj Meddah diris:

- Ĉu vi vidas tiun maljunan blindulan almozulon ĉe Beateĉpordego?

- Jes, mi povas vidi lin.

- Li nomiĝas Mehmed efendio. Saĝa homo estas tiu Mehmed efendio, tiom saĝa, ke homoj pri li diras... malgraŭ li estas turko, sed havas armenan menson.

- Kaj kiu estas knabo, sidanta ĉe liaj piedoj?

- Estas lia nepo – Ali.

- Ĉu du malsataj buŝoj, kiujn forgesis Alaho?

- Vi eraras, ŝafideto mia. Vi vidas sur vojrande almozulan naztukon, kunmetitaj ŝtonoj sur kvar anguloj de naztuko, por ke ne forportu vento. Ĉi tie estas nur kelkaj laŭsozaj paraoj. Ne pli. Sed la tiu almozulo estas tro riĉa homo. Ĉu verŝajne vi ne kredas?

- Ne, mi ne kredas.

- Nu, pensu kion vi volas, - diris Meddah. - Sed tio estas tiel. Kaj tiu Mehmed efendio volas pagante savmonon liberigi vian patron, ĉar via patro unu foje savis lian vivon. Sed tion mi poste rakontos.

- Kaj ĉu tiu almozulo pagis savmonon kaj liberigis mian patron?

- Ne, - diris Meddah.
- Sed kial?
- Ĉar neniu povas liberigi vian patron. Li estas tre grava persono por la valio.

- Do, ĉu ne sukcesos?
- Ne sukcesos.

- Sendube, aliulo same provis pagante savmovon liberigi vian patron. Ekzemple, via patrino. Krom ŝi, la tuta familio. Ĉiuj provis fari tion. Sed senrezulte. Kaj oni diras, ke turkaj servistoj estas koruptemaj.

- Sed, ĉu ili vere estas koruptemaj?

- Certe estas koruptemaj, ŝafideto mia. En tiu ĉi lando preskaŭ ĉion oni povas atingi rimele baĥŝiŝo. Sed vian patron neniu povas liberigi.

- Ĉu ĉar li estas grava homo? Ĉu por valio?

- Ne nur por la valio. Ankaŭ por aliaj, precipe por la mjudio. Estraranoj multajn intencojn ligas kun li.

- Se li estas tiom grava homo, do, sendube, li taŭgos, kaj se taŭgos, ili ne devos esti tiom stulta kaj tiel frue ne fortranĉos lian kapon.

- Estas tiel, ŝafideto mia. Vi ĝuste juĝas. Mi ankaŭ tiel pripensas.

- Ĉimomente, ŝafideto mia, ĉimomente... la blindula maljuna almozulo tutkorpe skuiĝis. Ĉu vi vidis tion?

- Jes, mi vidis tion.

- Li faris tion, kvazaŭ timegas pro io, sed tio estas nur ludo, ĉar li ŝatas ŝerci kun sia nepo. Kaj ĉu vi aŭdas, kion li diras al sia nepo?

- Jes, mi povas aŭdi.

Kaj mi aŭdis, kiel blindula almozulo diris al la knabo.

- Ali, okullumo mia, mi opinias, ke mia morto proksimiĝas.

- Tio estas malsaĝeco, **dede**¹⁰, - diras la knabo. - Via morto tute ne povas proksimiĝi, dume vi ne diros al mi, kie kaŝis viajn monojn.

- En tio vi pravos, okullumo mia, - diras la blindulo. - kaj vi havas bonan menson, hereditan de mi.

¹⁰ Avo (turke).

- Jes, dedeo, - diras la knabo.

Kaj la almozulo diras:

- Al mi nur ŝajnis tiel, ĉar io malvarma premis mian gorĝon.

- Kio malvarma, dedeo?

- Malvarma vento.

- Sed nenia vento blovas, dedeo.

- Kiel ne, okullumo mia. Blovas malvarma vento. Kaj blovas de la Beatecpordego.

- Ĉu de la Beatecpordego?

- Jes, Ali, okullumo mia. Ĝuste de tie. Kaj mi vetos kun vi, ke morto sidas sur la arko de pordego.

- Morto sidas sub la arko de pordego, dedeo.

- Kun kia ekstero?

- Kun ekstero de tri armenoj, kiuj balanciĝas tie.

- Do, ĉu kun tia ekstero?

- Jes, tiel eksteras.

- Diru, okullumo mia, kio estas sur kapoj de mortintoj?

- Nur sur kapo de unu estas io, dedeo.

- Kaj kio estas ĝi?

- Ŝafidfela persa ĉapo.

- Ĉu vi pensas, ke tio iom kostas?

- Jes, dedeo. Sed ne multkostas.

- Ĉu vi pensas, ke la ĉapo forfalos?

- Jes, dedeo. Sed nur tiam, kiam mortinto movus kapon.

- Miaj blindaj okuloj jam ion vidis.

- Ĉu jes, dedeo?

- Ĉu mortinto verŝajne movos kapon, se ree blovos vento?

- Jes, dedeo.

- Diru al mi, okullumo mia, ĉu vi povas kapti la ĉapon, se mortinto movus kapon, kaj se la ĉapo forglitus de kapo?

-Ne, dedeo.

- Kaj kial, okullumo mia?

- Ĉar sub piedoj de mortintoj staras gardisto kun pafilo.

- Ĉu policiano, ĉu unu el stultaj zaptiĥoj?
- Jes, dedeo.
- Ĉu aliaj homoj ankaŭ staras sub piedoj de mortintoj?
- Jes, dedeo. Multe da hamaloj kaj kurda amasaĉo. Ankaŭ kelkaj turkoj kaj eĉ unu armeno.

- Kaj kion ili faras tie?
- Ili atendas, ke mortinto movu kapon kaj forĵetu ĉapon.
- Do, ĉu ili atendas tion?
- Jes, dedeo.

- Kaj kion pri vestaĵoj de mortintoj?
- Proksimiĝi al ili estas malfacile.
- Kaj kion pri iliaj ŝuoj?
- La sama.

- En homa kapo devas deveni pensaĵo, okullumo mia, por proksimiĝi al vestaĵoj aŭ ŝuoj. Kaj en kapo de via maljuna dedeo ĉiam devenos ia pensaĵo. Ĉu eble vi pensas, ke mi estas tro maljuna, kaj en mia kapo plu neniam pensaĵo devenas?

- Ne, dedeo, mi tiel ne pensas.

- Nu, atenton, lumo de miaj okuloj. De vestaĵoj ni rifuziĝas, ĉar vere estas malfacile senvestigi mortintojn, kiam ilin observas la stulta zaptiĥo. Krom tio ankaŭ estas multe da homoj, kiuj staras sub pendumuloj, atendas predon. Tute estas malfacile, lumo de miaj okuloj.

- Jes, dedeo.
- Sed kio koncernas ŝuojn, estas iomete alia afero.
- Kiel estas alia afero, dedeo?
- Ĝuste estas alia, lumo de miaj okuloj.

- Diru al mi, okullumo mia, kiajn ŝuojn portas mortintoj?

- Unu el ili estas nudpieda, dedeo. Li estas armena pastro kaj similas persan reĝon, sed estas sen krono, kun longa vestaĵo kaj havas krucon sur brusto.

- Sed persaj reĝoj ne portas krucon, lumo de miaj okuloj.
- Povas esti dedeo. Mi ne sciis tion.
- Kaj kiajn ŝuojn havas la dua?
- Li portas ruĝajn velurajn hejmsuojn – pantoflojn.
- Verŝajne oni lin fortiris el lito.
- Jes, dedeo.
- Ĉar tiuj armenoj, kiam estingiĝas fajro en **tonir**¹¹, dormas portante hejmsuoj.
- Jes, dedeo.

- Kaj kion portas la tria?
- Kaprohaŭtajn flavajn ŝuojn.
- Ĉu vi diris flavajn kaprohaŭtajn?
- Jes, dedeo.
- Nu, aŭskultu atente, lumo de miaj okuloj. Kia estas la alteco ĝis mortintoj?
- Tre alte estas, dedeo, por atingi flavajn ŝuojn estas tro alte.
- Kion tio signifas, okullumo mia? Kion signifas – tro alte?
- Alteco de tri katsalto, dedeo.
- Tio vere, estas alte.
- Jes, dedeo.

- Nu, aŭskultu atente, okullumo mia. Nun vi devos supreniri mil kaj unu ŝtupojn, kiuj atingas ĝis la arko de Beatecpordego.
- Ĉu tien, kie estas firmita ŝnuregoj de mortintoj?
- Jes, okullumo mia.
- Sed mi ne vidas mil kaj unu ŝtupojn.
- Tio ne havas signifon, okullumo mia.
- Ŝtupoj estas pli malmultaj, dedeo.
- Pli bone, okullumo mia. Kaj aŭskultu atente. Vi grimpos sur la arko kaj senŝnurigos mortinton kun flavaj ŝuoj.
- Jes, dedeo.

¹¹ Fajrujo, kavita en tero.

- Li falos kapmalsupren. Ĝuste ĉe piedoj de la zaptiĥo. Li miros, ke de kie venis mortinto. La malsaĝa zaptiĥo sentos teruran timegon. Li pensos, ke profeto mem sendis mortinton el ĉielo, malgraŭ li vere devas esti pendumita ĉi tie – sur terĝlobo, de Beatecpordego.

- Kion faros la zaptiĥo?

- Nenion faros, okullumo mia. Li gratos sian kapon kaj rigardos mortinton.

- Kaj kion mi faros?

- Vi suprenkuros tra mil kaj unu ŝtupoj, tro rapide. Vi kuros ĉe la zaptiĥo kaj ekparolos kun li.

- Kaj kion mi devos diri?

- Vi komplezos al li titolon de kapitano. Ĉar tiuj zaptiĥoj estas stultaj kaj pro tio estas tro memfidaj. Vi diros al li: "Juzbaŝi bejo, estas malpermesite lasi mortinton sur strato. Sed tion vi pli bone scias ol mi, juzbaŝi bejo".

Kaj la zaptiĥo sin sentos kompleziĝita, li karesos vian kapon kaj diros:

- Certe, mi pli bone scias ol vi.

- Mi scias, ke vi ree devos pendumi mortinton, - diros vi al li, - ĉar ne povas esti, ke la mjudio ordonos pendumi tri, sed sub arko de pordego estus pendumita nur du.

- Tiel ne povas esti, ŝafideto mia, - diros la zaptiĥo. - Se la mjudio ordonis pendumi tri homojn, sekve devos esti pendumita tri.

- Tio okaze, mi helpos vin pendumi mortinton.

- Tio ne estas malbona penso, - diros la zaptiĥo. - Sed ĉu vi vidis mil kaj unu ŝtupojn?

- Mi vidis, - diros vi.

- Ŝtupoj estas tro multaj.

- Jes, juzbaŝi bejo.

- Ĉu vi vere volas helpi min, grimpi tiom da multajn ŝtupojn, atingi ĝis alta arko de pordego kun tiu ĉi mortinta porko, kun tiu ĉi senkredulo, kun tiu ĉi necirkumcidito, kies animo jam delonge fritiĝas en inferno, se li ĝenerale havis animon?

- Jes, - diros vi.

- Estos tiel, okullumo mia. Kaj ĉar vi dume estas malgranda kaj pli malforta ol la zaptiĥo, vi devos porti pli malpezan finparton de mortinto, t.e. piedojn.

- Ĉu vi konsideras piedojn, portantajn flavajn kaprohaŭtajn ŝuojn?

- Ĝuste tiel, okullumo mia. Tiele, la zaptiĥo tenos pezan parton, li ĉirkaŭprenos mortinton sub brakoj, kaj duope tiun pezaĵon malfacile spirante tiros tra la ŝtuparo supren. Sed dum la supreniro vi subite haltos.

- Kial, dedeo?

- Ĉar vi volas diri ion al zaptiĥo.

- Kion mi volas diri?

- Vi aldiros: "Juzbaŝi bejo, vi tra ŝtuparo supreniĝas kun dorso supren. Sed tiel ne povas esti".

- Sed kial ne povas esti? - diras la zaptiĥo.

- Ĉar nur azeno tiel supreniĝas tra ŝtuparo, kaj kiam oni klopodas ĝustdirekte antaŭen puŝi ĝin, certe tiradante ŝnuron – penditan de azena kolo.

- Sed vi certe ne pensas, ke mi estas azeno, - diros la zaptiĥo.

- Ne, Juzbaŝi bejo, - diros vi.- Tia saĝa homo, kiel vi estas, certe ne povas esti azeno, kaj tra ŝtuparo ne supreniĝos dorsflanke.

- Kaj poste kio okazos, dedeo?

- Ankoraŭ kio okazos, okullumo mia? La zaptiĥo turniĝos kaj tenos mortinton jam malantaŭe de sia dorso kaj supreniĝos kiel normala homo – kun rigardo antaŭen... al arko de la pordego, ĝuste tien, kie volas ree pendumi mortinton.

- Estas tiel, dedeo.

- La zaptiĥo turnos sian dorson al vi, kaj sekve ne vidos vin. Li anhelante portos mortinton tra ŝtuparo, kraĉos, blasfemos. Li malbenos ĉiujn mortintojn dum tuta historio pendumitajn de turkoj.

Li malbenos ĉiujn senkredulojn, precipe armenojn. Li blasfemos militon kaj ĉiujn registarojn – la valion de Bekiro kaj la mutesarifon, la mjudiron kaj la kajmakamon, ĉiujn registrojn, kiuj ankaŭ grandegajn baĥŝiŝojn enpoŝmetas, dume li – la zaptiĥo, plejparte restas malplenmane aŭ kolektas ostojn, lasitajn de registroj. Li malbenos tiun

tagon, kiam naskiĝis. Li malbenos ĉiujn patrinojn, naskintajn homojn, kiel estas la valio aŭ la mutesarifo, la kajmakamo aŭ la mjudio, homojn, kiuj bonege vivas, sed li – la zaptiĥo, vivas kiel hundo, kun mizera baĥŝiŝo, kun kelkparaa salajro po monate, kiun Konstantinopolaj registoj plejparte forgesas pagi. Kiel oni diras – li malbenos kaj samtempe ŝvitos. Kaj dume, malbenante, ŝvitante kaj anhelante, la zaptiĥo supreniros tra ŝtuparo, mi pensas, li tute forgesos alian finparton de mortinto, la balancintajn piedojn, kiujn firme tenis la knabeto.

- Sed mi firme tenis la ŝuojn, flavajn kaprohaŭtajn ŝuojn.

- Estas tiel, okullumo mia. Vi firme tenis la ŝuojn. Kaj vi elmetas tiujn de piedoj de mortinto, vi elmetas tre trankvile, ĉar la zaptiĥo ne povas vidi vin. Vi ŝuojn ĵetos sur ŝtuparo. Kaj kredis min, la zaptiĥo nenion ekvidos, tute nenion. Kaj post vi supreniĝos mi, malgraŭ estas blindulo. Tion por mi nenian signifon havas, ĉar jam multe da jaroj mi scias mil kaj unu ŝtuparojn. Mi treege ofte supreniĝis kaj malsupreniĝis tra tiuj ŝtupoj. Do, mi venos post vi. Mi prenos belajn ŝuojn kaj metos en mian sakon.

- Ĉu en vian sakon?

- Do kien alien, okullumo mia?

- Ĝuste tiel okazis,- diris Meddah al la Lasta Penso.- La knabeto Ali malligis ŝnuron de mortinto. Kaj li brufraĥiĝis apud piedoj de stulta zaptiĥo.

Tiu sin kondukis ĝuste tiel, kiel antaŭdivenis blinda almozulo Mehmed efendio. Li gratis sian kapon kaj silente rigardis mortinton. Liaj lipoj flustris ion, kion komprenis el profetoj la plej lasta profeto.

- Mi vidas la knabeton Ali,- diris Meddah,- mi vidas, kiel la knabeto kurante malsupreniĝas tra mil kaj unu ŝtupoj kaj sin ĵetis ĉe la zaptiĥo kaj parolas kun li. Mi ankaŭ vidas, kiel ili duope suprenigas mortinton tra mil kaj unu ŝtupoj, la zaptiĥo kun peza parto, la knabeto kun malpeza parto. Ĉio okazis tiel, ĝuste tiel. La zaptiĥo turniĝis, ĉar nur azeno supreniĝas tra ŝtupoj la voston antaŭen. La zaptiĥo tenis mortinton kontraŭflanke kaj portis ĝustforme. Dume li malbenis kaj ŝvitis, la knabeto fortiris ŝuojn de lignosimilaj piedoj de mortinto. La blinda almozulo jam estis malantaŭe kaj flavaj ŝuoj malaperis en lia sako.

Kiam la paro, portanta mortinton, jam atingis la plej lastan ŝtupon, la zaptiho turniĝis.

- Pli bonan ŝnuron necesas trovi, - diris la zaptiho.

- Jes,- diris la knabo.

- Tiu ĉi ŝnuro denove povas tranĉiĝi.

- Jes,- diris la knabo.

- Necesas tia ŝnurego, kia estas kaprohara ŝnurego de kurdoj, per kio ili arestas sunon.

- Jes,- diris la knabo.

Nur tiam la zaptiho ekvidis nudajn piedojn de mortinto.

- Kie estas liaj ŝuoj?- demandis la zaptiho.

- Mi ne scias, - diris la knabo.

- Ĉu vi pensas, ke mortinta armeno ankaŭ povas sorĉi?- demandis la zaptiho.

- Jes,- diris la knabo.

- Tio vere similas sorĉecon, - diris la zaptiho.

Poste ili metis mortinton sur la plej supra ŝtupo, sed tiel, ke li rigardu ĉielon.

- Mi komence devas ripozi, - diris la zaptiho, forpurante ŝviton de sia frunto, - poste vi helpos al mi ree firmigi mortinton en sian lokon.

- Jes,- diris la knabo.

- Pli bone ni turnu lin kontraŭflanken, por ke li ne rigardu ĉielon, - diris la zaptiho, se ne, finfine liaj vestaĵoj ankaŭ malaperiĝos.

- Jes,- diris la knabo kaj helpis la zaptihon turni mortinton.

- Tiel, armeno fakte povas sorĉi, - diris la zaptiho. - Vivante, ili povas el poŝoj de ni – turkoj, sorĉe fortiri monon, kaj mortinte – malaperiĝas iliaj ŝuoj.

- Jes,- diris la knabo.

- Ili ĉiuj estas diabladoristoj, - diris la zaptiho, - kiel ezidoj en vilaĝo Birik, najbare vilaĝo Terbiceu, kie mia forpasinta patrino donacis al mi vivon. Je la nomo de Alaho!

- Sed armenoj ne similas ezidojn, - diris la knabo.

- De kie vi scias?

- De Mehmed efendio. Li konas armenojn. Mehmed efendio diris al mi, ke armenoj adoras Jesuon.

- Kaj kiu estas Jesuo?

- La Dio de senkreduloj.

- Kiu diris tion?

- Mehmed efendio diris.

- Ĉu aliaĵon ne diris?

- Diris. Li diris, ke tiu Jesuo estis firmita sur kruco per najloj kaj povis sorĉi.

- Ho, Alaho, indulgu min! - diris la zaptiho.

Nun la zaptiho bruligis cigaredon de firmo **Amrojan**, la plej malmultkosta cigaredon, kion ĉi tie – en Bekiro produktas armennacia Levon Amrojan.

- Kaj okazis tiel, - diris Meddah. - Dume ili duope firmis mortinton en sia loko (kaj tio sufiĉe longe daŭris, ĉar la zaptiho ne estis lerta homo, kaj ne estis konata kun turka buĉista nodo, kaj ĉar la knabo Ali ankaŭ ne sciis, kiel laŭ bonstato nodŝnuron ĉirkaŭigi sur rusta hoko, kio verŝajne estis tiom malnova, kiom Beatecpordego, kaj ĝi estas tre malnova, pli malnova ol la mortkrio de unua pendumulo sub arko de tiu ĉi pordego), dume tiel ili duope turmentiĝis, kaj la plej multe la zaptiho, plenumanta sian devon, ĉar pendumitaj de Beatecpordego laŭ ordo estis ne du, sed tri, kiel ordonis la mjudio. Kaj dume ili penadis ne kolerigi regantojn kaj ĉion reguligis tiel, kiel necesas, dume ĉio fariĝis ĝuste tiel, la nokto atakis la urbon de kurdaj montoj. Nokto neniam iras kaŝe, kiel oni diras, ŝtele rampante, ne, ŝafideto mia, nokto ĉiam rapide venas Bekiron, ĉar montaj ĝinoj de intermontoj estas senpaciencaj fantomoj, kiuj povas apenaŭ toleri, dume kurdoj ŝnurliginte kaŝas sunon. Kiam ĝinoj vidas, ke suno estis senigita de sia potenco, ridante eliras de intermontoj, forŝtelas longan ombron lasitan de suno antaŭe granda tendo, simple forŝtelas kaj ĵetas sur la urbo.

- Por tri pendumuloj estis tute egale, la suno ankoraŭ brilis sur la Bekiro, - diris Meddah. - Ili estis sendiferencaj ankaŭ pri la longa ombro, kiun ĝinoj per unu movo ĵetis sur urbo kun mil kaj unu moskeoj

aŭ pri nekalkuleblaj naftaj lampoj kaj stratlampoj, brilintaj unu post alia en urba mallumo. Ili nenion vidis, ĉar jam ne havis rigardon. Kaj tamen iliaj mortintaj okuloj rigardis al certa direkto.

- Kiel eblas sen rigardo rigardi al certa direkto?
- La direkto ne bezonas rigardon, ŝafideto mia.
- Kaj al kiu direkto ili rigardas sen rigardo?
- Al diversaj direktoj, ŝafideto mia. Ĉiu rigardas alidirekte.

- Nomo de ruĝpantoflulo estas Muŝegh Inglizjan. Li estis la plej riĉa grenkomercisto en Bekiro. Kaj divenu, kien rigardas liaj mortintaj okuloj?

- Kiel mi povas diveni, Meddah?

- La mortintaj okuloj rigardas al **Askeri ambari**, ŝafideto mia, al arma nutraĵa vendejo, ĉar Muŝegh Inglizjan dum multaj jaroj plej bonan grenon de tiu ĉi landparto provizumis turkan armeon, kaj tute senmotive kutimfariĝis frazo, ke “Ĉi tiu **ekmek** estas la plej bona pano de mondo, ĉar faruno estas el grentenejegoj de armena riĉulo Inglizjan. Kvankam vere, ke ĉiuj armenoj estas mensoguloj, sed tiu ĉi Muŝegh Inglizjan estas escepto, ĉar estas honora homo”.

- Sed mi nenian armenan vendejon vidas, Meddah.

- Vi devas nur rigardi al ĝusta direkto, - diris Meddah al la Lasta Penso. - Tiam vi ekvidos. Tio estas ne malproksime de ĉi loko.

- Kiom?

- La malproksimeco estas laŭ kvar cigaredoj, ŝafideto mia. Se vi irus tra la Armena kvartalo, trapasus mahalon, komence tra stratoj de kaserolpreparantoj kaj potriparantoj, poste tra stratetoj de juvelistoj, moninterŝanĝistoj, juvelvendistoj, poste tra longeco de strato feltistoj, poste tra strateto pasintan sub kupolula arko – **Kemer alti Sokhakh**, se rapide pasus tra ĉifona bazaro – Bit bazaro, poste denove tra longeco de strateto de tobakvendistoj, tajloroj kaj selpreparistoj, t.e. de tutunĝioj, urbaĝioj kaj saraĝioj, se vi trapasus ĉiujn nur dum daŭreco de fumado de kvar cigaredoj, do vi atingos turkan kvartalon. Poste ree daŭreco de du cigaredoj pasus preter mizeraj argilstukitaj kabanoj, malmultaj vendejetoj – plejparte jam fermitaj, vendejlukoj jam forkolektitaj de fruktoj kaj legomoj, kaj ankaŭ trapasus lignakonstruitan ponteton, finfine vi atingus kazermon.

- Ĉu kazermon?

- Ĝuste tiel, ŝafideto mia. Turkoj nomiĝas ĝin **kiŝla**.

Vi neniel povas ekvidi tion aŭ nenion aŭdi de tie, ĉar ĉimomente el kiŝla aŭdiĝis janiĉera muziko.

- Ĉu janiĉera muziko?

- Ĝuste tiel, ŝafideto mia, - diris Meddah. - Iam janiĉeroj estis elektaro de osmana armeo. Sed tio estis antaŭlonge. Janiĉeroj plu ne estas. Nur restis iliaj marŝkantoj.

- Ĉu mi povas aŭskulti ilin, Meddah?

- Tre bone vi povas, ŝafideto mia. Nur vi iras ĉe kazerno. Kaj iomete malproksime de tio. Kaj ekvidas tion.

- Kion mi ekvidas?

- Armean nutraĵmagazenon. Tie, kie kun dormemaj okuloj rigardas vendisto. Certe vendejo estas malplena.

- Kial estas malplena?

- Ĉar estas milito, ŝafideto mia. Kaj turkoj plu nenian nutraĵon havas. Fina restaĵo pasintsabate sendiĝis al Sirio, al stabstacio de kvara armeo... kaj poste suden – al turka-angla fronto.

- Kaj kiel estas en rusa fronto?

- Ĉu temas pri Kaŭkaza fronto?

- Ĝuste pri tio.

- Tie regas la malsato kaj la ĥolero. Kaj turkaj armeanoj rabas armenajn vilaĝojn kaj forprenas ĉion trovatan.

- La dua pendumulo ankaŭ rigardas al difinita directo. Kaj ĉu vi scias kien?

- Ne, Meddah.

- Li rigardas ĉielon, ŝafideto mia, ĝuste, kiel rigardis Jesuo, iutage pendumita de kruco.

- Kaj kion diras liaj mortintaj okuloj?

- Ili diras: "Patro, pardonu ilin, ĉar ili ne scias kion faras".

- Nun rigardu trian pendumulon, ŝafideto mia. Kion vi vidas?

- Estas mallumo, Meddah. Mi nenion vidas.

- Tiam imagu, la tria pendumulo similas vian patron.

- Ĉu li estas mia patro?
- Certe ne, ŝafideto mia. Via patro estas en malliberejo. Tiu estas lia frato Tigran...Tigran Ĥatisjan...via onklo. Ili ĉiam estis tre similaj.
- Ĉu mia propra onklo?
- Ĝuste tiel.
- Ĉu de kiu la blinda almozulo ŝtelis flavajn ŝuojn?
- Ĝuste li estas.

Kaj Meddah diris:

- Via onklo ne estas riĉulo. Li estis malriĉa ŝuisto, kiu nutris dekdu infanojn.
- Tamen li havis kaprohaŭtajn flavajn ŝuojn, ĉu ne?
- Tio estis lia sola riĉeco. Ĉar estis la plej belaj kaprohaŭtaj ŝuoj en tuta Bekiro.

- Aŭskultu min, okullumo mia,- nun diras blinda almozulo Mehmed efendio al knabeto Ali. Vi tre bone faris la aferon ligitan kun ŝuoj. Ĉar tio estis perfekta riĉeco.

- Ĉar ĉu ĝi estas de aŭtentika kaprohaŭto?
- Ne, okullumo mia. Ĉar en ŝuoj estis kaŝita oro.
- De kie vi scias?
- Ĉiu armeno en siaj ŝuoj enkudras unu oron,- diras la blinda almozulo,- iam eĉ du aŭ tri.
- De kie vi scias?
- Tion ĉiuj scias,- diras la blinda almozulo.
- Kaj kial tiel faras armenoj?
- Ĉar ili estas persekutita nacio,- diras la blinda almozulo. - Ĝuste kiel en aliaj landoj – hebreoj kaj ciganoj. La armeno neniam scias, ke kiam turko fajros lian domon. Laŭ tria kaŭzo li ĉiam estas preta elsalti.
- Kion signifas “estas preta elsalti”?
- Ho, ŝafideto mia, ĉu vi neniam vidis saltantan armenon?
- Ne, dedeo.
- La armeno saltas simile kapron, kiam subite tutfajriĝas lia domo. Mi vidis iun elsaltintan tra la fenestro.

- Ĉu la armeno povas ankaŭ kuri?
- Certe povas ankaŭ kuri. Fakte la armeno forkuras kun oro en ŝuo. Sekve, oro forkuras kun li.
- Ĉu tiel povas esti?
- Tio tiel povas esti, ŝafideto mia. Ĉar kiam ekkomencos **la granda evento** (armenoj tiel nomas ekstreman okazaĵon...ankaŭ grandan plagon aŭ genocidon), li plu ne havas tempon kolekti posedaĵon. Li eĉ ne havas tempon enterigi siajn mortigitajn infanojn. Li nur povas forkuri. Kaj iutage li haltos kaj elmetos oron el ŝuo.
- Por kio, dedeo?
- Por komenci novan vivon, denove edziĝi, ree havi infanojn.

Kaj nur nun Mehmed efendio siajn maljunajn manojn ŝovis en malnova sako – pli aĝa ol liaj manoj. Li tre longe fiksobservis ŝuojn kaj poste diris:

- Mi konas tiun homon, posedintan ĉi tiujn ŝuojn, ĉar nur unu ŝuparo estis en la tuta Bekiro.
- De kie vi scias?
- Mi scias, ĉar la homo, posedinta ĉi ŝuojn, ofte paroladis kun mi. Ĉiufoje, kiam li bezonis bonan konsilon, venadis al mi. Li ne estis riĉulo kaj ĉiufoje duon piastron ĵetis sur mian almozulon tukon.
- Sed ĉu vi vidis liajn ŝuojn?
- Ne, okullumo mia. Sed mi per manoj palpis. Mi diras al vi, ke scias ĉiun faldon de tiuj nuraj ŝuoj.
- Kiel nomiĝis tiu homo?
- Tigran Ĥatisjan. Armena ŝuisto.
- Kaj kial oni pendumis lin?
- Pro unu botelo da rusa brando. De buŝo al buŝo oni tion diras.
- Ni ŝtelis ŝuojn de amikulo, dedeo.
- Ĝuste, okullumo mia. Sed pli bone, la ŝuoj konserviĝu en mia sako, ol en selsaketo de iu zaptiĥo.
- Sed kial en selsaketo?
- Nu, okullumo mia. Tia estas la afero: Morgaŭ matene mortintojn oni malsuprenigos. Aŭ postmorgaŭ. Aŭ en sekvonta sabato. Mi ne

scias, kion decidis registaranoj kaj ankoraŭ kiom da tempo mortintoj devos esti pendumitaj. Sed iutage oni devos malsuprenigi ilin. Kaj zaptiĥoj devos interbati por iliaj vestaĥoj. La plej fortulo akiros ŝuojn kaj certe portos al ĉevalstalo kaj kaŝos en selsaketo de sia ĉevalo. Sed kio okazos kun ŝuoj en selsaketo de la zaptiĥo? Tio malutiliĝos ŝuojn. Kaj la blinda almozulo diras:

- Morgaŭ mi vendos ŝuojn. Sed anticipe mi eligos oron.

- Sed ĉu tiu armena ŝuisto ne estis riĉulo?

- Ne, okullumo mia.

- Ĉu en tiu okazo eble ne estas oro en ŝuoj?

- Tamen, okullumo mia. Eĉ pli malriĉa armeno iutage trovos unu oron por ŝuoj.

- Ĉu vi povas palpi oron?

- Mi dum tuta tempo fiksobobservas, sed nenion sentas sub mano.

- Eble li netroveble enkudris ĝin.

- Jes, okullumo mia. Verŝajne li ŝovis en kalkanumo. Kaj kalkanumo estas ligna.

- Deŝiru ĝin!

- Ne tuj, okullumo mia, ne tuj. Morgaŭ mi vendos ŝuojn, - diras Mehmed efendio.

- Ĉu aŭ ne devos vendi, sed mi devos redoni?

- Ĉu al armena ŝuisto?

- Mi pensas al lia edzino, kiu havas rajton koncerne ŝuoj.

- Sed, dedeo, vi ne faros tion. Vi neniam redonis ion el via sako.

- Vi estas prava, okullumo mia. La satano senĉese provas min. Sed Alaho estas granda. Ŝajnas ĉi foje estas Lia volo, ke mi por loketo en paradizo redonos ŝuojn. Tamen tio ne estas malbone, ĉu ne?

Kaj Mehmed efendio diris:

- Inŝallah¹². Nur Alaho scias, kion mi faros.

Poste Mehmed efendio kolektis kelkajn paraojn de sia almozula tuko, ŝovis tukon sub turbano, prenis blindulan bastonon kaj ĵetis eluzitan sakon sur sia ŝulto.

- Divenu, kien nun ni iras,- diras li al la knabeto Ali.

¹² Laŭ volo de Alaho.

Pasante tra la malluma urbo, la almozulo rakontis historion al la knabeto.

- Antaŭ tre longa tempo,- diris li,- mi mortmalsane kuŝis ĉe la Beatecpordego. Neniu interesiĝis pri mi. Dum tuta tago armenaj kaj grekaj komercistoj, sidante en siaj ĉaroj, veturadis al bazaroj de Bekiro. Plejparte ili venis el regiono Diarbekiro(de urbo de grandegaj akvomelonoj). Sed preterpasis ankaŭ kamelaj karavanoj, kurdaj montaj rajdantoj kaj almozulaj kurdoj el duonnomadaj vilaĝoj, trovi ĉi tie grandan feliĉon. Venadis ankaŭ aliaj, eĉ ciganoj, t.e. diverskolora kratero de popoloj. Certe venadis same turkoj – unue zaptihoj, tiam ankoraŭ vestinte multkolorajn pufpantolonojn, venadis baŝibozukoj – amasaĉo de partizanoj, plejparte ĉerkezoj. Estis tre varma tago. Sed neniu donis al mi guton da akvo. Sed post tagmezo nur unu homo haltis tie, kie mi estis kuŝita. Li donis al mi akvon trinki, abundan akvon, tutan haŭtsakon. Poste li invitis min en sia azenĉareto kaj portis.

- Kien, dedeo?

- Li veturis al Jedi Suo, armena vilaĝo je dutaga malproksimeco de ĉi tie.

- Do, ĉu li estis armeno?

- Jes, okullumo mia. Li estis armeno. Lia nomo estis Vardan Ĥatisjan, li estis frato de pendumulo.

- Ĉu li savis vian vivon?

- Jes, okullumo mia. Li alportis min en sia vilaĝo. Tie li transdonis min al sia **gerdastan** – al familiego de armenoj. Tie estis multaj virinoj kaj infanoj. Ili zorgis pri mi dum tiom da tempo, ĝis mi denove saniĝis.

- Kaj kie estas Vardan Ĥatisjan?

- En malliberejo estas, okullumo mia.

- Ĉu ni nun iras tien?

- Nun ni iras tien.

- Kion li faras en malliberejo?

- Li atendas, ke oni morgaŭ fortranĉos sian kapon.

- De kie vi scias tion?

- De strataj homoj.

- Ĉu li morgaŭ mortos?

- Se Alaho tion volus, okullumo mia.

- Sed se Alaho tion ne volus?
- Nu, sekve, ne.

En tiu momento la Lasta Penso demandis de Meddah:

- Ĉu la blinda almozulo povas fari ion por mia patro?
- Tio poste klariĝos,- diris Meddah. - Verŝajne li en malliberejo devos spioni inter zaptihoj, por ke iamaniere scii, kion eblas fari ankoraŭ. Poste li petegos saĝan konsilon de Alaho. Bezonas atendi komfortan momenton.
- Kie mia patro estas?
- Sed mi jam diris al vi, li estas en malliberejo.
- Ĉu en kelo?
- Certe. En kelo.
- Kion li faras tie?
- Balanciĝas, pendumite per longa ŝnuro.
- Sekve, ĉu li jam estas mortinta?
- Ne, ŝafideto mia, li ne estas mortinta.

2.

Kiam la Lasta Penso unuan fojon vidis sian patron, ekpensis: «Meddah pravas, li vere ne estas mortinta, malgraŭ turkoj pendumis lin. Oni pendumis ne de kolo, sed de piedoj. Kaj la fakto, ke li estas pendumita kapmalsupren, devas ĝoigi min, ĉar piedoj ne havas kolon, la rompiĝo de piedoj ne estas mortebla”.

La Lasta Penso ĝojis kaj diris al Meddah:

- Mia patro vivas!

Kaj Meddah diris:

- Jes, via patro vivas.

- Okuloj de mia patro estas malfermitaj.

- Jes, ŝafideto mia. Sed liaj okuloj nenion vidas.

- Ĉu liaj okuloj estas blindaj?

- Ne, ŝafideto mia. Via patro senkonsciiĝis. Sed tio ne havas signifon. Baldaŭ li rekonsciĝos. Kaj ekvidos plankon de kelo. Nenion alian. Sed ĉi planko ne plaĉas al mi, ŝafideto mia. Ĝi estas malpura planko – batpremita argila planko, ensorbita kun urino.

- Se estus lumtago, - diris Meddah, - sed ne malluma nokto, kaj se via patro povus vidi kratan fenestron, troviĝantan sub la maldekstra angulo kaj eĉ trarigardi, do li ekvidus grandan murzono. Ĝi estis konstruita dum tempo de selĝukoj, per sama ŝtono de Bekira fortikaĵa murzono. Li, certe, ekvidis ankaŭ malliberejan korton kaj suprajn etaĝpartojn de registara domo.

- Ĉu temas pri hjukjumeto?

- Jes, ŝafideto mia.

- Do, ĉu hjukjumeto troviĝas en korto de malliberejo?

- Certe ne, ŝafideto mia. Hjukjumeto troviĝas ekstere mallibereja murzono, sed tiom proksime, ke la mjudio sufiĉas malfermi sian oficejan fenestron kiaj precize aŭdos kriojn de armenoj el malliberejaj turmentejoj.

- Ĉu tio amuzigas lin?

- Mi ne scias, ŝafideto mia. Sed tio stimulas lian digeston. Lasttempe li diris al la valio:

- Ĉu Vi scias, valio bejo? kiam finfine nia registaro decidis pridemandi armenojn, mi plu ne bezonas laksigilon, ĉar krioj de tiuj senkreduloj dum turmentoj estas la plej efika laksigilo por mi.

- Mi ĵuras kun nomo de Alaho, - diris la valio. - Tio ĝuste tiel influas sur mi.

- Ĉu Vi ankaŭ ne uzas laksigilon?

- Ne, mjudio bejo. Dum mia longa vivo mi multe da laksigilojn glutis.

- Valio bejo, ĉu Vi pensas, ke la Alaho kun sia antaŭvideco donis al armenoj kiantajn buŝojn, por ke reguli nian – turkan digeston?

- Afermotivoj de Alaho estas ne eksplikantaj, - diris la valio.

- Sed Via konjekto, mjudio bejo, estas ekster limoj de ebleco.

Iam antaŭ kelkaj monatoj, germana oficiro, observante malliberejon, demandis al la valio:

- Kiel okazis, ke inter viaj malliberuloj estas malmultaj armenoj? Ĉu ne Vi insistis lasttempe, ke ĉiuj armenoj estas friponuloj?

- Armenoj estas ruzaj, - diris la valio, - kaj aperigi iliajn krimojn estas malfacile.

- Kaj kiaj estas aferoj rilate murdistoj?
- La sama.
- Ĉu eblas, ke ĉiuj tiuj ne konvenas realecon?
- Kion Vi konsideras?
- Eble en realeco en tiu ĉi popolo estas malpli murdistoj, ŝtelistoj kaj friponuloj, ol en aliaj.
- Ĉio eblas, - diris la valio.
- Eble armenoj estas honora kaj pacema popolo, tamen oni ne volas akcepti tion.
- Ni devis demandi de Alaho,- diris la valio. - Alaho scias respondon.

- Kaj tio estas fakto, - diris Meddah, - ke tiam, kiam germanano kontrolis malliberejon, tie estis nur tri armenoj.
- Kaj kiuj estis aliaj malliberuloj?
- Ne armenoj, - diris Meddah. - Plejparte ili estis kurdoj, sed inter ili ankaŭ estis turkoj, araboj, ciganoj kaj aliaj, precipe estis multnombraj muhaĝiroj – mohametanaj ekzilitoj el Makedonio, Bulgarujo, Grekujo kaj Kaŭkazo. Kaj en malliberejo de Bekiro nur armenoj estis malmultaj.

Kaj Meddah diris:

- Ĝuste, ŝafideto mia. Via popolo neniam estis popolo de ŝtelistoj kaj banditoj. Kiel oni diras, banditon serĉu inter kurdoj kaj, precipe, inter sovaĝaj montanoj. Ĉiu el ili senceremonie tranĉos vian gorĝon, por fiakiri viajn ŝuojn aŭ ĉapon, se ĝi ne havas ĉirkaŭrandojn, ĉar la mohametanano ne decas vesti ĉapelon kun ĉirkaŭrandoj. Kaj vi ne bezonas longtempe serĉi inter aliaj popoloj ŝtelistojn kaj mensogulojn. Sed tio ne signifas, ke inter aliaj popolaj ne estas honoraj homoj. Estas multaj honoruloj, sed ne tiom multaj, kiel inter armenoj. Jen kial antaŭ kelkaj monatoj nur tri armenoj estis en malliberejo.

Kaj Meddah diris:

- Kiam komenciĝis fortega ondo de arestoj kaj centojn da armenoj oni fortiris el iliaj litoj, por ke rimede spionado kaj aliaj ĉantaĝoj enketi

ilin, la mjudio, interkonsentis kun la valio kaj mutesarifo, ordonis ĉiujn malliberulojn transloki de ĉehjukjumeta granda malliberejo en alian malliberejon.

- Kien, Meddah?

- Al malplena malliberejo – malsupre, sur riverbordo.

- Kial, Meddah?

- Nu, kiel-kial, ŝafideto mia? Certe por liberi lokon. Por ke la mjudio enlokumu multajn armenojn, necesas iun lokon. Kaj li volas enloki ĉirkaŭ la hjukjumeto, ĉar ili ĉiuj havas siajn oficejojn tie – la valio kaj la mutesarifo, la kajmakamo kaj la mjudio. Kaj ĉar de hjukjumeto ĝis la ekstermurzona granda malliberejo – tiom malnova, kiom fortikaĵa murzono de la Bekiro, estas entute kelkaj paŝoj.

Kaj Meddah diris:

- Nun malliberejo estas plenplena. Se ili volus aresti pli multajn armenojn, devos ĉenligi ilin ĉiujn kaj lokumi en korto.

- Ĉu ne estas ia tria malliberejo?

- Estas, – virina malliberejo.

Kaj Meddah diris:

- Ne ĉiuj armenoj havas apartan kelon, kiel via patro. Kaj ne ĉiuj armenoj balanciĝas kapsupren, penditaj per longa ŝnuro, kio estas ligita ne ĉirkaŭ kolo, sed ĉirkaŭ nudaj piedoj.

Kaj Meddah diris:

- Sed jam ni sufiĉas babili, kaj mi lasas vin sole kun via patro.

Mi estas sole kun mia patro. Mi volas paroli kun li. Mi volos diri **patro**. Sed nenion diras mi. En kelo estas malfrua nokto, kaj nur de lia raŭkado mi komprenas, ke li ankoraŭ vivas.

Mi ne bezonas horloĝon, ĉar mi estas ekster tempo.

Je la ia momento de nokto malfermiĝas la pordo de kelo. Eniras kelon de mia patro unu malbelega, kun ridaĉo sur lipoj, ĉevalvizaĝa zaptiĥo, kun torĉo en mano. Post li eniras ankaŭ du homoj: la dikkorpa valio kaj la unuokula mjudio.

La mjudio montras malliberulon kaj demandas.- Kial li estas pendumita kapsupren?

- Ĉar Vi tiel ordonis, mjudio bejo,- diras la zaptiĥo.
- Kaj kiam mi ordonis?
- Hodiaŭ matene, - diras la zaptiĥo.
- Kaj kian kaŭzon mi havis ordoni?
- Mi ne scias, mjudio bejo,- diras la zaptiĥo.

La valio diras:

- Verŝajne pro tio, ke rezignas konfesi kion postulas ni. Tiu ĉi armeno estas el obstinaj.

- Verŝajne,- diras la mjudio.

- Eble Vi ordonis pendumi lin kapmalsupren, ĉu por ke la sango fluegu al kapo?

- Estus bone, ke tiel estus,- diras la mjudio.

- Ĉu por ke la sango nutru cerbon, stimulu memoron, kaj li parolu?

- Eblas,- diras la mjudio.

La ĉevalvizaĝa zaptiĥo diras:

- Se morgaŭ surdamuta Issek efendio tranĉos la kapon de ĉi tiu malliberulo, li neniam bezonos memoron.

- Certe estas tiel,- diras la mjudio.

Kaj la mjudio diras al la ĉevalvizaĝa zaptiĥo:

- Ĉu vi povas imagi, kian aspekton havos morgaŭ la malliberulo, se Issek efendio fortranĉos lian kapon?

- Jes, mjudio bejo,- diras la zaptiĥo.

La mjudio diras:

- Sed ni ne devos fortranĉi lian kapon.

- Kaj kial, mjudio bejo?

- Ĉar la valio volas morgaŭ ree enketi la malliberulon.

- Estas ĝuste,- diras la valio. - Sed ankaŭ ne estas ĝuste.

- Kio estas ne ĝusta? - demandis la mjudio.

- Vi devos ree enketi lin, mjudiro bejo.

La mjudiro enpenŝigeme paŝis tien kaj reen en kelo. Li haltis ĉe barelo de fekaĵo. La zaptiĥo proksimiĝis kun torĉo en mano.

- Kial estas malplena la barelo?

- Ĉar por armenoj estas tipe fekadi sur la planko.

- Ĉu eblas, ke li nekfoje povis uzi ĉi tiun barelon?

- Eblas, mjudiro bejo.

- Ĉar, ĉu li pendumite balanciĝas kapmalsupren?

- Eblas, mjudiro bejo.

Nur tiam la mjudiro ekvidis manĝaĵtason, metitan ĉe la barelo de fekaĵo. Li kliniĝis kaj flaris blghuran restaĵon.

- La blghuro fiodoras tiel, kiel surplankaj ekskrementoĵ.

- Eblas, mjudiro bejo, - diris la zaptiĥo.

- Eble tio ne estas blghuro, sed estas ĝusta fekaĵo.

- Kaj tio ankaŭ estas eble, mjudiro bejo,- diris la zaptiĥo.

- Kiam li manĝis tion?- demandis la valio.

- Antaŭe mi pendumis lin,- diris la zaptiĥo.

- Ĉu pro tio li povis sin veneni?

- Eblas,- diris la zaptiĥo.

- Estos bone, se malliberulo vomus tion fimanĝaĵon, por ke morgaŭ mi povus enketi lin,- diris la mjudiro. - Ĉar se morgaŭ li mortos, al mi nenion rakontos li.

- Estas vere,- diris la zaptiĥo.

- Ĉu eble li jam vomis?

- Mi devas kontroli,- diris la zaptiĥo.

La zaptiĥo nun lumigis malpuran plankon sub la kapo de malliberulo. Ŝancelante sian kapon, li sin turnis al la mjudiro:

- Nenion vomis li, mjudiro bejo.

- Kion signifas?

- Mi ne scias, mjudiro bejo.

- Sed tiel ne povas esti.

- Kial, mjudiro bejo?
- Ĉar li estis pendumita la kapon malsupren, kaj certe li devis vomu fimanĝaĵon.

- Verŝajne li rifuzis fimanĝaĵon, mjudiro bejo.

La mjudiro diris al la valio:

- Kion Vi pensas pri tio?

- Nenion,- diris la valio.

- Estos bone,- diris la valio,- se la malliberulo vomus. Se ne, morgaŭ Vi ne povos enketi lin.

- Jes,- diris la mjudiro.

- Faru ion, mjudiro bejo.

- Hajde, Hajde¹³, - diris la mjudiro al la zaptiĥo. - Nu rapidu, faru ion!

- Kion mi faru, mjudiro bejo?

- Faru ion, fiagulo,- diris la mjudiro.

- Mi povus ŝovi kuleron en buŝo de la malliberulo,- diris la zaptiĥo,- sed ĉi tie mi ne vidas kuleron.

- Sed kiel li manĝis sian fimanĝaĵon?

- Per fingroj.

- Sed kie estas lia kulero?

- Li ne havas kuleron.

- Ĉu vi povas akiri kuleron?

- Ne, mjudiro bejo. Ne meznokte...

- Ĉu vi povas ŝovi vian fingron en lia buŝo?

- Mi povas, mjudiro bejo. Sed miaj fingroj estas mallongaj. Ion pli longan bezonas ŝovi ĉi tie, tiom longan, ke li naŭzu.

- Ĉu ponardo taŭgas?

- Ion pli molan bezonas, mjudiro bejo.

- Aŭ ĉu pafiltubon?

- Tio ankaŭ ne estas mola, mjudiro bejo.

¹³ Ekkrio, signifanta eliru for (turke).

- La zaptiĥo pravas,- diris la valio.- Verŝajne, apenaŭ Vi enketos lin morgaŭ, se nun ni ŝovu en lia buŝo pafiltubon, ponardon aŭ superan parton de bastono. Armenoj havas sentemajn gorĝojn. En tiu ĉi afero mi havas propran sperton.

- Ĉu vi pensas, ke la malliberulo morgaŭ ne povos paroli?

- Mi ĝuste tiel pensas, mjudio bejo,- diras la valio.

- Ĉu vi havas ion molan?- diris la mjudio al la ĉevalvizaĝa zaptiĥo,- ion molan, io, ke ankaŭ estu sufiĉe longa, devonta vomi la malliberulon, ion, ke vi povus ŝovi profunde en lia gorĝo, nesabotante ĝin. Ni volas morgaŭ enketi lin.

- Mi povas fari tion,- diras la zaptiĥo.

- Ĉu vi havas ion konvenan?- demandis la mjudio.

- Jes! - diris la zaptiĥo.

Nun la zaptiĥo per unu mano frapetis malliberulon, ĉar per alia mano tenis torĉon. La malliberulo balanciĝis kaj lia eksteraĵo iĝis mistera, tiel ŝajnis al la mjudio, ankaŭ al valio, pro tio, ke rigardis ne la malliberulon aŭ zaptiĥon, tenatan torĉon per unu mano, sed kontraŭan muron.

- Ludoj de ombroj, - diris la valio. - Rigardu, mjudio bejo! Sur la muro balancanta silueto!

- Turka ombroludo! - diris la mjudio.

- La karagjozo! - diris la valio.

- Jes, la karagjozo, turka klasika ombroludo, per kiu ĉiam admiris eŭropanoj!

- La malnova arto! - diris la valio.

- Jes! - diris la mjudio.

- Ĉu mi metu torĉon en kavon? - demandis la zaptiĥo.

- Kia kavo?

- En planko kavo, kie estas falinta hunda kapo?

- Kia hunda kapo?

- Kiun la malliberulo ne volis manĝaĉi?

- Kiu donis al li hundan kapon?

- Vi donis hundan kapon, mjudiro bejo, - diris la zaptiĥo.

- Metu torĉon en kavo, kie estas hundkapo, - diris la mjudiro, samtempe sorĉite rigardante kontraŭan muron, la valio same sorĉite rigardante kontraŭan muron, sur kiu homa silueto balanciĝis.

Subite la siluetoj duiĝis, ĉar nun la zaptiĥo staris antaŭ torĉo, enpikita en kavo, ĉe falita hundkapo.

- Ho, rigardu, valio bejo! - diris la mjudiro. Estas nekredeble, kio okazas sur muro!

- Tio estas arto, - diris la valio. Vera arto. Nenia popolo en mondo pliperfektas nin en ombroludo.

- La karagjozo! - diris la mjudiro.

- La karagjozo! - diris la valio.

- Ĉion oni devos imagi! - diris la valio. - Devos imagi, ke la dua homsilueto malsuprenigas pantalonon!

- Kaj la unua, pendumita de plafono, malfermis buŝon.

- Estas tiel, - diris la valio.

- Oni devos imagi "kaŭĉuktubon", kiun eligas la dua homsilueto inter siaj maldikaj siluetaj piedoj.

- Ne necesas imagi, - diris la valio, - estas videbla!

- Estas ĝuste, - diris la mjudiro. "Kaŭĉuktubon" mi ankaŭ vidas.

Kaj nun la "kaŭĉuktubo" lignosimiliĝos.

- Kaj ligno daŭre longiĝas!

- Kaj grandiĝas!

- Tio vere nekredeble estas.

- La karagjozo!

- La karagjozo!

- Ĉu Vi scias, valio bejo, - diris la mjudiro, - tiu ĉi stulta ĉevalvizaĝa zaptiĥo estas filo de fama homo?

- Tiel! Kies filo li estas?

- De unupiedula Hasan – de krimulo en Bulgara granda masakro.

- Kiam tio okazis?

- En 1876.

- Ĉu dume Bulgara ribelo?

- Ĝuste tiel.

- Lia patro tiam havis paron da piedoj. Sed dum buĉadoj kaj perfortadoj unu el bulgarinoj eligis pistolon kaj pafis piedon de Hasan.

- Ho, Vi pri ĉio povas rakonti!

- Jes, valio bejo. Ŝi vere pafis.

Tiam la angla gazetaro kontraŭ ni – turkoj, estis ekscitita. Ili skribis, ke niaj armeopartoj fajrigis tutajn vilaĝojn. La afero estas en tio, ke oni trovis senkapitajn kadavrojn, brulitajn virinojn kaj infanojn.

- Ĉu tio ankaŭ estas ĝuste?

- Certe ĝuste. Sed tion faris ne turkoj.

- Kaj kiu faris?

- Baŝibozukoj – tiutempaj sultanaj partizanoj, ĉefe la ĉerkezoj.

- Sed baŝibozukoj estis sub turka ĉefkomandantaro.

- Tiuj ĉerkezoj malamamis rusojn, - diris la mjudio, - ĉar rusaj kazakoj fajrigis kaj ruinigis iliajn vilaĝojn.

- Kompreneble, - diris la valio.

- Ili el Kaŭkazo forkuris en Turkion. Kaj multoj el ili iĝis baŝibozukoj. La sultano enlokigis ilin en Bulgario ĝuste tiam, kiam tie komenciĝis ribelo. La ĉerkezoj malamamis rusojn kaj pensante, ke la bulgaroj estas rusoj, masakris iliajn virinojn kaj infanojn.

- Kompreneble, - diris la valio.

- Tiam ni havis multajn malplezuraĵojn kun ili kaj pli multe pro angla gazetaro.

- Jes, - diris la valio.

- Samtempe anglanoj ne estas pli bone, ĉar deziras konkeri tutan mondon. Sed iliaj baŝibuzukoj nomiĝas aliel.

- Kaj tie estis unupiedula Hasan, tiutempe havinta du piedojn. Vere li estis ordinara **ĉauŝo**¹⁴.

Sed angla gazetaro tiun turkan vorton tradukis laŭ lingvo de senkreduloj kaj unupiedulan Hasan nomis kiel serĝanto. Tio en Anglio estas tre grava aĵo. Kaj kiel ekzemplo, en gazetaro oni memoris lin.

¹⁴ 1. Armea grado – dekestro. 2. Policisto (turke).

- Estu malbenita la angla gazetaro, - diris la valio.

- Kaj la tiu ĉi ĉevalvizaĝa zaptiĥo, ĵus malpuriganta buŝon de armeno, estas lia filo.

- Ĉu la propra filo?

- Ĝuste tiel.

- La ĉi tiu filo de unupiedula Hasan estas iomete alia, - diris la mjudio.- Li estas de sama Sazan-Kjojo vilaĝo, kie oni diras vivas la plej belaj knabetoj.

- Vere, - diris la valio.

- Foje li perfortis trijaran knabeton kaj infanon preskaŭ mortigis.

- Kaj ĉu knabeto mortis?

- Ne, - diris la mjudio.

- Strange, - diris la valio. - Ĉiutage mi vidadis la ĉi tiun ĉevalvizaĝon kaj tamen ne sciis, ke li estas filo de la unupiedula Hasan kaj krom tio estas homoseksualisto – preskaŭ mortiginta trijaran knabeton.

- Ili fikse rigardadis ombroludon. Voĉo de la mjudio estis malforta, preskaŭ plezura, kaj voĉo de la valio – forta kaj gorĝa. De malantaŭa plano ili klare aŭdis, kiel vomis la malliberulo kaj ĉiufoje, kiam el buŝo de kapmalsupra pendumulo aŭdiĝis gluglego, la mjudio skuiĝis kaj lia vitra okulo puŝiĝis antaŭen, kvazaŭ volis flugi en ombroludon sur kontraŭa muro.

La Lasta Penso teruriĝis, kiam vitra okulo de la mjudio minacis forsalti el okulingo, kaj pro tio la fabelisto karesis la Lastan Penson. Li diris al la Lasta Penso:

- Lia vitra okulo ne elsaltas al muro. Nur tiel ŝajnas.

- Mia patro ankaŭ havas vitrajn okulojn, - diris la Lasta Penso. Kaj ĉiufoje, kiam la zaptiĥo sian “kaŭĉuktubon” profundiĝante turnigas en gorĝo de mia patro, liaj okuloj forpuŝiĝas el okulingoj, kaj mi timas, ke ili falos sur planko kaj dispeciĝos.

- Tiel nur ŝajnas, - diris la fabelisto. Okuloj tiel facile ne forlasas el kavetoj sub la frunto, kien ilin lokigis la plej amata Dio.

- Sed tamen tiuj estas vitraj okuloj. Ĉu la Dio en kavetoj sub la frunto de mia patro metis vitrajn okulojn?

- Tiuj ne estas vitraj okuloj, ŝafideto mia. Tiuj estas okuloj de senkonscia homo.

- Kaj kie estas lia konscio?

- Lian konscion turkoj forpelis. Sed pro tio ne malkvietigu. Frumatene la plej amata Dio redonacos konscion.

Dum sekvonta mateno mia patro, pendumita per ŝnuro, plu ne balanciĝis. Ĉar antaŭ aŭroro kelkaj uniformuloj venis lian kelon, malsuprenigis lin kaj portis kuŝigis sur bartmato, sternita sub kradula fenestro. Momente ili staris tie, rigardis lin kaj nenion diris. Poste venis homo kun civitana vestaĵo kaj ruĝa feso. Tiu estis la kajmakamo. Uniformuloj atentostreĉis kaj salutis lin.

- Tiu armeno similas mortaĉintan ŝafidon, forĵetitan sub meztaga brulanta suno, - diris la kajmakamo. - En tiu ĉi stato, li ne eblas sin prezenti en oficejo de la mjudio.

- Estas ĝuste, kajmakamo bejo, - diris unu el uniformuloj.

- Ĉar li devas enketiĝi. Tiu ĉi homo estas danĝera spiono, kaj lia konfeseo estas tro grava.

- Sed unue ni devas lin lavi.

- Ĉiuj armenoj estas malpuraj, - diris la kajmakamo, - ĉar ili ĉiutage kvin foje ne lavas sin, kiel testamentas la profeto. Ili estas tiom malpuraj, kiom porkaĵo, kiun manĝaĉadas.

- Jes, kajmakamo bejo.

- Kaj tamen bezonas lin purigi. Sed li unue devos vekiĝi.

- Jes, kajmakamo bejo.

- Ĉu Vi pensas, li vekiĝos?

- Ankoraŭ ne klare, kajmakamo bejo.

- Se li ne mortaĉos, - diris la kajmakamo, - kaj vekiĝos, iomete nutru lin. Donu bonan matenmanĝon kaj tagmanĝon. Post tagmanĝo li kapablos por enketeco.

- Jes, kajmakamo bejo.

- Li ankaŭ devos havi humoron.

- Kiel Vi imagas tion?
- Bonigu lian humoron!
- Kaj kion ni devos fari por tio?
- Por matenmanĝo alportu armenan panon – lavaŝon. Tio lin feliĉigos.

- Ĉu Vi pensas?

- Mi estas konvinkita.

- Kaj kion ni devos doni por tagmanĝo?

- Kion armenoj manĝadas dum festtagoj, armenan nacian manĝaĵon. Tio nomiĝas **harisa**. Humoro de armeno aŭtomate boniĝas, kiam oni proksimigas al lia nazo tion fimanĝaĵon, preparitan kun greno kaj viando.

- Sed kajmakamo bejo, kiel ni povas ĉi tie en malliberujo kuiri armenan nacian manĝaĵon? Pri tia manĝaĵo mi jam aŭdis kaj scias, ke bezonas tion kuiri dum tuta tago, poste – kirli.

- Vere, - diris la kajmakamo.

- Certe eblas tion mendi en armena mahalo. Sed tio estas malfacile.

- Faru, kion vi povas, - diris la kajmakamo.

- Ĉion, kion mi vidas, - diris la Lasta Penso al la fabelisto, - mi vidas rimede viaj okuloj. Kaj ĉion mi aŭdas, aŭdas rimede viaj oreloj. Sed ĉu okuloj kaj oreloj de la fabelisto mensogas, kiel mensogas lia lango? Kaj kial vi rakontas al mi malĝustajn rakontaĵojn? malgraŭ mi certe scias, ke vi dezirus rakonti ĝustecon.

- Ĉar mi estas fabelisto, - diris la fabelisto, - **kaj ĉar ĝustecon mi rakontas alimaniere.**

Kaj la fabelisto diris:

- Nomu min Meddah!

- Diru al mi, Meddah. Ĉu vere mia patro akceptis “kaŭĉuktubon” de la zaptiĥo?

- Lia buŝo rezistis, ŝafideto mia. Vi vidis tion. Ankaŭ rezistis lia gorĝo. Ankaŭ la ezofago. Jes, eĉ la stomako. Sed li devos akcepti “kaŭĉuktubon”. Kaj tamen via patro nenion perceptis, ŝafideto mia, ĉar dum tuta tempo estis en senkonscia stato.

- Do, ĉu li nenion sciis?
- Certe, ŝafideto mia. Tio ŝajnas, kiel sonĝo. Poste li vekigis kaj laŭte ekkrios.
- Kaj kiel okazis tio ombroludo? Komence mi vidis du homsiluetojn, sed poste vidis vesperton.
- Ĉu vere vi vidis vesperton?
- Jes, Meddah.
- Tio estis paro de siluetoj, kiuj kiel ombroj unuigis. Ili similis vesperton. Kaj la vesperto ekkomencis skuiĝi, kiam la “kaŭĉuktubo” de la zaptiĥo ekkomencis skuiĝi, kaj la posteulo de la unupiedula Hasan profunde ŝprucigis en la gorĝo de via patro, kaj via patro ree vomis.

- Kiam oni malsuprenigis lin, - diris la fabelisto, - kaj kuŝigis sur la bastmato, via patro profunde dormis. Nur tagmeze, kiam la dormo malprofundiĝis, li ekkomencis vidi iajn sonĝojn, en duondorma stato li laŭte kriis kaj pro tio vekigis.

3.

- Post tagmanĝo la gardistoj tuj portis vian patron el kelo. Ili lin lavis kaj purigis. Aldonis novan vestaĵon. Poste lin alportis frue purigitan alian kelon.
- Ĉu oni donis al li matenmanĝon?
- Jes.
- Kaj ĉu lavaŝon – armenan perfektan panon, kaj pli malfrue harisaon – armenan nacian manĝaĵon, ricevis li?
- Certe ne, ŝafideto mia. Al li donis kutiman ekmekon, similan flanon surŝmiritan je la vinbera suko (mosto), teon kun abundaj specioj, kaj pli malfrue – ŝafaĵon kaj fabon.
- Via patro estis fortika homo, - diris la fabelisto. Pli malfrue, post tagmanĝo li estis jam preta por enketeco, t.e. lia konscio ree estis klara. Liajn piedojn oni ĉenligis, malgraŭ multaj zaptiĥoj gardis lin, kaj neniel li povas forkuri, kaj ili portis lin tra la granda korto de malliberejo kaj eligis tra la pordego de malnova murzono.
- Ĉu al la hjukjumeto?
- Ĝuste tiel. Tien, kie troviĝis oficejo de la mjudiro.

- Ŝafideto mia, mi jam rakontis al vi pri oficejo de la mjudio kaj donis eblecon aŭskulti interparolon de sinjoroj, hieraŭ – posttagmanĝe, ĉu vi memoras? La sinjoroj – ĉiuj estis eminentuloj, fumadis siajn cigaredojn kaj interparolis ankaŭ pri kapo de via patro – ĉu fortranĉi aŭ ne? Nu, mi ne priskribis la oficejon, ĉar mi ne volis enuigi vin. Ne gravas kio estas en ĉambro, gravas kiuj estas tie. Ĉifoje ĉeestis la mjudio kaj via patro. Sed mi devas diri al vi, ke la unuokula mjudio havis okcidentan adepton, estis fervore dediĉita homo al junturkoj kaj de iliaj **Ittihad ve teraki** – Komitato Unuiĝeco kaj Avangardeco. Pro tio en lia oficejo estis du veraj seĝoj kaj unu larĝa skribtablo, tamen tio estis io eksordinara por turka oficiala oficejo. Certe estis tie ankaŭ kanapo kaj sur planko – ŝafelaj irtapiŝoj kaj eĉ unu manlabora mallonga tapiŝeto. Sur muroj penditis antikva sabro, portreto de sultano, aforismoj el Korano kaj certe la afiŝo kun bildo de militministro Enver paŝao. Kiel vi vidas, Enver paŝao sidiĝis sur ĉevalo en verda-bruna belega uniformo kaj fela ĉapo. Vizaĝo de Enver estas delikata, kian havas fraŭlinoj, liaj maldikaj lipharoj povas esti surgluitaj. Liaj manoj, firme tenataj bridon de ĉevalo, lasas kvietan impreson, kaj maldikaj longaj fingroj povis aparteni je pianisto. Simpatia homo, homo kun impresia vizaĝo kaj sentemaj manoj. Kaj li mem estas ekzekutisto de armenoj.

Zaptiĥoj, laŭ ordono, fordonis vian patron al la mjudio. Nun ili staras kontraŭe – la mjudio kaj via patro. La mjudio estas ĝentila. Lia vitra okulo rigardas rekte vizaĝon de via patro. Per mano li faras invitan movon kaj diris:

- Bonvolu sidiĝu, efendio.

Post tio la tria homo venas en oficejon. Tiu estis **baŝ-kjatib** – la supera skribisto.

- Vi miros, ŝafideto mia, kial baŝ-kjatibo ne estas en eŭropa vestaĵo, kiel multaj samideanoj de junturkoj, kaj ne havas sur kapo kutiman ruĝan feson, decantan lian staton. Nu li, kiel vi vidas, jam estas maljuna, iomete malnovstila kaj nun ne povas disiĝi de sia larĝa pantalonon kaj kaftanvida supervestaĵo, de tiu pura vestaĵo, kovranta malpuran tolaĵon... Kaj nek de verda ligilula blanka turbano de kredegula mohametano. La baŝ-kjatibo havis korbeton, kun ĉiuj

necesaĵoj (granda kutima inkujo kun oficiala violkolora inko, istanbula skribilo, spongo, faruno – por sekigi aŭ forviŝi skribitan ion, kaj certe dokumentoj de via patro). Krom tio li havis kvarangulan tabuleton sub akcelo. La baŝ-kjatibo ne maltrankviliĝis trovi trian seĝon, unue – ĉar ne estis, due – li kutimis sidi falpiede sur planko. Li sidiĝis, submetante kusenon, kaj alian metis malantaŭ dorso, apogis je kanapo, sur genuoj metis kvarangulan tabuleton, sur tio metis inkujon kun violkolora inko, istanbultan skribilon kaj sekigan polvon, kaj certe, apud ĝi dokumentojn de via patro.

Aĝon de via patro ne bezonas sekretigi. Mi povas vidi, ŝafideto mia, kial la baŝ-kjatibo per violkolora inko klare registris la numeralon 1878 en dokumentoj de via patro, kaj tiel mi komprenis, ke via patro estas 37 jara, ĉar tiel estas registrata en dokumentoj: Vardan Ĥatisjan, naskita en 1878j. en vilaĝo Jedi Suo de vilajeto Bekiro, akuzita en spioneco kaj ŝtata perfideco.

Jes, ŝafideto mia, tiel estas skribita. Kaj se oni pensas, ke li ne havas spionan eksteriĝon, do kiu povas definite diri, kian eksteriĝon havas vera spiono? Kaj rilate vian patron, ŝafideto mia, mi devos diri, ke li havas tipan montanan armenan eksteriĝon.

Li havas altan, maldikan korpostrukturon, haroj kaj haŭto estas malhela, malgraŭ ĉimomente lia vizaĝo estas preskaŭ flava, sed estas tiel pro mallibereja kelksemajna vivado. La mentono kaj la aglonazo havas tian aspekton, kvazaŭ volas ŝiriĝi, forflugi tien, kie montoj estas pli altaj, aero – pli pura, tien, kie kapo de homo tuŝas je la nuboj kaj kie la vento murmuris alimaniere, ol en malsupra valo de turkaj grandaj termastroj – **dere bejoj**. Via patro havas belajn, preskaŭ delikatajn manojn. Sed ĉu mi povas manoj de via patro kompari kun manoj de buĉisto? Ne, ŝafideto mia. Tion mi ne faros. Kaj pro tio mi nun diras al vi:

- Via patro havas sentemajn manojn, sed tiuj absolute estas aliaj, ol manoj de Enver paŝao. La manoj de via patro estas plagaj kaj suferitaj, ĉar ili ankaŭ havas esprimon, kiel okuloj. Kaj momente ni komparu okulojn de via patro kun vitra okulo de la mjudio. Tiuj okuloj nenian esprimon havas. Sed ne trompu vin, ŝafideto mia. Ja vi vidis patrajn okulojn antaŭ lia veno en ĉi tiun malliberejon.

- La okuloj de armenoj estas pasiaj, malicaj, ruzaj, nesatigeblaj, friponaj, ĝuste kiel hebreaĵoj kaj grekaĵoj. Tiu ĉi tri popoloj enkarnigas malbonecon de mondo.

Nu, ŝafideto mia. Tion ne mi diris. Tion diris la valio de Bekiro. Kaj ankaŭ suplementis:

- Plej multe min kolerigas okuloj de la armenoj. Kaj se alia kaŭzo ne estus buĉadi ilin, okuloj de armenoj sufiĉas.

Mi ĝoje demandos de Bekira valio:

- Diru, valio bejo, ĉu iam Vi vidis armenajn okulojn, kiam la armeno karesas sian infanon?

Kaj la valio nepre diros:

- Ne, tio mi ankoraŭ ne vidis.

- Kiam Vi rigardis en okuloj de tiuj homoj?

- Vere nur dum interŝanĝo de monoj kaj kiam jukas mia vosto.

Kaj mi diras al valio:

- Valio bejo, kiam Vi rigardas en okuloj de armenoj, poste rigardu en propraj okuloj.

Kaj mi vidas, kiel paliĝas la valio.

Li diras:

- Ĉu en miaj propraj okuloj?

Kaj mi diras:

- En Viaj propraj okuloj.

Mi vidas krucon, ŝafideto mia. Kaj de kruco pendiĝas ne Jesuo Kristo, sed la armena okulo. Ĝin turko najlbatis sur la kruco.

Estas posttagmanĝa malfrua tempo, ŝafideto mia. La suno ĵetis rigardon en mjudiran oficejon. Ĝi okultikas mjudiron, kaj tio incitas la vitran okulon de la mjudiro. Li frotis okulon, poste purigis nazon. Kaj la sultano de sia portreto kaj Enver paŝao de sia aŝiŝo mokante, stimolante... okultikis lin... eĉ aforismoj el Korano, penditaj super la portretoj, ridetis kaj okultikis. Unu okulo de la mjudiro rigardis vian patron, kaj la alia – strabis sur aforismoj, kvazaŭ antaŭe la mjudiro neniam vidis arabajn literojn. Ĉu vi aŭskultas, ŝafideto mia, kiel la mjudiro konvinkas vian patron? Tio estas longa monologo, kaj via patro

aŭskultas kaj kapjesas. Simple estas mirinda, kia bonrespekta estas parolado de la mjudio. Li demandas vian patron, ĉu li bone dormis? Ĉu pajla matraco estas plena je urino kaj fekaĵo, ekskrementitaj de antaŭestintoj? Li eksplikas, ke tiu dolora aperaĵo kun malpuraj pajlaj matracoj estas malmulteco de pajlo ĉimomente, ĉar estas milito, sed pajlo ne sufiĉas pro turka kavalerio, kiu estas la bonega en tuta mondo, ĉar turko estas kuraĝa soldato, liaj ĉevaloj, kion fari, manĝegas pajlon.

La mjudio informiĝis pri liaj dentoj, mi pensas pri stato de dentoj de via patro. Liaj dentoj oni ne fortiris, ĉi tie oni kondukis humane. Kaj kiel fartas lia gorĝo, ezofago kaj stomako? Ĉu li sentis, kiel oni noktmeze malplenigis lian stomakon? Kaj ĝenerale ĉu iel ekrigardis li ion? Ne. Via patro nenion ekrigardis. Ĉar li estis kuŝinta aŭ pendumita per ŝnuro kapmalsupren, tute perdinte konscion. Aŭ ĉu eble li vidis en sonĝo, - demandis la mjudio, - longan "kaŭĉuktubon", komence etan, malfortan, sed kiu grade grandiĝis kaj firmiĝis? kaj ĉu, - demandis la mjudio, - scias via patro, kiu estas unupiedula Hasan kaj lia ĉevalvizaĝa filo. Ĉu li scias unupiedulan Hasan – la saman baŝibozukon kaj buĉiston de 1876j., kaj lian posteulon, kiu de tempo al tempo injektas en stomakoj de senkreduloj. Via patro nenion komprenis, nur kapjesis kaj per vitriĝita rigardo lacinte aŭdis.

Finfine la mjudio diris:

- Ni jam multfoje enketis Vin, efendio... la valio kaj mi... ni ĉiu siamaniere kaj ni ree provas ankoraŭ. Sed ĉi tio estas via lasta ebleco.

La mjudio per maldekstra mano signifaris al supera skribisto, t.e. la mjudio nur senvideble altis manon, sed la supera skribisto dum multjaraj bone sciante ĉiujn movojn de la mjudio, tuj komprenis lin: li metis sur planko tabuleton kun skribtaŭgaĵoj, staris, prenis la mjudiran nargileon – Erzurman modernan akvopipon, metitan ĉe la kanapo, alportis ĉe la skribtablo tubon kun fumrandingo, proksimigis al la mjudio, brulis ĝin kaj revenis sian lokon, sidiĝis sur kuseno antaŭ kanapo, prenis kaj metis sur genuoj tabuleton kun dokumentoj de via patro, inkujon, istanbultan skribilon, spongon kaj sorbantan farunpolvon; denove ordigis ĉiujn, ankaŭ parajn kusenojn, unu el kiuj estis sub si, la alia – malantaŭ dorso.

lomtempe la mjudio silente fumis. Poste diris:

- Tio vere estas Via lasta ebleco, efendio. Estus pli bone, se ni ekkomencos de komenco..., kiel ĝis nunaj ĉiuj enketecoj, kiuj kondukis ne la valio, sed mi... Kvankam tiu estas enuiga, sed mi konsentas. Mi pensas: ĉiam necesas refoje komenci de komenco. Kaj ni, tamen, faras tiel. Denove ni komencas de komenco, eĉ de plej komenco.

- Do, Via nomo estas Vardan Ĥatisjan, - diris la mjudio. - Ĉu estas ĝuste?

- Estas ĝuste, - diris via patro.

- Kaj Vi devenas de armena vilaĝo, ĉu kie vivas nur unu turko?

- Unu turka familio.

- Kaj ĉu ĉiuj aliaj estas armenoj?

- Jes, mjudio bejo.

- Ĉu tie ankaŭ estas la preĝejo?

- Jes, mjudio bejo, la preĝejo estas nomita Sankta Sargis.

- Ĉu la preĝejo ankoraŭ estas kompleta?

- Estas kompleta.

- Kaj kion Vi diros pri armenoj?

- Ili ankaŭ estas tie, tamen ilia grandparto.

- Kaj ĉu turka familio ankaŭ?

- Ĝi ankaŭ. En mia vilaĝo apenaŭ io ŝanĝiĝis.

- Do, Vi devenas de armena vilaĝo, kun armena grandparto, kie ĉu iuj devigas kelkajn turkojn viziti armenan preĝejon?

- Ne, mjudio bejo. Neniu devigas iun turkon viziti preĝejon.

- Sed armenoj sugestas tiujn turkojn, ke Alaho havas filon, kvankam en Korano estas dirita: La Alaho ne naskas kaj ne naskiĝas.

- Armenoj neniu sugestas tion, mjudio bejo. Ili vivas enfermiĝeme, kaj ĝojas, se oni lasas ilin trankvile vivi.

- Sed kial estas tiuj malĝustaj historioj? Ĉu ne armenoj de Jedi Suo rakontas al ĉiu preterpasinta fremdulo, ke tiu ĉi vilaĝo estas tipa por tuta Turkio, kaj en Turkio plu ne estas turkoj, reale estas nur armenoj?

- Ne, mjudio bejo. Kiel povas armenoj de Jedi Suo rakonti tion? Neniu kredos tion.

- Sed ili rakontas, ke tiu ĉi lando iam apartenis al ili.

- Mi ne scias tion, mjudiro bejo. Tiu ne estas ĝuste. Tuta lando neniam apartenas al ili, nur parto de ĝi apartenis.

- Do, parto de lando.

- Jes. Sed tio estas historio, mjudiro bejo. Tio estis tre delonge.

- La armenoj estas popolo de komercistoj kaj friponuloj. Bonadoraj turkoj estas sendefendaj antaŭ iliaj memvolecoj.

- Mia patro estas vilaĝano, mjudiro bejo. Grandparto de armenoj estas simplaj vilaĝanoj.

- Kaj kion faras armenaj komercistoj en grandaj urboj?

- Tion mi ne scias, mjudiro bejo.

- Kaj kion Vi diros pri la turka familio en Via vilaĝo? Ĉu verŝajne Vi provis eksterigi el Via vilaĝo?

- Ne, mjudiro bejo. Ili estas najbaroj de mia familio kaj niaj amikoj.

- Ĉu amikoj?

- Jes, mjudiro bejo. Neniam ia disputo estis inter ni, kiom mi memoras. Ni ĉiam helpis reciproke. Foje (en senrikolta jaro) mia patro prunte donis al tiuj turkoj grenon. Ni ankaŭ donis al ili kelkajn sakojn da farunojn kaj legomaĵojn.

- Ĉu aliaj ankaŭ aldonis Vi?

- Jes, mjudiro bejo. Unu potegon da tano, pataton kaj harisaon.

- Kion signifas tio, efendio?

- La tanon oni preparas de macuno – armena jogurto, estas la sama turka ajrano. Sed gusto de tano iomete estas alia, ĉar mia patrino iajn speciojn miksadis, sekreton de kiu mi ne scias. Nia tano estis iomete dolĝusta, ĉar mia patrino malmultan mielon miksadis kun ĝi.

- Ĉu tia armena magia trinkaĵo estas tano?

- Mi ne scias, mjudiro bejo.

- Kaj kio estas la patato?

- Estas la sama turka zarmao. En kutima brasfolio envolvita viando, rizo kaj blghuro. Kaj iomete legomoj. Ni nomas tion la patato, sed kredu min, mjudiro bejo, ke tio estas la sama turka zarmao.

- Kaj kio estas la harisao?

- Tio estas armena nacia manĝaĵo.

- Ĉu en tio estas porkviando?

- Ne, mjudio bejo. Tio prepariĝas kun la ŝafaĵo aŭ kokaĵo.
- Kaj Viaj turkaj najbaroj ĉu manĝis tion fimanĝaĵon?
- Tio ne estas fimanĝaĵo, mjudio bejo. Tio estas la vera harisao.
- Ĉu en ĝi ne estas porkaĵo?
- Ne, mjudio bejo.

La mjudio ree faris signeton al la supera skribisto. Ĉifoje la mjudio nur iomete turnis kapon al supera skribisto, palpebrumis vitran okulon, kaj la supera skribisto tuj sciis, kion volas sia mastro. Li tusetis, foliumis dokumentojn kaj legis: Vardan Ĥatisjan, okupado – vilaĝano, suplementaj okupadoj – vendisto de sekaj sterkoj – tecekoj, kaj verkisto.

- Ĉu estas ĝuste? - demandis la mjudio.
- Estas ĝuste, - diris via patro.
- Ĉu Vi povas ekspliki min pli klare?

- Mi povas, - diris via patro. Kaj unuan fojon li ridetis, iomete revivis rigardo de vitritaj okuloj de via patro. - Ni – infanoj, sur kampoj devis helpi plenaĝulojn, - diris via patro, - kaj pro tio ĉiu el ni estis kamparano, sendepende tio plaĉas al ni, aŭ ne. Kun ĉiuj laboroj, kiun ni devis plenumi, ni faris ankoraŭ aliajn aferojn. Ni devis melki ŝafinojn, bovinojn kaj kaprinojn.

- Ĉu Vi eĉ havis azenon?
- Jes, mjudio bejo.
- Kaj ĉu tiu ankaŭ melkiĝis?
- Jes, mjudio bejo.
- Sed neniu povas melki azenon.
- Estas ĝuste, mjudio bejo.
- Eble ĉu Vi pensas, ke mi estas stulta?
- Ne, mjudio bejo.
- Do ĉu ĝi estis azenino?
- Jes, mjudio bejo.
- Kaj kia estas afero kun teceko?

- Vi demandis pri seka sterko. Ni – armenoj, tion nomas **atar** aŭ seka **trik**, sed en nia landparto ni uzas turkan vorton – tecekon. Ĝi estas tro utila, kiel brulaĵo.

- La teceko, - diris la mjudio, - Vi verŝajne pensas, ke mi ne scias kio estas ĝi. Tio estas gebova kutima ekskremento.

- Nu, mjudiro bejo. Certe, tiel. Riĉuloj brulas lignon, kaj malriĉuloj – ataron aŭ tecekon.

- Ĉu ne estas riĉuloj brulantaj gebovan sekan trikon?

- Eĉ estas multaj, mjudiro bejo. Estas homoj tre riĉaj, sed tre ŝparemaj. Kaj en tiu ĉi landparto ligno estas rara kaj tre multkosta.

- Ĉu estas pli multkosta ol la teceko?

- Vere teceko nenion kostas kaj ricevas valoron, kiam ĝin oni aĉetas de vendisto.

- Ekzemple, de iu armeno.

- Eblas, mjudiro bejo.

- Kiuj scias, kiel fari monojn eĉ de gebova triko.

- Jes, mjudiro bejo.

- Ankoraŭ junaĝa mi komencis tecekan komercon, kaj ĝi en sakoj tiradis al Bekiro, ĉar tie oni pagis pli multe por tio, ol en najbaraj vilaĝoj, kie vilaĝanaj infanoj mem kolektas gebovajn trikojn, kaj vilaĝanoj multe da ĝin havas. Kelkjare mi okupiĝis pri vendado de tio. Poste mi eksmigris.

- Ĉu al Ameriko?

- Al Ameriko.

- Estas ĝuste, - diris la supera skribisto. - Ĉiu estas en liaj dokumentoj. Vi estu konvinkita, mjudiro bejo. Ĉiu estas klare protokolita.

- Jes, - diris la mjudiro.

- Vardan Ĥatisjan, - diris la supera skribisto, - naskita en 1878j., vilaĝano, vendisto de gebova triko kaj verkisto. En 1898j. eksmigris al Ameriko.

- Sed iomete antaŭ Vi legis alimaniere, - diris la mjudiro.

- Tiun ĉi frazon mi multfoje skribis, - diris la supera skribisto.

- Ĉu kiel stilan ekzercan variaĵon? - demandis la mjudiro.

- Jes, - diris la supera skribisto.

- Sed vilaĝano, kiu suplemente okupiĝas kun komerco, kiel vendisto de triko, kiel iĝas verkiston?

- Mi ne scias, mjudiro bejo.
- Ĉu tiu ankaŭ estas armena friponeco?
- Ne, mjudiro bejo.
- Do, Vi en 1898 eksmigris al Ameriko.
- Jes, mjudiro bejo.
- Ĉu rapide riĉiĝi, kiel supozas mi? Ĉu vendi al amerikanoj trikon, kiel ĉi tie – en Turkio, al turkoj Vi vendadis?
- Ne, mjudiro bejo.
- Do kial Vi eksmigris?
- Ĉar tie mi havas onklon, kiu sendis por mi vojelspezon. Temas pri frato de mia patro – Nahapet. Pli ĝuste – pri Nahapet Ĥatisjan.
- Mi supozas, ke li ankaŭ estas komercisto.
- Jes, mjudiro bejo. Li ankaŭ estas komercisto.
- Verŝajne, ĉu li ankaŭ vendas gebovan trikon?
- Ne, mjudiro bejo.
- Kaj kial?
- Amerikanoj tecekon ne brulas.
- Ĉu en Ameriko ne estas gebovoj?
- Kial ne, estas multe da ili.
- Sed en Ameriko ĉu verŝajne gebovoj fekas ormonojn?
- Ne, mjudiro bejo.
- Sekve, ĉu via onklo ne okupiĝas pri vendado de gebova triko?
- Ĝuste tiel.
- Kaj pri kio li okupiĝas?
- Pri vendado de ĉifonaĵoj.
- Do, ĉu li estas ĉifonvendisto?
- Jes.

- Ĉu ĉiuj armenoj en Ameriko estas ĉifonvendistoj?
- Ne, mjudiro bejo.
- Kaj kion faras armenoj en Ameriko?
- Ĝuste mi ne scias, mjudiro bejo. Sed mi pensas ili faras kion ĉiuj aliaj homoj. Iuj estas komercistoj, aliaj – metiistoj. Multoj laboras en uzinoj, aŭ okupiĝas pri aliaĵoj. Tie mi havas aliajn geparencojn.

Frato de mia patrino estas tajloro, la alia – veturigisto, kaj kuzo de mia patrino estas ĉapelkudristo.

- Vi naskiĝis en 1878. Ĉu en 1898 Vi estis dudekjaraĝa?

- Mi estis dudekjaraĝa.

- Ĉu tiam Vi estis fraŭlo?

- Estis fraŭlo.

- Viajn dokumentojn mi scias parkere, - diris la mjudio. - Kaj nun mi trovis Vian falson. Ĉar tiam Vi estis edziĝita.

La supera skribisto tusetis, kaj la mjudio rigardis lin.

- Ĉu eble ne estas ĝuste, baŝ-kjatibo agao?

- Li estis fraŭlo, - diris la supera skribisto.

- Sed tio ne konvenas al realeco, - diris la mjudio.

- Li en dekkvinjara aĝo jam estis edziĝita, - diris la supera skribisto, - kiel estas akceptita en multaj tiuj regresemaj vilaĝoj. Lia edzino jam en unua jaro mortis pro akuŝado, kaj li en deksejaro jam estis fraŭlo. Post kvar jaroj li eksmigris.

- Ĉu al Ameriko?

- Al Ameriko, - diris la supera skribisto.

- Kaj kion faris dudekjaraĝa trikvendisto en Ameriko...? - demandis la mjudio al homo, kiu estis ankaŭ vilaĝano kaj ankaŭ verkisto, kiel insistis malliberulo.

- Nokte mi vizitis lernejon lerni fremdan lingvon kaj ricevi lernejan klerecon.

- Ĉu ĉiuj amerikanoj nokte vizitas lernejon, anstataŭ tage, kiel normalaj homoj?

- Ne ĉiuj, mjudio bejo. Nur kiuj tage ie laboras, aŭ jam ian klerecon havas.

- Ĉu Vi ne estis tre aĝula viziti lernejon?

- Multoj estis eldaj ol mi, mjudio bejo. Multoj estis edziĝitaj, havis edzinon kaj infanojn.

- Ĉu edziĝita, Vi diris?

- Jes, mjudio bejo.

- Kaj ne eksedziĝita aŭ vidviĝita?

- Vere multoj estis edziĝitaj.

- Sed tio verŝajne ne povas esti vere, ĉu ne? Ĉar kiam devos analogo amerikano levigi sur sia edzino, se li nokte vizitas lernejon?

- Mi ne scias, mjudiro bejo.

- Kaj kion faris Vi tage?

- Tage mi laboris.

La mjudiro ree rigardis la superan skribiston.

- Ĉu vere?

- Vere, mjudiro bejo. Tage li estis purigisto de io strato, ne havanta nomon.

- Tiel ne povas esti, - diris la mjudiro. - Ĉar ĉia strato havas nomon.

- Tie stratoj havas numerojn, - diris Vardan Ĥatisjan.

- Ĉu numerojn? - demandis la mjudiro.

- Jes, numerojn, - respondis Vardan Ĥatisjan.

- La stratoj havas numerojn, - diris via patro, - kaj stratpurigistoj ankaŭ havis numerojn, kvankam numerojn ni ne portis sur niaj brustoj aŭ ne kudris sur vestaĵoj, aŭ alie. Ni nur memoris ĝin. Kaj homoj sur stratoj similas unu alian, kvankam ili estis nigraj, kaj aliaj blankaj. Kaj ili iamaniere estis numeroj.

- Tiele, ĉu en tia amerika urbo estis nur numeroj?

- Al mi ŝajnis tiel, - diris via patro, - tamen dum unuaj monatoj en Ameriko. Poste plu ne ŝajnis tiel al mi, ĉar homo al kutimiĝas je ĉio.

- Kaj kion signifas tio? - demandis la mjudiro.

- Kiom longe mi vivis tie, tiom pli al kutimiĝis je numeroj. Post tempo numeroj ricevis vizaĝojn kaj mi povis klare diversi tiujn.

- Ĉu Vi volas min tute stultigi?

- Ne, mjudiro bejo.

- Ĉu homoj denove havis vizaĝojn?

- Jes, mjudiro bejo.

- Kaj ĉu numeritaj stratoj ankaŭ?

- Ili ankaŭ, mjudiro bejo.

- Armena purigisto en amerika urbo, - diris mjudiro, - homo, kiel ĉiuj armenoj trompas kaj se ne povis vendi al amerikanoj trikon, ĉar ĉu amerikanoj ne estis turkoj?

- Mi ne scias, mjudiro bejo.
- Kaj ĉu Vi volas persvadi min, ke dum dek ses jaroj Vi estis stratpurigisto ĝis Via reveno al Turkio?
- Ne, mjudiro bejo. Poste mi faris ĉion eblan. Mi laboris en uzinoj, restoracioj, ankaŭ estis ŝarĝisto.
- Do, ĉu Vi estis ankaŭ ŝarĝisto?
- Jes.
- Ĉu kutima hamalo?
- Jes, mjudiro bejo.
- Kaj kio Vi ankaŭ estis?
- Estis nokta gardisto.
- Ĉu nokta gardisto?
- Jes.
- Kaj kie, efendio?
- En unu nubskrapulo.
- Kion signifas nubskrapulo? - demandis la mjudiro.
- Tio estas konstruaĵo, havanta eksteraĵon, kvazaŭ ĉiuminute falruiniĝos, - diris via patro. - Ĉar estas konstruita ne plata, kiel ĉe ni... aŭ kvarangula... sed estas kiel ŝtonfariĝita monumento, fundamento de kiu estas en tero, sed kapo tuŝas nubojn. En ĝi kuregas liftoj. La pordoj de eniroj turniĝas rondforme, glutas homojn kaj ree forkraĉas: enirante tian konstruaĵon, ŝajnas, ke oni estas en bazaro.
- Sed tion mi ne komprenas, - diris la mjudiro.
- Malantaŭe tiaj turniĝantaj diablaj pordoj estas multaj institucioj, kiel en bazaro, sed tio estas diversa de ĉi tiaj bazaroj.
- Kaj kio estas sur etaĝoj super la bazaro.
- Estas oficejoj.
- Ĉu multaj oficejoj, preskaŭ kvin aŭ ses?
- Preskaŭ 500.
- Tiel ne povas esti, - diris la mjudiro.
- Tamen, estas tiel, - diris via patro.
- Kaj kion faras nokta gardisto en tia diabla konstruaĵo?
- Li ne faras multon, mjudiro bejo. Li povas kalkuli horojn ĝis aŭroro. Povas legi. Povas ankaŭ skribi versaĵojn.

- Ĉu versaĵojn?
- Jes, mjudio bejo.
- Ĉu Vi skribis versaĵojn?
- Jes, mjudio bejo.

- Ĉiu armena verkisto estas konspiranto, - diris la mjudio. - Nenio estas en lia kapo, krom inciti popolojn kontraŭ ni. Kaj mi supozas, ke Vi Viajn verkaĵojn publikis en armenaj mensogemaj ĵurnaloj, estantaj ĉie... Precipe en Ameriko... en armenaj emigrantaj ĵurnaloj, kiuj incitas kontraŭ ni kaj kompromitas nin. Mi estas ĝusta, ĉu ne?

- Ne, mjudio bejo.
- Kie Vi publikis Viajn verkaĵojn?
- Nenie, mjudio bejo.
- Verŝajne ili ne estas sufiĉe bonaj?
- Mi ne scias, mjudio bejo.
- Ĉu eble, neniu volis eldoni tiujn?
- Probable.

Nun rigardo de via patro reviviĝis. Ŝajnis, ke li unua foje vidas mjudiron, kaj rigardo de via patro penetras tra vitra okulo ĝis ĝia profundo. Poste via patro ree enfermiĝis, kaj lia voĉo sonis tre mallaŭte:

- Poeziaĵoj ne devas publikiĝi, - diris li al la mjudio.
- Sed kial, efendio?
- Ĉu Vi malfermos aperturon en Via brusto, por ke interesantoj rigardu Vian koron?
- Ne, efendio.
- Kaj ĉu Vi ĵetus sanktaĵojn al lupoj?
- Certe ne, efendio.
- Aŭ Viajn pensojn, ne koncernantajn al iuj, ĉu Vi ĵetus al babilemuloj?
- Same ne, efendio.

La mjudio ridetis. Lia unu okulo momente perceptplene rigardis vian patron. Poste ĝia esprimo ŝanĝiĝis kaj ŝajnis, ke la mjudio havas du vitrajn okulojn. Li diris:

- Finfine ni ekkomencu nian aferon, efendio.

Sed la mjudio ankoraŭ ne rapidis, ĉar subite ekstaris kiel homo, ne havantan tolerecon sidi trankvile kaj bezonanta moviĝi. Li paŝis al fenestro kaj malfermis ĝin. Ĉu estis hazardeco aŭ ne? Kiam li malfermis fenestron, tujmomente de ie aŭdiĝis mitrala pafado, kiu ŝokis mjudiron.

- Oni povas pensi, ke rusoj estas en urbo, - diris li al la supera skribisto.

- Sed en hieraŭa ĵurnalo estas skribita, ke rusoj estis frakasitaj.

- Ili ankoraŭ ne estas en urbo, - diris la supera skribisto. - Tiu estis turka armeano, verŝajne rekruto, dezirinta iomete pafi al ĉielo, montri al gapuloj, kiujn povas li mem fari.

- Ĉu Vi iam vidis mitralon?

- Ne.

- Ili estas germanaj.

La mjudio ridetis. Li staris antaŭ fenestro kaj rigardis korton. Nun super murzono aŭdiĝis krio de turmentato.

La mjudio fermis fenestron. Li malrapide proksimiĝis al skribtablo, ĉirkaŭpasis nargileon, puŝetis ĝin flanke, sidiĝis kontraŭ la malliberulo kaj faldis manojn sur brusto.

- Ni ekkomencu la aferon, - diris li. Lia vitra okulo larĝe malfermiĝis. La mjudio ree diris:

- Ni ekkomencu, efendio.

- Do, Vi dek ses jaroj estis en Ameriko kaj samtempe kun komenco de tutmonda milito Vi kvazaŭ spite, revenis Turkion. Ĉu tio ne estas iomete stranga?

- Mi deziris ree vidi miajn parencojn, - diris via patro, - deziris ree edziĝi.

- Kaj por Via reveno ĉu Vi ne trovis alian oportunan tempon, krom komenco de granda milito?

- Estas absoluta hazardeco, mjudio bejo.

- Reale kion Vi serĉas en Turkio? Kaj kio sendis Vin ĉi tien?

- Neniu, mjudio bejo.

- Kiu donis al Vi taskojn?

- Ne estas tia homo, mjudio bejo.

- Kial Vi mensogas, efendio?
- Mi diras ĝustecon.

- Antaŭ ĉio mi deziris edziĝi, - diris via patro. - Kaj volis trovi virinon en nia vilaĝo. Tio estis grava kaŭzo de mia reveno. Mi volis denove edziĝi kaj kun mia edzino veturi Amerikon.

- Ĉu verŝajne en Ameriko ne estas virinoj?

- Kial ne, mjudio bejo. Tie estas multe da virinoj. Sed ili estas aliaj.

- Kiel estas aliaj?

- Nu, mjudio bejo. Ili ne obeas al siaj edzoj. Ili pensas, ke estas memstaraj. Kaj ili siajn piedojn montras al ĉiuj.

- Ĉu kiel ĉe frankoj?

- Jes, mjudio bejo.

- Ĉiuj frankoj estas la samaj, - diris la mjudio, - la samaj estas germaninoj, francinoj aŭ italinoj. Ĉiuj frankoj estas senkreduloj, manĝaĉas porkviandon, kaj iliaj edzinoj ne obeas al edzoj kaj montras al ĉiuj siajn piedojn.

- Estas tiel, mjudio bejo.

- Kaj ĉu en Ameriko estas la sama?

- Tie estas pli malbone, mjudio bejo.

- Tiam vere estas tre malbone, - diris la mjudio.

- Jes, - diris via patro. - Estas malbone.

- Sed mi pensas, ke la afero de Via familio kaj edziĝo estas preteksto, - diris la mjudio, - kaj estas tute aliaj kaŭzoj, kiuj devigis Vin reveni patrujon antaŭtage de granda milito.

- Kiaj kaŭzoj, mjudio bejo?

- Vi bone scias, efendio. Kaj Vi scias pli multe, ol mi.

- Ni komencu de murdo de Aŭstria princo, - diris la mjudio. La princo kaj lia edzino mudiĝis en Sarajevo en 28 junio de 1914 jaro, okazaĵo, provokinta tutmondan militon. La mjudio ekridetaĉis. - Kiel okazis, efendio, ke Vi dum tiu tago... kvazaŭ spite, ĝuste dum la sama tago... estis en Sarajevo. Ĉu tio estas hazardeco?

- Nur hazardeco, mjudio bejo.

- Ĉu Vi konfesas, ke dum tiu tago Vi estis en Sarajevo? Ĉar ni vidis Vian pasporton kun Aŭstria vizo, kun duŝemajna loĝa permeso kaj longigeco de loĝa limtempo, krom tio – konfirmon de Sarajevo adresburo kaj registron en hotelo kun dato en 28 junio.

- Mi konfesas, mjudio bejo. Sed tio estas nur hazardeco. Mi venis Sarajevon, viziti mian onklon.

- Kiun onklon?

- Fratino de mia patro. Li nomiĝas Simon... Simon Ĥatisjan... mastro de kafejo.

- Ĉu li estas mastro de kafejo?

- Jes, mjudio bejo.

- Vi – armenoj, ĉie havas onklojn.

- Ni havas grandan familion, mjudio bejo.

- Kaj kion Vi petis de Via onklo?

- Nenion, mjudio bejo. Mia alia onklo, kiu estas en Ameriko, volis sendi monon al sia frato en Sarajevo... Kaj monon li donis al mi, por transdoni al onklo Simon... por ke ŝpari poŝtmandatan pagon.

- Kaj kial Vi vivis en hotelo?

- Nur dum unuaj tagoj, mjudio bejo. Mi ne volis maltrankvili ilin, sed venis mia onklo kaj forportis min el hotelo. Li alveturis en kaleŝo, ordonis kaleŝiston transloki miajn valizojn sen mia permeso. Vi bone scias, kiel okazas, ke oni ne povas rifuzi.

- Gastemo, ĉu ne, aŭ ĉu familia sento? Kiel dignas, ĉu ne?

- Jes, tiel, mjudio bejo. Ni – armenoj, estas gastemaj kaj parencaj. De tia vidpunkto ni similas turkojn. Kaj parencaj inviton ne povas rifuzi.

- Mi komprenas, - diris la mjudio. Kaj en murdo de Aŭstria princo ĉu Vi havis nenian partoprenon?

- Nenian, mjudio bejo.

- Ĉu ĉiaj estas eventualeco?

- Estas eventualeco, mjudio bejo.

- Kaj Vi eĉ ne vidis, kiel murdiĝis la princo?

- Ne, mjudio bejo. Mi ne vidis tion.

- Kaj ĉu eĉ pafadon Vi ne aŭdis?

- Kial ne, mjudiro bejo. Pafadon mi aŭdis. Ĉar ni estis sur strato. Ĉe ponto de rivero Kvajo, mjudiro bejo. Mi kaj mia onklo. Miloĵ da homoj kolektiĝis sur strato – vidi la princon kaj lian edzinon. Mi pensas, kiu havis okulojn estis tie. Ĉar similaĵon oni ne vidas ĉiutage.

- Estas ĝuste, - diris la mjudiro. La similaĵon oni ne vidas ĉiutage.
- Tio estis mondkoncerna evento.
- Jes, - diris la mjudiro. - Estis tiel.

- Tio povas esti eventualeco, - diris la mjudiro. - Sed ĉu ankaŭ estis eventualeco? ke en 25 de julio, ekzakte post unu monato, Vi revenis en Konstantinopolon, ekzakte, kiam pleniĝis unumonata limtempo de ultimato – prezentata de Aŭstrio al Serbio – en 23 de julio.

- Estas eventualeco, mjudiro bejo.
- Antaŭ tri tagoj de milito. Ĉu estas eventualeco, efendio?
- Ĉiuj estas eventualecoj, mjudiro bejo.

- Estas ĝuste, - diris via patro, - mi sufiĉe longe restis en Sarajevo kaj nur en 25 de julio atingis Konstantinopolon. Sed pro tio, ke mi malsanis.

- Kia malsano?

- Mi ĝuste ne scias. Tio similas veneran malsanon. Mi estis konvinkita, ke infektis de knabinoj, vagantaj ĉirkaŭ kafejo de mia onklo.

- T.e. ĉu de unu el prostituitinoj?

- Jes. Mi vere volis du-tri tagojn resti en Sarajevo. Sed post tio, mi ne kuraĝis veni hejmen.

- Ĉu Vi volas diri ne kuraĝis reveni Turkion, ĉe Viaj parencoj, ĉe Via fianĉino?

- Ĝuste tiel, mjudiro bejo. Unue mi volis kuraciĝi.

- Kaj ĉu Vi vere turmentis pro venera malsano?

- Ne, mjudiro bejo. Ĉio estis nur mia imageco.

- Kaj kiam Vi klaris ĝin?

- Post kelkaj semajnoj, kiam mi decidis viziti kuraciston. En fino de julio. Mi vizitis familian kuraciston de mia onklo. Li detale pririgardis min kaj diris: “Ĉio simple estas rezulto de imago”.

- Do, ĉu ree eventualeco? Kutima eventualeco kaj ĉu nenio alia? ke Vi prokrastis tutan monaton, kiam tuta mondo scias pri komenco de milito, nur Vi alveturis Konstantinopolon.

- Estas eventualeco.

- Kaj ĉu tio ankaŭ estas eventualeco, ke Vi tuj ne daŭrigis Vian vojon al profundo de lando – al Via familio?

- Nur eventualeco. Certe mi volis tuj daŭrigi mian vojon, sed pro longveturo miaj vestaĵoj estis malpuritaj. Kaj mi ne volis eniri hejmen malpura kaj senglada. Kaj vestaĵojn mi aldonis purigi.

- Kaj ĉu tio certe daŭris kelkajn tagojn?

- Ĝuste tiel.

- Kaj tiam, dum Vi atendis Viajn vestaĵojn, ĉu pli bonan aferon Vi ne trovis, ol promenadon tra Bosporo? Certe ĉu per ŝipo?

- Mi estis turisto, kaj kiel ne promeni per ŝipo?

- Kaj ĉu eventuale, ke ĉe Vi estis Via fotilo?

- Jes, estis ĝi ĉe mi.

- Cŭ Vi veturis ankaŭ Dardanelojn kaj atingis duoninsulon Galipolon?

- Tio estis kutima ŝipkruizo.

- Kaj ĉu tie Vi fotis? Ĉu antaŭtage de militekrulo? Mi supozas ĉu pro enuo?

- Pro forta enuo.

- Kvankam ĉu Vi sciis, ke estas milito?

- Ĉiu ion konjektis.

- Kaj certe ĉu Vi nenion sciis pri strategia signifeco de Dardaneloj kaj duoninsulo Galipolo?

- Pri tio mi nenion sciis.

- Ĉu Vi ne sciis ankaŭ, ke nia malamiko ĝuste tie volis alteriĝi, ĉar pensis, ke tie ni estas vundeblaj?

- De kie mi povas scii?

- Viajn fotojn ni trovis, efendio, kvankam ni ne scias, ĉu estas ĉiuj aŭ ne?

- Tiuj estas absolute senkulpaj fotoj.

- Vi fotis Bosporon, Oran Kornon, bordojn de Dardaneloj, fortikajn konstruaĵojn. Ankaŭ duoninsulon Galipolon.

- Ĉiuj estas senkulpaj fotoj, mjudiro bejo. Mi vere nenion konsideris. Ili estas kelkaj el multaj fotoj, kiujn mi fotis dum mia vojaĝo.

- Ĉu, por ke faru Vi bonan impreson sur Via fianĉino?

- Mi pensas, jes.

- Kaj ĉu sur Via familio?

- Jes, mjudiro bejo.

- Ĉiuj absolute estas senkulpaj, ĉu estas ĝuste?

- Jes, mjudiro bejo.

- Kaj ĉu post kelkaj tagoj, efendio? Kio okazis poste?

- Mi kolektis miajn valizojn – daŭrigi mian vojon. Ĝis tio komencis granda milito. Estis komenco de aŭgusto.

- Ĉe ni nenia milito estis, - diris la mjudiro. - En aŭgusto dume ne estis, kvankam en 3 de aŭgusto ni anoncis mobilizacian. Milito atingis nin pli malfrue.

- Novembre, - diris via patro.

- Novembre, - diris la mjudiro.

- Estas ĝuste, - diris la mjudiro. - Turkio ankoraŭ ne eniris militon. Kaj Vi, efendio, nenian havis malfacilaĵon atingi Bekiron, profunde de lando, kaj poste – vilaĝon Jedi Suon. Via amerika pasporto estis en kontentiga stato. Vi saĝe akiris ankoraŭ patrujan pasporton – **Teskere**, akceptitan ĉi tie. Teskere ankaŭ estis en kontentiga stato kaj eĉ poste, daŭrigante vojon...estis ĉiuj diversaj segiloj por ĉiu vilajeto. Vi pagis ĉiujn antaŭdestinajn impostojn. Kaj Vi venis hejmen, ĉe viaj parencoj. Ĉu Vi edziĝis kun Anahit Jeremjan – de unu el knabinoj de Via vilaĝo?

- Estas tiel, mjudiro bejo.

- Poste Vi faris malgrandan edziĝfestan vojaĝon al Sirio, ĉu Vi fotis deklivajn bordojn de Mezotera maro?

- Estas ĝuste, mjudiro bejo. Ĉiuj estas senkulpaj fotoj.

- Kaj poste ĉu Vi renkontis kun Pesak Muradjan?

- Kun li mi renkontis antaŭ tio. Li ĉeestis dum mia edziĝfesto. Li estas edzo de mia fratino Aghavni.

- T.e. ĉu li estas Via bofrato?

- Li estas mia bofrato.

- Li estas konspiranto. Ĉu Vi scias tion?

- Pri tio mi ne scias.

- Sed ni scias, - diris la mjudio. - Via bofrato akuzigas en ŝtata perfideco.

En okuloj de via patro aperis demanda signo, kiu respegulis en okuloj de mjudio: en sana okulo, kiu nun danĝere vibris kaj eĉ en vitra okulo respegulis.

- Via bofrato nenian depozicion donis, - diris la mjudio, - ĉar li malaperis... Se Vi informos al ni, kie li kaŝiĝis, tiam Via stato rimarkeble faciliĝos.

- Nenan nocion mi havas, - diris via patro.

- Nature, - diris la mjudio. - Oni antaŭ li malliberigis Vin.

- Estas tiel, - diris via patro.

- Kaj Vi ankaŭ ne scias, kie povis li sin kaŝi?

- De kien mi povas scii? - diris via patro.

- Vi ĝenerale nenion scias.

- Mi estas senkulpa, mjudio bejo.

- Diru al mi ĉion, kion Vi scias.

- Mi nenion scias, mjudio bejo.

- Sed Vi verŝajne ion aŭdis pri **oĥranka**?

- Pri tio mi ankaŭ nenion aŭdis.

- Tio estas nomo de rusa sekreta servado.

- Verŝajne. Mi ne scias.

- Homoj de oĥrankao laboras en dorsflanko de nia fronta linio. Ili grandparte estas rusarmenoj, kiujn rusoj forsendas en dorsflankon de limo kaj facile ili povas miksiĝi kun turkarmenoj. Antaŭe multoj da ili, ĝis transmigrado ĉe rusoj, vivis en turkaj regionoj, egale parolis turke kaj armene kaj ilin estas malfacile diversi de turkarmenoj. Malgraŭ ni tuttage klopodas kapti ilin kaj klari – kiuj ili estas. Ilin ni trovas inter vendistoj, metiistoj kaj eĉ vilaĝanoj.

- Pri tio mi nenion scias, mjudio bejo.

- Komence ni pensis, ke Vi estis forsendita de la oĥrankao. Poste ni mem diris, ke la oĥrankao siajn homojn forsendas tra la rus-turka

limo. Rusoj rezidentojn facile kaj sekrete trapasigas ĉi flankon. Kial ili devos maltrankviliĝi kaj Vin alsendi tra Ameriko?

- Jes, mjudiro bejo.

- Kaj ili forsendu ĝuste al Bosporo, Dardaneloj kaj duoninsulo Galipolo.

- Jes, mjudiro bejo.

- Kaj aŭ ĝuste al Bosnio – al ioma turka provinco, kiun aŭstrianoj okupis, kaj la ĉefurbo estas Sarajevo.

- Jes, mjudiro bejo.

- Vidu, efendio. Pro tio ni supozis, ke Vi laboras por amerikanoj, kvankam Ameriko estas neŭtrala, kaj ni ne komprenis, kial amerika prezidanto volas ĉi tie – ĉe ni organizi ribelon de armenoj?

- Mi nenion scias pri ribelo.

- Pro tio ni diris al ni, verŝajne Vi laboras por anglandoj kaj francanoj.

- Kiaj anglandoj kaj francanoj?

- Ĝuste por anglandoj kaj francanoj.

- Mi ĝenerale nenion komprenas, mjudiro bejo.

- Ĉio ŝajnas tro komplike, - diris la mjudiro. - Tamen komplikaĵoj ofte estas plej simplaj aĵoj.

- Jes, mjudiro bejo.

- Tio, certe, estas proverbo, kaj mi pensas, ke similajn frazojn Vi aŭskultadis.

- Jes, mjudiro bejo.

- Kaj malgraŭ ekzistas proverboj, kiuj estas tute ĝustaj.

- Eble, mjudiro bejo.

- Nu, vidu, efendio.

- Mi estas geniulo, - diris la mjudiro. - Nur pri tio oni ne scias en Konstantinopolo.

- Mi komprenas, mjudiro bejo.

- Mi ĉiam estis genia, nur neniu volis scii tion kaj neniu iam ekrigardis tion.

- Jes, mjudiro bejo.
- Mi havas pensojn.
- Jes, mjudiro bejo.
- Ĉu Vi kredas, ke mi havas pensojn?
- Jes, mjudiro bejo.

- Lasttempe mi diris al la valio de Bekiro: “Vardan Ĥatisjan nenian ĝeneralafiĝon havas kun oĥrankao, kun la rusa sekreta servado. Li estis sendita nek de Ameriko, nek de anglanoj, nek de francoj. Tiu Vardan Ĥatisjan estas agento de **armena tutmonda konspiro**”.

- Ĉu armena tutmonda konspiro?
- Jes, efendio.
- Pri tio mi neniam ion aŭdis.
- Kiel mi komprenas, Vi ĝenerale neniam ion aŭdis, ĉu estas vere, efendio?

- Ankoraŭ kiam mi studis en eksterlando, - diris la mjudiro, - renkontis certajn homojn, kiuj rakontis al mi pri surskriboj de “Saĝuloj de Siono”. Kaj parolis pri juda tutmonda konspiro. Kaj ĉu Vi scias, efendio? Mi mokis tiujn sinjorojn. Mi diris al ili: “Tiuj judoj estas senkulpaj aferemuloj. Kelkajn el ili mi konas el Zmjurnio, Istanbulo kaj Bekiro. Vi devos koni armenojn kaj grekojn vivantaj ĉe ni”. Kaj poste, kiam mi revenis Turkion, mi ofte pensis pri tiuj sinjoroj kaj iliaj interparoloj. Kaj kiom mi pli longe pensadis, tiom pli decidige judojn eligis de listo de kulpuloj. Poste, estas strange, ankaŭ grekojn. Restis nur unu popolo, la kulpulo de ĉiuj malfeliĉoj.

- Kiu estas tiu popolo?
- Armenoj, - diris la mjudiro.
- Armenoj estas ĉie, - diris la mjudiro,- kie la radon de tutmonda historio turnas la malico. Ĉiuj leviloj estas en iliaj manoj.
- Pri tio mi nenion scias, mjudiro bejo.
- Kaj pli malbone estas tio, ke ili deziras nin – turkojn, volvi, kiel ŝnuregon.
- Pri tio mi nenion scias, mjudiro bejo.

- Ekzistas armena tutmonda konspiro, - diris la mjudio. - Kaj armenoj estas realaj ĉefaĉoj de tiu ĉi milito. Ilia finfina celo estas neniigo de homaro. Sed komence ili volas nin – turkojn difekti. Kaj pro tio ili programis tiun militon. Kaj Vi, efendio, estas ilia agento.

- Mi ne estas agento, mjudio bejo. Mi nenion scias ĉion, pri kio Vi parolas.

- Do, kiu Vi estas, efendio?

- Mi estas vilaĝano, mjudio bejo. Poste mi legis librojn, ankaŭ skribis versaĵojn kaj faris aliaĵojn, sed ne havis veran spertecon.

- Diru al ni, kiu sendis Vin ĉi tien, efendio?

- Neniu sendis min, mjudio bejo.

- Kaj diru al ni, kion Vi scias pri armena tutmonda konspiro?

Armena tutmonda konspiro! Sur tiu ĉi frazo la istanbula skribilo de supera skribisto faris kelkajn saltetojn kaj pro tio li liniis skribitan frazon kaj reskribis ĝin. La mjudio ne ŝatis, kiam sia supera skribisto nur liniis eraran skribitan frazon, por ke skribi la saman frazon dufoje, sed kion fari. Frazo – kun kurbaj, serpentsimilaj, ŝancelantaj kaj kun vosto, linioj certe ne povis havi lokon en teksto, vere en tia teksto, ĉar ĝi estis skribita per oficiala violkolora sankta inko. La supera skribisto timete rigardis al flanko de mjudio. Subite oreloj de supera skribisto ree zumis ĝuste tiel, kiel antaŭe. Kiam la simila frazo saltis el buŝo de la mjudio pri la armena tutmonda konspiro: lia stomako spasme premiĝis, pikadiĝis per mil kaj unu kudriloj, kvazaŭ ĉiuj armenoj de mondo per mil kaj unu kudriloj pikadetiis sian fabelon pri tutmonda konspiro en lia stomako. Acidgusta io leviĝis el lia stomako, sed li brave glutis ĝin, por ke la mjudio ne pli koleru. La supera skribisto ankoraŭ skribis frazon, diritan de malliberulo: “Mi nenion scias, mjudio bej”... Poste li aŭdis zumadon en siaj oreloj kaj sentis grapadon kaj pikadon de fabelaj mil kaj unu kudriloj en sia stomako. Sed feliĉe enketeco finis, ĉar Alaho zorgis pri la supera skribisto, por ke en kapo de la mjudio nenia penso devenu, ke lia supera skribisto ne bezonu ion aŭdi, kion nepre necesas aŭ devas skribi. Kaj Alaho, estu benita lia nomo, zorgis ankaŭ pri tio, ke la mjudio ĝusttempe aplaŭdu... tri foje... kaj tri zaptiĥoj kun alte elstarigitaj pafiloj invadu tiel, kvazaŭ armena ribelo ekkomencis ĝuste en oficejo de la

mjudiro, ĝuste ĉi tie, kaj certe, kial ne... nur por ke oni (zaptiĥoj) ekvidu, ke atmosfero de ottomana oficejo ankoraŭ estas kontentiga.

Zaptiĥoj elkondukis malliberulon, t.e. fortiris de tia stranga, okcidenta franka seĝo, pririgardis piedĉenojn, konvinkiĝis, ke malliberulo ne povas forkuri, puŝis lin al pordo kaj kun li malaperis en koridoro. La mjudiro restis sidante ĉe skribtablo kaj komencis esplori siajn dismorditajn ungojn. Poste el dekstra poŝo de uniformo eligis arĝentkovritan ungan fajlileton kaj ekfajlis ungojn. La supera skribisto kolektis siajn skribajn ilarojn, tusetis kaj glutis kraĉon.

- Ĉu Vi malbone fartas? - demandis la mjudiro, nelevigante rigardon.

- Mi havas stomakajn piketojn, - diris la supera skribisto.

- Vi tre multe manĝas **paĥlava**, - diris la mjudiro.

- Jes, mjudiro bejo, - diris la supera skribisto.

- Kaj kiu vendas al Vi paĥlavojn – tian konfitaĵon?

- Armenaj konfitaĵistoj, - diris la supera skribisto.

- Tiuj armenaj konfitaĵistoj metas kudrilajn finetojn en siaj paĥlavoĵoj, por ke ni – turkoj ekpensu, ke pikadetoj estas pekoj de niaj stomakoj, kiuj ion fremdan ne adoptas.

- Jes, mjudiro bejo.

- Tio ankaŭ estas afero de armena tutmonda konspiro, - diris la mjudiro.

4.

Kiam la mjudiro per mana afabla movo komprenigis, ke la supera skribisto estas libera, li iris al ĉambro de skribistoj en la hjukjumeto, donis dokumentojn de Vardan Ĥatisjan al oficeja servisto osmano kaj diris:

“Ĉi tiuj estas ŝtataj gravaj sekretoj, zorge gardu per kunigiloj: mi tenas tiujn kun mia persona respondeco”, li enmanigis ankaŭ inkujon, istanbulan skribilon, sekigan ilon, skribtableton kaj diris: “se oni serĉos min... mi estas en necesejo”, li turniĝis kaj suferante pro pikadoj en stomako, ŝancelante iris tra longeco de koridoro. Li renkontis kelkajn zaptiĥojn, kiuj senokupe starante maldiligente paroladis. En fino de longa koridoro li vidis tri sinjorojn, kiujn obeeme salutis: unu el tri estis

kutima **eĝaĝi** – provizoro, sed estis bofrato de Helil bejo – estro de juĝistaro, kaj estis strange, ke ĉi tiu eĝaĝio sencele staris en la ĥjukjumeto kaj kun tiaj du sinjoroj, kiuj libere vizitadis valion. Unu el du – **davterdar Ali** bejo, estis la plej ŝatata postenulo – kasisto, la dua estis sperta **avukat** – advokato Hasan agao – la plej bona juĝdefendulo en vilajeto, homo, havanta armenan devenon – malbonan sangon de sia praavino, ĝuis konfidon de la valio. Kion faris la provizoro ĉi tie? Kaj la supera skribisto ekpensis, ke apoteko de eĝaĝio troviĝas en domo apartenanta al armeno, kaj oni devos konfiski ĝin, vendi per aŭkcio. Kio fariĝis ĉi tie? Ĉu bofrato de Halil bejo volas aĉeti domon de armeno? Kial staras ĉi tie tiuj tri sinjoroj? Ĝuste antaŭ pordo de oficejo de la valio. La supera skribisto movis antaŭen preter tiuj sinjoroj. La necesejo troviĝis en fino de koridoro. Li provis malfermi pordon. La pordo estis ŝlosita.

La supera skribisto ĉe pordo momente kolere aŭskultis, por klari ĉu necesejo vere estis okupita aŭ kontraŭ disciplino simple ŝlosita? Sed li nenion dubindan povis klari. Pordo ne havis ŝlosilan truon, sed eble interne estis ŝlosita rime de kunigilo (tion li sciis laŭ sia sperto). La supera skribisto nedecideme kunpremita staris antaŭ pordo de necesejo. Finfine sur pordo ne havanta ŝlosilan truon, li aperigis krevajon. Li deprenis okulvitron, kliniĝis, fermetis miopajn okulojn kaj rigardis tra krevajo. “Paro de piedoj”, - ekpensis li. Alia nenio videblis. Ĉiuokaze la necesejo estis okupita. Do, li devos atendi, ĝis homo eliros.

La supera skribisto paŝis tien kaj reen ĉe necesejo, lia ventro ankoraŭ doloris, sed iamaniere doloro malpliĝis, kaj ŝajnis, ke malrapide malaperas kaj tamen la supera skribisto ne sentis trankviligon. Li ankoraŭ foje provis rigardi tra la krevajo. Nun li vidis ruĝan feson sur kapo de homo, kiu kaŭris sur neceseja truo, kapo – inter genuoj. “Li ĝuste similas araneon, - pensis la supera skribisto, - sed araneoj estas maldikaj, kaj tiu kapo estas granda kaj dika, kaj lia feso estas konata”. Subite homo levis kapon kaj rigardis rekte krevajon de pordo.

La supera skribisto timinte paŝis malantaŭen. Ĉar sidanta homo en necesejo estis mem provincestro – la valio de Bekira vilajeto.

Iu senkomprenulo ekbatus pordon, sciigi al la valio, ke iu ankaŭ havas rajtojn, kaj la valio devos esti bonkora kaj rapidi, sed la supera skribisto estis tro timema fari similan kuraĝan paŝon kaj koleri altgradan, potenčan homon. Li ne estis ankaŭ tia malsaĝa homo, kiu kredas junturkajn edifojn, kiel “ĉiuj osmanoj havas la samajn rajtojn”. Ne, li ĝuste scias sian lokon, li ankaŭ scias, ke sufiĉas unu kapmovo de la valio, kaj oni neniigos superan skribiston. Kaj tiel li simple turnis sur kalkano kaj iris serĉi alian necesejon.

Vere, en hjukjumeto de Bekiro estis dua necesejo, kaj eĉ tio tute nova, konstruita ĝuste antaŭ du semajnoj, perfekta konkero en militaj tagoj, kion mem malamikoj de turkoj ne povis kontesti. Kulpulo de tiu ĉi malŝpareco en malfacilaj tempoj, kiam ĉie oni devos fari nur ŝparecon, estis arkitekto Hajdar efendio, kiu kun helpo sperta juristo Hasan agao (havanta malbonan sangon de sia armena praavino kaj avukatan malbonan reputacion en tuta Bekira vilajeto), donante koruptaĵon en Konstantinopolo, finplenumis tiun konstruaĵon, por ke potenculoj de vilajeto Bekiro povis havi duan necesejon en hjukjumeto.

En novembro de 1914 jaro, t.e. dum la varmega momento de milito, la simila iniciato povis esti ne ebla, tamen hodiaŭ skeptikuloj povas konvinkiĝi, ke estas aĵoj, post kiuj sekvas : “Vidante similon oni ne kredas siajn okulojn”.

La advokato Hasan agao certe havis konvinkigajn kaŭzojn, kiujn istanbulaj junturkoj sen defendo de reganta triopo (Enver paŝao, Taleat bejo, Ĝemal bejo) ne povis escepti. La defendo de malfronto malfortiĝis pro la soleco de necesejo. La kaŭzoj jam estis klaraj (tiel skribis la advokato) oni ne povis postuli de zaptiĥoj de Bekiro – de defenduloj de disciplino, neebulon, t.e. dum horoj stari en vico antaŭ unulo necesejo nur pro tio, ke potenculoj havas rajton unue eniri tien (tiel skribis la advokato), tiamaniere kontraŭas ideojn de Komitato Unueco kaj Progreso, ankaŭ ne povis postuli reprezentantoj de disciplino, ke en estonteco, kiel plejparte aŭ ĉiam, eĉ se iam aŭ unufoje, en bona aŭ malbona sanstato, pro longa vico ĉifoje aliflanke hjukjumeta aŭ malliberuja murzono (ke vere tio estis la sama murzono – laŭ rigardpunkto) iri malliberujan korton, nur por ke tie – t.e. en malliberuja korto, zorgis pri siaj bezonoj en sola necesejo, pro kio multfoje oni

malkvietis. Kaj ĉar (tiel skribis advokato) tia postulo estis ne superfortebla, zaptiĥoj kaj reprezentantoj de disciplino estis devigita tie, en nedigna necesejo devis kaŭri flank' ĉe flanke kun malliberuloj, voĉegaj armenoj, kaj, kiel nun estas klare, ŝtataj perfidoj. Tio estas malbona por morala stato de armegrupo (skribis advokato), ĉar tiuj armenoj estas malicaj, neniun respektas, humiligas ĉiun turkon, ili iam ne havas ungojn, ĉar tiujn en pasinttempo juste iam devige oni ŝiris, ili fekodoras, t.e. ne sublaviĝas, havas infektajn malsanojn, brulvundojn, poson kaj laŭson, ofte plu ne havas langon, iam eĉ okulojn, kaj tamen ili parolas, ŝajnas, ke vidas, ĉar armenoj scias sorĉi, tio ja estas konata. Kaj krom tio (tiel skribis advokato) tio nedigna necesejo ne estas defendita de vento kaj malbona vetero. La zaptiĥoj frostis, iliaj uniformoj malsekiĝis, pli frue difektis, kaj tio ankaŭ estis elspezo por ŝtato.

Parolo – longa, penso – mallonga: la valio de Bekiro, kontraŭ kiu estis sekreta akuzo, ricevis el Konstantinopolo sumon, grandan parton de kiu enpoŝis, kaj rimede restparto konstruis duan necesejon por siaj zaptiĥoj kaj malaltgradaj servistoj, kaj ne unulokan, sed larĝan, antaŭviditan por dek postaĵoj, kun dek truoj, kio rompis kaŭĉuktuberektion de vizitantoj – konvenis al epoko de junturka revolucio, revolucio, anoncanta batalon al regreso, unuvorte, kun spirito de Komitato Unueco kaj Progreso, simple vere demokratia granda necesejo.

Kaj nun iris tien li – la baŝ-kjatib agao, kiun en civitana vivo nomiĝis Abdul efendio, filo de Mirza Selim, li, ioma **jasiĝi**, publika skribisto de bazaroj de la Bekiro, nune – supera skribisto de la hjukjumeto.

Granda parto de la hjukjumetaj oficejoj jam finis sian laboron, kaj ne estas mirinde, ke nova necesejo estis plenplena, ĉar estis horo, kiam restis malmulte ĝis vespera preĝo, kaj zaptiĥoj, malsuperaj servistoj laŭ kutimo malplenas siajn urinvezikojn kaj intestojn, ĝis rapidi al moskeoj. Por multoj vespera vizito necesejon estas sankta ŝuldo, ĉar figuris ceremonion de purigeo, kiel antaŭdifinita la sublaveco. Kaj ĉar necesejo estis konstruita laŭ spirito de Komitato Unueco kaj Progreso (kiu estas ĉiukonata fakto), eĉ ne havis enirejan pordon, antaŭ kiu eblis stari en vico. Kiel oni diras: komfortan necesejon por ĉiu, kiam estas plezure, oni povas eniri kaj eliri.

Kiam la supera skribisto atingis novan necesejon, renkontis iun germanan oficiron, kiu ĵus eliris el necesejo, preterpasis kaj malaperis en longa koridoro de la ĥukjumbo. “Je l’ nomo de Alaho, - pensis la skribisto, - tiun blondulan belan leŭtenanton vi foje jam vidis, - sed ne povis rememori, kie kaj kiam tio okazis. - Sed ja... Certe! Hierau en vaporbanejo. Nenian dubon. Kion serĉas la germanano ĉi tie? Ĉu eĉ tiu germana oficiro...?”.

Li timante eniris fiodoran, fumplenan ĉambron. Sur dek truoj estis penditaj dek postaĵoj. “Ĉioj estas okupitaj”, - pensis la supera skribisto. Li ekvidis homojn, starantajn kaj atendantajn ĉe muroj de necesejo. “T.e. ankaŭ vico, - pensis li, - kvankam ne similas vico”. Li staris inter atendantoj. Ĉiuj konis lin. Unu el ili diris:

- Ĉu Vi volas cigaredon?

- Mi ne fumas, - diris la supera skribisto.

- Sed unu pecon Vi povas fumi, baŝ-kjatib agao. Ĉu aŭ Vi volas ofendigi min?

- Ne, - diris la supera skribisto. - Je l’ nomo de Alaho, mi ne volas.

La supera skribisto prenis cigaredon kaj permesis zaptihon bruli ĝin. “Kaj tiel ni ĉiuj timas de ĉiu, - pensis li, - ankaŭ de kutima zaptiho, kial mi ne kuraĝis ofendeti lin”.

- He, kia estas cigaredo? - demandis la zaptiho.

- Bona, - diris la supera skribisto.

- Estas bulgara, - diris zaptiho. - Tiuj senkredulaj bulgaraj porkoj, kvankam estas perfidoj de popolo kaj amikoj de rusoj, sed havas bonan tabakon.

- Jes, - diris la supera skribisto. Li fumis tusante. Fartis malbone, lia ventdoloro ree komencis kaj fabelo (pri armena tutmonda konspiro) pli malbone pikadis lin per mil kaj unu kudriloj, ol antaŭe.

Li kaŭris inter zaptiho kaj tradukisto Faruk agao. La tradukisto Faruk agao ankaŭ proponis cigaredon al li, kaj li denove ne kuraĝis rifuzi.

- Ĉu Vi vidis tiun germananon? - demandis tradukisto Faruk agao. Li eliris el necesejo, kiam tuj Vi eniris.

- Jes, - diris la supera skribisto.

- Tiu knabo ofte iras ĉi tien, por montri sian postaĵon.

- Estas tiel, - diris la supera skribisto.

- Li, kiel greka kaleŝisto, estas homoseksualisto, unu de ili, ke naskiĝas de siaj homoseksuala pastro kaj lipharula monaĥino. Ĉu iam Vi konis grekan kaleŝiston?

- Ne, - diris la supera skribisto, - granda parto de ĉi tiuj kaleŝistoj estas armenoj. Mi malofte luadas kaleŝon, tiaj ĉevalkaleŝoj estas tre multkostaj.

- Do, ĉu Vi paŝadas?

- Mi ĉiam paŝadas, - diris la supera skribisto.

- Ĉu Vi neniam vojaĝas?

- Malofte.

- Kaj kiel Vi vojaĝas, se neniam luadas kaleŝon?

- Per Bagdada fervojo, konstruita por ni de germananoj.

- Sed kiel Vi atingas Bagdadan fervojon? Kiam mi scias, nenia trajno veturas tra Tavrosa montĉeno, kaj ĝis plej proksima fervoja stacio estas pli ol unutaga vojo.

- Tien mi veturas per kaleŝo.

- Do, tiel.

- Vere, jes.

- Vi estas stranga homo.

- Mi nur pensas, ke en urbo mi ne bezonas kaleŝon.

- Se Vi veturas ĝis la plej proksima fervoja stacio, ĉu Vi ne veturas tien kun greko, kun greka kaleŝisto?

- Ne, - diris la supera skribisto. - Mi ĉiam veturas kun la sama kaleŝisto. Kaj li estas armeno.

- Ni revenu tiun germananon, - diris la tradukisto Faruk agao. - Ĉu Vi ne pensas, ke li estas tre bela, kiel blondula anĝelo?

- Mi atente ne rigardis lin.

- Zaptihoj estas tro volupte humorigita je la lia postaĵo.

- Povas esti, - diris la supera skribisto.

- Tiaj germananoj estas stranga popolo, - diris la tradukisto. - Ĉu Vi vidis konveksajn poŝojn de iliaj pantalonoj, precipe de uniformoj?

- Jes, - diris la supera skribisto.

- Kaj ĉu Vi nenion ekpensis?
- Ne, - diris la supera skribisto.
- Kial Vi nenion ekpensis?
- Mi ne scias, - diris la supera skribisto.
- Germanaj uniformoj havas eksteraĵojn, kvazaŭ vestantoj plenis en siaj poŝoj juglandojn. Sed tiuj ne estas juglandoj.
- Sed kio estas?
- Ĵurnala papero.
- Je l' nomo de Alaho. Kiu ŝovas ĵurnalan paperon en poŝoj?
- Germananoj.
- Kaj kial?
- Ĉar ili insistas, ke en Turkio ne estas neceseja papero.
- Kio estas neceseja papero?
- Papero, per kio eŭropanoj puras siajn postaĵojn.
- Sed ne taŭgas puri postaĵon per papero.
- Estas tiel. Ĝuste tion mi diris al germanano.
- Tiuj germananoj tiel timas pro tualetoj sen necesejaj paperoj, ke sen ĵurnala papero ili ne foriras el kazinoj. Kaj ĉiam kunprenas grandegan provizaĵon, - diris la tradukisto.
- Jes, - diris la supera skribisto, tio similas al germananoj.
- Ili zorgas pri ĉio, - diris la tradukisto Faruk agao. - Ĉio ĉe ili estas planita kaj antaŭpripensita.
- Jes, - diris la supera skribisto.
- Foje, germanano diris al mi: "Vi – turkoj, puras viajn postaĵojn per nuda mano kaj interalie per maldekstra mano. Certe antaŭe vi malmulte da akvo prenas el akvujo, metita en ĉio necesejo". "Estas tiel", - diris mi. "Sed kial Vi ne havas paperon en Viaj necesejoj, almenaŭ ĵurnalan paperon?". "Ĉar en Korano nenio estas dirita pri ĵurnala papero", - diris mi. - "Kaj kio estas dirita en Korano?", - demandis li. "Mi ĝuste ne scias", - diris mi - "tamen tie io estas dirita pri akvo kaj sablo. Per tiuj homo devas puriĝi antaŭ Alaho".
- Kaj ĉu Vi scias, kion ankaŭ diris la germanano?
- Ne, - diris la supera skribisto.
- Li diris: "Ĝenerale, vi ne havas necesejon".

- Sed kial?- demandis la supera skribisto. - Ĉu ni ne kaŭradas ĉi tie – en Sultana arĥivo? Ĉu tio ne estas necesejo?

- Ĉe frankoj, - diris germanano,- en tuta Frankujo oni sidas sur senkapa, senvosta ligna aŭ fajansa azeno, kiu havas grandan truon sur dorso.

- Ĉu Vi volas kredigi min, ke frankoj sidas sur truo, kiam redonas al Alaho, kion ili ne digestis?

- Ĝuste tio, - diris la tradukisto.

Nun kunparolis zaptiĥo, kaŭrinta dekstre la supera skribisto. Li ekridis kaj diris:

- Frankoj ĉu ne kaŭras, ĉu sidas sur truo? Sed tio estas ekstere de homaj eblecoj.

- Tamen estas tiel, - diris la tradukisto.

- Tiaj senkreduloj havas diablan moralon, - diris la zaptiĥo. Post zorgo pri granda bezono, oni ne lavas siajn postaĵojn, manĝaĉas porkviandon, ne kredas profeton kaj ŝovadas ĵurnalojn en poŝoj.

- Ili ankaŭ eltrovis presan nigran farbon, - diris la tradukisto.

- Kian presan farbon?

- Por ke presi siajn ĵurnalojn.

- Ĉu por ke plenplene enigi siajn uniformajn poŝojn?

- Ĝuste tiel.

- Ĉu per ĝi purigi siajn postaĵojn?

- Ĝuste tiel.

La tradukisto nun ĝeme rakontis al la supera skribisto pri sia sensalajra laboro, ŝarĝado, supernorma okupiĝado.

- Ĉu baŝ-kjatib agao, Vi ankaŭ jam trimonate ne ricevis salajron?

- Jam estas kvin monatoj, Faruk agao.

- Kaj kiel Vi vivas?

- Nur Alaho scias, - diris la supera skribisto.

- Niaj salajroj malaperas en poŝoj de potenculoj, - diris la tradukisto.

- Pri tio nenia pruvo estas, - singardeme diris la supera skribisto kaj samtempe timeme rigardis ĉirkaŭen.

- Vere, ne estas, - diris la tradukisto.
- Ĉu Vi vere havas multegan laboron?
- Jes, - diris la tradukisto.
- Antaŭ ĉio kun multnombraj kurdoj, - diris la tradukisto. - Tia amasaĉo eĉ unu vorton ne scias turke. Kaj kiu devas traduki kurdlingvon turke? Certe, mi.
- Sed mi konas kurdojn, lernintajn turklingvon.
- Ilia nombro estas malgranda.
- Kaj kiel estas afero pri aliaj minoritatoj de loĝantaro?
- Ne tre malbone, - diris la tradukisto. Kun judoj kaj grekoj malofte estas malfacilaĵoj, eĉ kun ciganoj de loĝbaseno de lago Urmia, venintaj ĉi tien tra la malnova persuja limo, kiuj scias kelkajn turkajn vortojn. Plej malmulte malplezuraĵoj okazas kun armenoj.
- Kiel?
- Ili ĉiuj parolas turke. Kelkaj de ili eĉ pli bone parolas turke, ol ni.
- Ĉu!?
- Sed Vi ankaŭ bone scias tion, baŝ-kjatib agao.
- Certe mi scias, sed ĉiufoje, kiam oni centrigas mian atenton sur tia fakto, mi admiras.
- Fakte multaj da armenoj pli bone parolas turke, ol ni, - diris tradukisto, kaj mi, se ne sciis, ke ili ĉiuj estas perfidoj, senkreduloj, manĝaĉantoj porkaĵon kaj amikoj de rusoj, povis kredi, ke ili estas propraj turkoj.

La tradukisto nun kaŭrinte rampis al blanka platetita muro, kie estis metita akvopoto, prenis ĝin per dekstra mano, surŝprucigis malmultan akvon sur maldekstra mano, lavis postaĵon, tri foje ripetis agon, malsekan lokon sekigis rimede maniko, metis akvopoton sur sia loko, levigis pantalonon, kapmavis al supera skribisto, skrapante preterpasis atendantojn, kiuj babiladis – starante ĉe longa muro de necesejo kaj malaperis tra senporda enirejo. Li ĵus eliris, alia homo tuj okupis lian lokon, malleviĝis pantalonon kaj ĝemante kaŭris sur planka truo.

“Verŝajne tradukisto Faruk agao pravis, - pensis supera skribisto, kiam insistis, ke armenoj ĝuste povis esti veraj turkoj. Bedaŭrinde, ke

tradukisto plu ne estis kaŭrinta ĉe si, ĉar nun mem kun plezuro dirus al li: Ĉu Vi scias, Faruk agao, estas homoj, kiuj eĉ insistas, ke armenoj povis esti bonegaj civitanoj, veraj osmanoj, per kiuj ni povus fieri?" Sed poste li pensis, ankaŭ pri tio, ke simila frazo estas danĝera, se eĉ ne devenis de si. Kaj tiel li pensis ankaŭ pri tio, ke verdire estas tre bone, ke Faruk agao rapideme lavis sian postaĵon kaj foriris el necesejo. Li memoris, hieraŭ... en vaporbanejo... Li ofte vizitis tien, ĉar jam kelkajare vidviĝis, ne havis edzinon, evitis bordelojn kaj, ĉar eŭnuko Haĝi efendio por kelkaj paraoj suĉadis lian voston.

- Ha, baŝ-kjatib agao, - diris la eŭnuko,- eminenta sinjoro, kiel Vi, devas iri armenan banejon, en armena mahalo. Tie riĉaj armenoj havas marmorkovritan naĝbasenon.

- Jes, Haĝi efendio,- diris li.- Estas ĝuste. Sed delonge pasis tempo, kiam cirkumcidito povis sidi inter necirkumciditoj.

- Sed ni en nia banejo havas necirkumciditojn,- diris la eŭnuko kaj montris germanan oficiron, kiu iomete malproksime kaŭris kun kelkaj turkoj sur supera ŝtupo. - Tiu homo estas leŭtenanto. Li estas juna, blondula kaj krom tio homoseksualisto. Tio signifas, ke li vagadas en hjukjumeto kaj ĝuste en vira necesejo.

- Ĉu tiel?- diris la supera skribisto, - Mi ne scias tion.

- Kaj li tute ne maltrankviliĝas, ke mem necirkumcidito sidiĝas inter cirkumciditoj.

- Jes, - diris la supera skribisto.

- Lasttempe li volis, ke mi por tri piastroj suĉu lian voston. Kaj ĉu Vi scias, efendio, kion mi diris al li?

- Ne.

- Mi diris al li, neniel, eĉ por kvin liraĵoj mi ne suĉos necirkumciditan voston. Fu, diablo prenu! Diablo suĉu lian voston! Vi ja ne scias ke sub netranĉita haŭto de necirkumcidita vosto kolektiĝas malpuraĵo, ekzemple puso kaj urino kaj ĉiuj muŝoj de Turkio firme sidiĝas sur ĝi, kiel sur pusaj okuloj de blinda almozulo, por ke ĝui plezuron. "Sed, efendio - diris la germanano. - Ĉu tiu ĉi ne estas banejo? Vaporbanejo. Kaj por kio estas vaporbanejo ĉi tie? Signifas puri puson, urinon kaj muŝajn malpuraĵojn. Jen vidu. Krom tio mi estas purema. Kvin foje dum tago mi lavas mian voston, kiel vi -

turkoj, viajn ŝvitajn piedojn antaŭ preĝo. Kaj mi aldonas dek piasstrojn”.

- “Ne,- diris mi al li.- Por nenia prezo”.

- Ĉu li ofendiĝis?- demandis baŝ-kjatib agao.

- Jam delonge li trankviliĝis.

Poste, kiam eŭnuko jam masaĝis superan skribiston kaj vipis per salikaj vergoj, forte frotis korpon kaj suĉis voston, li sidiĝis ĉe tiu grupo, kie sidis ankaŭ la germanano.

Ĝuste tiam la germanano diris al unu el turkoj:

- Tri armenoj, pendumitaj sub Beatecpordego, ŝanĝas aspekton de urbo.

- Estas ĝuste, - diris turko.

- Se milita situacio grade malboniĝus, kaj fronto remarŝante pli proksimiĝos, oni pli multe da armenojn pendumus. Ne nur en Bekiro. Ĉiuloke, en ĉiuj sociaj regionoj de lando, oni pendumus armenojn.

- Povas esti,- diris turko.

Alia turko diris:

- Ilin ĉiujn, armenan tutan amasaĉon necesas pendumi.

- Tio ne estas profita, efendio. Registaro tiom da pendigiloj ne povus provizumi.

- Sekve, oni bezonas pendi de arboj.

- Tio pli dubinda estas, efendio,- diris la germanano. Ne forgesu, ke grandparto de Turkio estas malriĉa je arbaroj, ie eĉ tute estas senarbaj. Ŝajnas, ke Alaho en ĉi tiuj landpartoj arbojn aldonis avare, por ke homo rilate liaj kreintaj estaĵoj ne kulpfaru.

- Kion Vi volas diri?

- Ke Alaho por homoj kreis arbojn,- diris la germanano,- kiel ĉion en naturo, sed evidente ne por tiu celo, ke homo sian proksimulon najlbatu sur ĝi.

- Nur Alaho scias por kia celo kreis arbon,- diris turko.

- Li, certe, scias,- diris germanano.

La supera skribisto trankvile sidis inter viroj en banejo, spiris vaporon kaj akriĝis orelojn. Li ŝprucis grandajn akumulaĵojn en sendenta buŝo de eŭnuko kaj sentis sin tute malŝarĝita.

- Ĉu Vi scias?- poste diris unu el turkoj, kiu ĝis tiam ne miksiĝis en parolado.- Vi scias, efendioj, mi ne perceptas ĉion tutan.

- Kaj kion Vi ne perceptas?

- Kial ĝenarale armenoj persekutiĝas?

- Multoj ne perceptas, efendio. Sed ne taŭgas ĉion percepti. Ĉu Vi perceptas, kial armenoj estas amikoj de rusoj kaj kaŝe preĝas por rusa caro.

- Ne. Tion ankaŭ mi ne perceptas.

Unubraka turka majoro, sidante ĉe germanano, diris:

- Efendioj, rigardu ĉi tiun brakon, kiun mi plu ne havas. La Alaho forprenis ĝin de mi. Estis novembro, en Kaŭkazo, dum unu granda atako de rusoj. Ni estis ĉirkaŭita, estis senespera situacio. Kaj ĉu Vi scias, kiun la Alaho sendis savi mian vivon kaj liberon?

- Ne, efendio.

- Armenon.

- Miaj plej bonaj soldatoj estas armenoj,- diris la majoro. Kaj la saman mi aŭdis de aliaj oficiroj.

- Sed, binbaŝi bejo, se estas tiel kaj armenoj estas neŭtralaj soldatoj, kial oni ilin forĵetas el armeo? Mi mem vidis. Oni forŝiris epoletojn de armenaj oficiroj, kaj multojn el ili pafekzekutis.

- Mi ne scias, efendio.

- Sed devas esti ia kaŭzo.

- Nenia kaŭzo estas.

- Ĉu povas esti senmotivaj kaŭzoj?

- Videble tiel.

- Sed tio tamen estas absurdo.

- Tio ne estas absurdo. Alaho scias ĉiujn kaŭzojn, eĉ tiujn, kiuj ne ekzistas.

- Do, eble ia senmotiva kaŭzo estas ĝuste reala kaŭzo, kaj ni tiun kaŭzon simple ne scias.

- Se tio eblas, efendio.

- Povas esti, ke registaro ankaŭ ne scias ian kaŭzon, kaj ili ankaŭ tute ne scias, kial persekutas armenojn?

- Tiel estas, efendio.

La supera skribisto memoris, ke si en banejo pro malforteco dormetis. En sonĝo momente aperis buŝo de eŭnuko, poste li vekigis. Sinjoroj plu ne paroladis kaj profundiĝis en duonmallumo. Unubraka majoro sidis aparte kun juna germanano sur plej alta, plej varma ŝtupo. Li sidis firmkontakte. Tra la vaporo fikse rigardante li vidis, ke turko tenis voston de germanano en sia pugno tiel, kvazaŭ plu ne povos forlasi. “Je l’onomo de Alaho, - ŝancelante kapon pensis la supera skribisto, kaj al li ŝajnis, ke vosto de germanano tute ne estis pli longe, ol vosto de lia moŝto germana kajzero. - Kaj ni – turkoj, firme alkroĉiĝas de ĝi, - pensis li. **Tiel estas.** Ĉar kajzero donas al ni pafilegon. Ĉar sen tiaj pafilegoj ne eblas militi”.

Antaŭ tio la supera skribisto demandis de derviŝo, kiel estas la afero, koncerne la satano kaj la tento. Kaj la derviŝo respondis: “Kiu foje tenas la voston de la satano, plu neniam forlasas”.

Post la vaporbanejo la supera skribisto sin trenite atingis Beatecpordegon. Tie per longa ŝnurego pendumiĝis tri armenoj. Sur rando de strato kaŭris blinda, maljuna almuzulo, kiun li konis. Li konis ankaŭ knabeton, bulvolviĝintan ĉe la piedoj de maljunulo.

- He, kiel Vi fartas, Mehmed efendio?

- Aĥ, ĉu tiu estas Vi, baŝ-kjatib agao? Mi dankas Vin por Via demando. Mi estas bone. La Alaho forprenis lumon de miaj okuloj kaj anstataŭ donacis fortan sanon.

Li ĵetis truan duonpiastron sur tuko de almuzulo kaj miksiĝis en amasaĉo de senaferuloj. En amaso li vidis du turkajn altgradajn personojn, kiujn ofte renkontis en la hjukjumento. Unu el ili estis estro de najbara vilaĝo, la alia – notario. Ilin akompanis germanano en civitana vestaĵo, kun monoklo.

- Ĉu Vi scias, efendioj? - diris germanano, - ke armenoj vere estas plej malnovaj kristanoj.

- Ne, efendio.

- Tamen, laŭ politika vidpunkto, armenoj estas unuaj, kiuj kristanismon altigis ĝis ŝtata religia nivelo.

- Ĉu vere?

- Jes. Tio estas fakto. Eĉ antaŭ Romo.

- Estas strange.

- Poste ili disputis kun ĉiuj aliaj eklezioj. T.e. ili ne kredas dukarakteron de Kristo.

- Kio signifas tion?

- Ili estas konvinkita, ke Kristo havas nur unu karakteron – la Dian.

- Ĉu vere?

- Tiel nomata monofizita religio.

La germanano per kraĵono strekadis ion en notbloko, sed la supera skribisto ne povis klare kompreni kion.

- Ĉi tie antaŭ 4000 jaroj vivis longkrania raso, - diris germanano. -

Sed pli poste tiujn longkraniulojn forpelis de ĉi tie mallongkraniuloj.

- Ĉu oni forpelis?

- Jes.

- Sed armenoj al kiu raso apartenas?

- Al mallongkraniuloj. Krom tio – al armenoidoj. Oni supozas miksitaj kun dinaraj.

- Mi nenion komprenas.

- Eĉ sur tri pendumitoj eblas tion vidi. Ili havas rektan, volan mentonon, grandetan kurbetan nazon, helkaŝtankoloran haŭton, duonbuklajn, ondajn malhelajn harojn... Grandegajn esprimajn velurbrilajn okulojn.

- Sed efendio... Ja okuloj de mortintoj ne estas.

Ĝuste tiumomente iu en necesejo ekkriis:

- Atenton! La mjudio!

Tio timigas la superan skribiston kaj ĉesigis liajn pensadojn.

Ĉe eniro de necesejo vere staris la mjudio, ridete kaj senzorgeme metinte manon sur femuro.

La supera skribisto kvazaŭ paraliziĝis. Li volis alproksimiĝi al akvopoto, sed nenion faris, simple daŭris kaŭri. Li vidis, kiel timintaj homoj levitiras pantalonojn kaj foriras el necesejo. Baldaŭ li kaj la mjudio restis sole.

- Tiuj porkoj tiel rapidis, ke forgesis purigi siajn postaĵojn, - diris la mjudio.

- Jes, - diris la supera skribisto. Li etendis manon al akvopoto, la mjudiro petis lin resti.

- Atendu, - diris la mjudiro. - Mi volas paroli kun Vi.

Necesejo funkciis forlasite. La mjudiro kaŭris apud la supera skribisto. Li fumis per pipo rusan cigaredon.

- Aliulo povus pagi per sia vivo por tio, - diris la mjudiro kaj per fingro batetis rusan cigaredon. - Sed la mia, vere estas antaŭ milita kaj mi mem estas sendubinda.

- Memkompreneble, - diris la supera skribisto.

La mjudiro mokridetis.

- Iomete antaŭ Vi ion revis, baŝ-kjatib agao. Mi sufiĉe longe staris ĉe eniro kaj rigardis Vin.

- Mi ne revis, mjudiro bejo.

- Ĉu Vi neniam sonĝas kun malfermaj okuloj?

- Neniam, mjudiro bejo. Kiel supera skribisto, mi tion neniel povas permesi min.

- Sed mi rigardis Vin, baŝ-kjatib agao. Kaj diras al Vi. Al mi ŝajnis, ke Vi sonĝis.

- Animaloj ankaŭ sonĝas, - diris la mjudiro. - Mia kato, ekzemple, miaŭas en dormo.

- Jes, mjudiro bejo.

- Sed tio ne estas vekiĝstataj revoj. En vekiĝa stato nur homo povas revi.

- Ĉu Vi tiel pensas, mjudiro bejo?

- Jes, baŝ-kjatib agao. Lasttempe mi vidis tagmezan sonĝon, - diris la mjudiro. - Mi vidis grandan arbon. Tro grandan arbon. Kaj tio kreskis en koro de Turkio. Grandega arbo. Kaj de tiu arbo estis penditaj niaj ĉiuj teruroj.

- Kiajn aspektojn havis la teruroj, mjudiro bejo?

- Ili aspektas kiel armenoj. Kiel armenoj.

- Do, al afero, - diris la mjudiro, turnis kapon al sia supera skribisto kaj blovis fumon al lia vizaĝo, ne maltrankvilante, ke ĝi povas

malhelpi lin. La supera skribisto ne kuraĝis tusi. Li eĉ ne kuraĝis pensi, ke tio estas malbona etiketo, kaj li mem devas malkontenti. Li nur pensis: “Sed tiun frazon la mjudio jam foje diris, kaj eĉ tio, al malliberulo – Vardan Ĥatisjan, kiu ne havas veran profesion, kaj insistas, ke estas poeto. Al afero, - diris la mjudio al li”.

- Do, al afero, baŝ-kjatib agao, - diris la mjudio.

- Jes, mjudio bejo, - diris la supera skribisto.

- Kian opinion Vi havas pri Vardan Ĥatisjan?

- Li havas ŝtonan obstinon.

- Estas tiel, baŝ-kjatib agao.

- Vi eltiras nenion de li, mjudio bejo. Tute nenion. Tiu ĉi homo insistas, ke estas senkulpa kaj nenion scias.

- Estas senkulpa aŭ ne, li tamen devos ion konfesi. Tion mi promesas al Vi.

- Ĉu Vi tiel pensas, mjudio bejo?

- Mi ĵuras per la kapo de l'mia patrino, - diris la mjudio, - patrino, kiu naskis min. Mi ĵuras ankaŭ per de l'onomo Alaho, kiu saĝece donacis al mi langon, por ke mi povu ĵuri. Tiu ĉi Vardan Ĥatisjan konfesos! Kaj ankoraŭ plu. Mi zorgos, ke lin oni kondukos Konstantinopolon. Kaj tie li konfesos!

- Kion li konfesos, mjudio bejo?

- Ke ekzistas armena tutmonda konspiro.

- Sed kiel Vi devigos lin konfesi ne nur ĉi tie, ankaŭ en Konstantinopolo?

- Mi havas rimedojn kaj manierojn, - diris la mjudio.

- Je l'onomo de Alaho, - diris la supera skribisto, - nur la Alaho scias rimedojn kaj manierojn por malfermi buŝon de eĉ plej obstinoj.

- Kaj mi parolis kun la Alaho, - diris la mjudio, - kaj la Alaho lumigis min.

- Morgaŭ aŭrore mi diktos al Vi konfeson de Vardan Ĥatisjan, - diris la mjudio. - La malliberulo ankaŭ nenion scias pri tio, kaj lia konfeso... skribforme, skribita per violkolora inko...estos perfekta surprizo por li. Restus nur subskribi.

- Sed ĉu li subskribos?

- Memkompreneble.

- Ĉu atestantoj ankaŭ subskribos?

- Certe. Mi subskribos, ke estis atestanto kaj legis konfeson kaj mi estis okulvidinto, kiam li subskribis. Vi ankaŭ subskribos, ke estis atestanto. Kaj alioj ankaŭ subskribos.

- Ĉu buŝa konfeso ankaŭ estos?

- Ankaŭ. Sed poste. Unue ni bezonas skribitan konfeson.

- Sed kiel estos la afero de atestantoj dum buŝa konfeso?

- La sama.

- Kiuj estos atestantoj?

- Ekzemple mi. Kaj Vi. Ankaŭ la valio kaj la mutesarifo, la kajmakamo. Verŝajne kelkaj turkaj kaj germanaj oficiroj.

- Baldaŭ proksimiĝas kristanaj festoj, - diris la mjudio. - La plej proksima, jam staranta ĉe pordo, estas Alĉielleviĝo de Kristo. Tion mi hazarde sciis de malliberulo. Kaj ĉu Vi scias, baŝ-kjatib agao, ĉiufoje dum festoj kristanoj iĝas plej obstinaj. Ĝuste pro tio armeno Vardan Ĥatisjan dum ĉi tia semajno devos konfesi.

- Jes, mjudio bejo. - Poste, la supera skribisto demandis: - Kion signifas Alĉielleviĝo de Kristo?

- Tio estas tago, kiam la stranga sanktulo ŝvebas en ĉielo, kiel nia profeto, sidante sur sia blanka ĉevalo – El Burak.

Poste ambaŭ silentiĝis. La mjudio mediteme fumis, sed la supera skribisto rigardis necesejan senvitran fenestron, kiu ne estis plu granda, ol truo de fumtubo en muro, tra ĝi penetris vespera malhela lumo. Iam post iam el proksima malliberejo atingis voĉoj kaj krioj duonluman necesejon kaj miksis kun voĉoj, venantaj de oficejoj kaj koridoroj de la hjukjumeto. Ĝuste tiam, kiam la mjudio ĵetis cigaredon inter siaj piedoj en fekaĵkavo sub sia postaĵo, ĝuste tiam la muedzinoj ekkantis sur minaretoj. Voĉo de unu el muedzinoj aŭdiĝis tro klare, ĉar lia graka kanto venis de proksima Hirka Ŝerif Ĝami – de moskea minareto de Sankta palto, kiu troviĝis sur strateto de Kurusebil sokhakh – Sekita baseno. **Allahu akbar**, - kantis muedzino. - Dio estas la plej granda. Kaj la muedzino vokis ĉiujn kredulojn, ankaŭ la mjudiron kaj la superan skribiston. Muedzino vokis kvar foje.

La supera skribisto fermis okulojn kaj aŭskultis. La grakanta voĉo de la muedzino plenis necesejon kun mil kaj unu kornikoj. Ili, kiel ankaŭ brunaj grandegaj papiloj turniĝis ĉirkaŭ la mjudio kaj la supera skribisto, ŝvebis super iliaj kapoj kaj ŝanceliĝis super fekaĵkavoj. **Allahu akbar** - vokis la muedzino lastfoje. - La Dio estas plej granda. Mi atestas, ke ne estas Dio, krom la Alaho, mi atestas, ke Muhameto estas Dia profeto. Venu preĝi. Venu saviĝi. **Allahu akbar. La ilah illa illa.** Dio estas la plej granda. Ne estas Dio, krom la Alaho.

5.

La mjudio jam estis hejmen. La supera skribisto ankaŭ iris hejmen. Kaj ĉiuj malaltgradaj servistoj, ankaŭ ĉiuj vizitantoj kaj petantoj, purigistinoj kaj zaptiĥoj, ĉiuj, ne havantaj aferojn ĉi tie malfruvespere, iris hejmen. Ĉiuj iris hejmen. Nur estis ĉi tie nokta gardisto kaj sentinelo – ĉe la ĉefa enirejo. En la hjukjumeto estis paco. Delonge jam sonis-pasis vokoj de la muedzinoj, de sur necesejo malaperiĝis grakantaj birdoj kaj ankaŭ grandegaj brunaj papiloj. En ĝenerala silenteco nur sonis voĉo de la fabelisto. Li diris: “Ŝafideto mia, kiel vi vidas, ili iris hejmen. Nokto eniris Bekiron”.

Via patro ankaŭ aŭdis vokon de muedzino en sia kelo. Kiam la muedzino vokis je tria fojo “la Dio estas plej granda”, via patro pace dormis. Sed en sonĝo li vidis vitrokulon de la mjudio, kiu diris al li: “Ĉu Vi vidas ĉi tiun vitran okulon, Vardan Ĥatisjan? Ĝi vidas nek pli multe kaj nek malmulte, ol la okulo de la Dio. Kaj mi vetas kun Vi, ke la Dio, kiu estas la plej granda, tute ne vidis mortintajn armenojn ĉe pordegoj de urbo kaj sur bazarplaco. Li ne vidos ankaŭ alion, ke oni pendos homojn, sendepende ĉu ili estas kulpuloj aŭ ne? La registaro ankaŭ multojn pendumos. Oni multojn pafekzekutos kaj mortpunos. Multojn simple murdos. Kaj mi diras al Vi: La Dio havas vitrajn okulojn. Kaj mi diris al Vi, la registaro flamigos grandan lignofajron. Kaj oni milionajn korpajn ĵetos en tiun lignofajron. Kaj ĉio plenumiĝos antaŭ okuloj de Dio, kiuj estas vitraj. Mi vidas grandan ŝafidon kun tranĉita gorĝo. Mi vidas, kiel brukrias ŝafido kun vitra okulo supren.

Sed en vitra okulo neniam respondo estas”. Kaj tion aŭdante, via patro tuj vekigis kaj komprenis, ke mem estas perdita.

Dum sekvontaj tagoj multaj ioj ne okazis. Kun via patro oni kondukis bone – nek batis lin, nek torturis. La manĝaĵoj ne estis venenitaj. Zaptiĥoj, enirante lian kelon, ridetaĉis. Sed via patro timis. En tria tago lin kondukis al la mjudio.

- Ĉi tiu estas Via konfeso, - diris la mjudio kaj montris dokumenton, metitan antaŭ si sur tablo. - Kiel Vi vidas, mi jam subskribis. La supera skribisto same ne hezitante metis sian subskribon sub ĉi tiu konfeso. Eĉ la valio subskribis, ankaŭ la kajmakamo kaj la mutesarifo. Ĉi tiuj sinjoroj subskribis, t.e. – konfirmis, ke ili vidis, kiel Vi – Vardan Ĥatisjan, legis ĉi tiun konfeson kaj per Via propra mano subskribis. Nun ĉi tie mankas nur unu subskribo. Kaj tio estas Via subskribo.

- Sed mi nenion konfesis, - diris via patro.

- Tio nenion signifas, - diris la mjudio.

- Ĉu mi povas almenaŭ legi mian nefaritan konfeson?

- Memkompreneble, - diris la mjudio.

Legante konfeson, via patro diris:

- Ĉi tion mi ne subskribos.

- Sed Vi eraras, - diris la mjudio. - Atestuloj konfirmis, ke Vi subskribis. Atestuloj vidis.

- Sed atestuloj tute nenion vidis, - diris via patro. - Kiam mi subskribis tion?

- Hodiaŭ frumatene, - diris la mjudio. - Ĉi tie menciita eĉ la horo.

- Vere, - diris via patro. - La horo estas menciita.

- Bonvolu, kiel Vi vidas, - diris la mjudio.

- Sed en dokumento estas menciita je naŭ kaj dudek du antaŭ tagmezo. Nun estas posttagmezo.

- Ni povas meti montrilon malantaŭen, - diris la mjudio. - Kredu min, efendio, por la Alaho estas tute la sama reale kiom da horo estas. Ĉar kio estas realeco? Ĉu Vi konfirme scias? La suno por Alaho estas la sama.

- Mi ne subskribos.

- Sed Vi devos subskribi, - diris la mjudio. - Kontraŭe la subskriboj de atestuloj konsideriĝos falsaj. Sed finfine temas pri la valio kaj la mutesarifo, la kajmakamo kaj la supera skribisto, ankaŭ mia persono. Ĉu Vi volas insisti, ke ni ĉiuj mensogas kaj nenian similaĵon vidis? Sed ni ĉiuj vidis, kiel Vi subskribis propramane.

- Mi tute nenion volas insisti, - diris via patro.

- Ĉu Vi nun subskribas aŭ ne?

- Ne, - diris via patro.

La mjudio kolerinte aplaŭdis. Kiel respondo – ekstaris la supera skribisto, malfermis pordon, alvokis zaptiĥojn, kiuj antaŭ pordo sencele paŝadaĉis. Verdire, ili devis aŭdi aplaŭdvoĉon de la mjudio. La mjudio ion diris al zaptiĥoj, kiujn via patro ne povis aŭdi kaj pensis, ke ili kondukos sin. Verŝajne ili devos eltiri ungojn aŭ kutimmaniere vipbatoj siajn plandojn. Li jam multon aŭdis pri tio. Ili plandojn de iu vipbatis kaj poste surverŝis oleon kaj salon. Sed nenia similaĵo okazis. Zaptiĥoj mallongtempe malaperiĝis por alkonduki kafkuiriston. Kafkuiristo grandparte staras antaŭ ĥjukjumo. Ĉar zaptiĥoj ne renkontis lin, ili alkondukis kafkuiriston de proksima kafejo El Raŝid. Poste iris ĉeĥjukjumeta kafkuiristo. Sur lia kapo estis malpura turbano, kaj surmetis veŝton, longan kaj larĝan pantalonon. Sur nelavitaj piedoj estis haŭtaj sandaloj. Randoj kaj subpartoj de liaj piedungoj estis pli nigraj, ol la plej nigra kafo, kiu ĉi tie estis tre nigra kaj densa. Kafkuiristo alportis tri tasetojn da kafo, paĥlavaon kaj pudingon – helkaŝtinkoloran dolĉan kun nedifinita deveno. Tiojn li donis al la mjudio, supera skribisto kaj ankaŭ malliberulo. La mjudio ĥetis al kafkuiristo arĝentan meĥidon. Poste zaptiĥoj puŝante elkondukis kafkuiriston.

La mjudio, brutrinkante kaj ŝmacante kafon, diris:

- Mi konsilas al Vi subskribi.

- Kiel mi povas skribi, ke ekzistas armena tutmonda konspiro?- diris via patro. Kiel mi povas subskribi, ke mi estas agento de ĝi, kaj tuj antaŭ milito mi venis Turkion laŭ rekomendeco de tiu ĉi organizaĵo? Kaj kian aferon mi havas kun mortigo de Aŭstria princo? Sub tia skribaĵo mi ne povas subskribi.

- Se Vi ne subskribos,- diris la mjudio,- mi Vin mortpunos. Sed ne publike, kiel ni antaŭvidis. Ni simple malaperigos Vin.

- Mi estas civitano de Ameriko.

- Tio ne havas grandan signifecon, efendio.

- Ili protestos.

- Neniu protestos, efendio, precipe, kiam iu hazarde mortas pro korinfarkto. Ne forgesu: La Ameriko estas neŭtrala lando. Sed ni militas. Amerikanoj ne enmiksos en ĉi tiajn aferojn, kaj precipe spionajn demandojn en regiono apud fronto.

- Sed ĉu amerika ĵurnalaro?

- Kiun nun interesas ĵurnalaro? Ĵurnalaro estas fortkrianta prostituitino.

- Konsuloj protestos.

- Vi eraras, efendio. Konsuloj prudente silentos. Estas milito, efendio. Kaj Vi estas spiono.

- Mi ne estas spiono.

- Bone, forgesu tion.

- Sed ĉu mi subskribos?

- Sekve, Vi estas kulpulo.

- Do, ĉu oni min mortpunos?

- Ne. Ĝuste kontraŭe. Se Vi konfesus Vian kulpon, mi alkondukos Vin Konstantinopolon. Tie Vi dirus tion, kio estas en konfeso. Estos juĝo. Granda juĝo. Publika juĝo. Tuta mondo aŭskultus. Ankaŭ Ameriko kaj liaj reprezentantoj. Ankaŭ konsulo de Ameriko en Konstantinopolo...Morgentaŭ, hebreo, kiu malsaĝe kaj mirinde agas por armenoj, certe indignigante nin. Li same aŭskultus. Kaj ĉiuj perceptus, ke armenoj estas kulpuloj.

- Sed ili ne estas kulpuloj.

- Efendio, tio estas demando de aspekto. Kaj kiom da tempo Vi estas utila por ni, Vi povas vivi, estos tro longa juĝo.

- Sed ĉu post la juĝo?

- Post tio – ne,- diris la mjudio. - Sed mi anstataŭ Vi, nun mi ne maltrankviliĝos. Ĉar longa juĝo estas longa juĝo. Kaj se ĝi iutage finiĝos, verŝajne la milito ankaŭ finiĝos. Kaj jam estos la sama, ke Vi,

laŭ ni povus vivi, aŭ ne. Ĉar povas okazi, ke Vin oni interŝanĝos kun unu el niaj homoj, kaptitaj de rusoj, aŭ anglanoj, aŭ francoj. Tiel, Vi vidas, estas ŝanco de espero por Vi.

La afero estas tia, efendio. Kulpuloj povas esperi.

- Tamen mi tion ne komprenas, mjudiro bejo.

- Ne ĉion taŭgas kompreni, efendio. Estas tempoj, kiam senkulpuloj devos morti, sed kulpuloj povas vivi. Kaj en la samaj tempoj pli bone esti kulpulo, ol senkulpulo. Ĉu Vi komprenas?

- Ne, mjudiro bejo. Mi tion ne komprenas.

- Ĉu tiu armeno ĝenerale nenion komprenas,- poste diris la mjudiro al la supera skribisto, kiam ree oni alkondukis Vardan Ĥatisjan en lian kelon. - Ĉu Vi komprenas kial mi ne komprenas, ke la armeno nenion komprenas, malgraŭ certe li devos kompreni tion, kion komprenas ĉia malsaĝulo.

- Ne,- diris la supera skribisto.

- Certe estus pli malfacile devigi lin subskribi,- diris la mjudiro,- tio estas la afero de kelkaj sekundoj. Mi povas diri ekzemplon, mi povis per pistolo minaci lin. Mi povis pistolon premi al lia frunto. Ĉu Vi scias, kio okazos?

- Ne,- diris la supera skribisto.

- Li tuj subskribus.

- Ĉu Vi pensas?

- Mi estas absolute konvinkita.

- Sed tio havos nenian sencon,- diris la mjudiro.

- Kaj kial?

- Ĉar ni volas alkonduki lin Konstantinopolon,- diris la mjudiro. - Ĉar tie li devos konfesi antaŭ socio de mondo tion, kio skribita en konfeso. Ĉu Vi komprenas tion?

- Ne,- diris la supera skribisto.

- Nu bone,- diris la mjudiro.- La afero estas tia: Ĉi tiu obstinega armeno en Konstantinopolo antaŭ socio de mondo devos konfesi, ke ekzistas armena tutmonda konspiro kontraŭ homaro, tutaj popoloj, kontraŭ rajto, disciplino, moraleco. Sed pli multe – kontraŭ ni.

- Ĉu kontraŭ Turkio kaj turkoj?

- Ĝuste tiel... Kaj por tio ni devos anticipe persvadi lin. Tio signifas, ke li devos kredi sian subskribon.

- Sed kial?

- Ĉar kontraŭe lia subskribo iĝos sensenco, kaj lia atesteco en Konstantinopolo – nepersvada. Ĉu tion Vi ne komprenas? Li povas doni persvadan depozicion, nur li mem estas persvada.

- Tion mi komprenas, - diris la supera skribisto.

- Kaj kio estas la plej bona maniero konvinki viron?

- Mi ne scias, - diris la supera skribisto.

- Persekuti lin rimede timo.

- Ĉu rimede timo?

- Certe, rimede timo.

- Sed tiu homo jam estas tute timita.

- Li ne estas sufiĉe timita.

- Sed kiam Vi premos pistolon sur lia frunto...

- Ne, ne, baŝ-kjatib agao. Tiu momenta timo ne sufiĉas por Konstantinopolo.

- Ĉu Vi pensas dum estado en Konstantinopolo li forgesos timon?

- Plej bone estas diri, li superfortos.

- Eblas lin minaci, ke li mortpunigos.

- Jam mi faris. Tio ne sufiĉas.

- Li estas tro fortika homo.

- Jes, li estas tia.

- Certe, ni povas eltiri liajn ungojn, ankaŭ prilabori plandojn. Sed kreu min, tio aldonos malmulton pri lia okazo. Krom tio – ne estas oportune.

- Kial ne oportunas?

- Ĉar sen ungoj kaj per traŭmitaj plandoj li ne povas prezentiĝi en Konstantinopolo. Internacia socio povos pensi, ke ni estas barbaroj. Aŭ ni subpremis lin. Aŭ ion similan. Ne, baŝ-kjatib agao. Tiu ĉi homo devos iri Konstantinopolon sane. Kaj kian depozicion aldonos en Konstantinopolo, devos persvadi ĉiun – observantojn de neŭtralajn ŝtatojn, ekzemple, reprezentanton de Ameriko en Konstantinopolo.

- Pri kiu temas?

- Jam Vi scias, pri hebreo Morgentaŭ.
- Aĥ, ĉu pri li!
- Jes, pri li. En profundo de koro li estas armeno. Aŭ pli malmulte
- sin montras kiel armeno.
- Estas malfacila situacio.
- Jes, estas sufiĉe malfacila.

- Ĉu Vi vidis armenan pastron, pendumitan sub Beatecpordego?
- Jes, mi vidis.
- Nun ni kaptis ankaŭ unu.
- Ĉu armenan pastron?
- Jes.
- Ĉu lin Vi ankaŭ devos pendumi?
- Ne, mi havas alian intencon. Tiu ĉi pastro nudpiede sidas en sia kelo. Pro tio mi diras al si, armeno ne povas nudpiede paŝi tien kaj reen eĉ en sia kelo, ĉar armenoj estas delikatsenta nacio.
- Estas ĝuste, mjudiro bejo.
- Pro tio mi diras al mi, ni devos hufferi armenan pastron.
- Kiel Vi imagas tion?
- Ĝuste, kiel oni hufferas ĉevalon. Sur liaj nudaj plandoj oni najlbatos hufferojn.
- Kian hufferon?
- Aŭ anatolan, Vi scias tion, ĝi estas kutima ferlado – maldika, havanta tri trutojn... aŭ mi petos unu el germanajn oficirojn aldoni rajdantaran hufferon. Germanaj ĉevaloj havas aliajn hufferojn. Ili havas dufingran dikecon kaj ne elastiĝas.
- Sed ni en la malliberujo ne havas balgon, nek ĉi tie, nek en hjukjumeto.
- Balgon oni povas trovi. Sed se necesos, hufferbatecon de pastro ni plenumos malvarme.
- Sen balgo ankaŭ eblos, - diris la supera skribisto.
- Jes, - diris la mjudiro.

- Kiam ni hufferos pastron, ni alkondukos tiu Vardan Ĥatisjan rigardi lin. Verŝajne tio persvados lin.
- Verŝajne, - diris la supera skribisto.

- Se ne, mi deviĝos elpensi alion.
- Kion? - demandis la supera skribisto.
- Ankoraŭ mi ne scias, - diris la mjudiro.
- Ĉu ne eblas tiu Vardan Ĥatisjan persvadi prudente? - demandis la supera skribisto.
- Ne, - diris la mjudiro.
- Do, ĉu nur per terurigo Vi povas atingi ion?
- Jes, - diris la mjudiro.

Kaj la mjudiro diris:

- La teruriĝinto nur aŭdas sian propran voĉon, kaj tio estas terurege. Pro tio mi parolas kun teruriĝinto per lia propra lingvo.
- Sed se teruriĝinto subite ne havas timon...
- Tiel ne eblas, - diris la mjudiro. En tiu kazo li ne estas teruriĝinta. Aŭ li estas sanktulo, el koro de kiu la Alaho eligis timon.
- Tiu Vardan Ĥatisjan ne estas sanktulo.
- Li ne estas sanktulo, - diris la mjudiro. - Certe ne.

En laborĉambro de la mjudiro tuj ekestis plena paco. Nur aŭdadis knarado de istanbula skribilo, ĉar la supera skribisto komencis kopii la konfeson. La mjudiro brulis sian pipon, kapon metis sur apogilo de brakseĝo, fermis sanan okulon kaj nur vitra okulo fiksrigardis plafonon. Sola voĉo en ĉambro estis voĉo de la fabelisto. Kaj li diris: "Ĉu vi vidas istanbulan skribilon de la supera skribisto? Kaj lian absorbilon – farunpolvon? Kiam kopio estos preta, tuj polvoŝutiĝos, inko absorbiĝos kaj sekiĝos, poste ekspediĝos Konstantinopolon kaj ĝi pli frue atingos tien, ol via patro. Kaj mi vetas kun vi, ke ĝi malsupreniĝos sur skribtablo de Enver paŝao – la dio de milito kaj savanto de ĉiuj turkoj. Kaj ĉu vi vidas? ŝafideto mia, nun kiel la supera skribisto sian istanbulan skribilon lasis en inkujo, tiel, kvazaŭ dum skribo havis spasmon, aŭ tiel, kvazaŭ devos bonege pensi pri io Kaj ĉu taŭgas, ke mi laŭtvoĉe prononcu por vi, kion li nun pensas, malgraŭ ili estas pensoj, netaŭgaj por aŭskulto de la mjudiro? Sed vi ne maltrankviliĝu. Neniu aŭdas mian voĉon. Nur vi povas aŭdi mian voĉon".

Kaj Meddah diris: “Jen pri kio pensas la supera skribisto. Li pensis je l’ nomo de Alaho. Ni ĉiuj timas. Mi timas mjudiron kaj ĉiujn miajn supergradulojn. Kaj la mjudiro ankaŭ timas, malgraŭ mi ne scias kiun aŭ kion. Sed li ankaŭ timas. Kaj pro tio li volas sugesti timon, por ke rimede timoj de alioj, li superfortu sian propran timon”.

Kaj Meddah diris: “Mi estas Meddah kaj fabelisto, kaj pro tio mi nun diras al vi: **Estas, ne estas, estas du infanoj.** Ili iras arbaron. Tie estas kuka bela dometo, kie vivas maljuna sorĉistino. La sorĉistino havas grandan kuiran kaserolon. Kaserolegon. Kaj kiam en arbaro, nemalproksime de sia dometo, sorĉistino vidas infanojn, ŝi tuj pensas: “Mi, delogante infanojn, alkondukos ilin mian dometon. Poste mi ŝovos ilin en kaserolegon. Poste mi kuiras kaj manĝaĉos.

Tiel, ŝafideto mia. La sorĉistino vivis en Frankujo kaj ne en Anatolio. Ĉi tie ĉio estas tute alimaniere”.

Ĉi tie vere ĉio estas alimaniere, kaj infanetojn oni ne kuiras en grandega kuirkaserolo. Kaj tamen por multoj ĉi tie estas pli malbone kaj pli multterure, ol por infanoj, kuirotaj en grandegaj kaseroloj. La teruro ĉi tie plimultiĝas ne el vaporo, leviĝanta el konata kaserolo, ĉi tie la teruro ĉie pendiĝas en aero. Kaj oni volas, aŭ ne volas, devos enspiri tiun aeron.

Kaj mi diros al vi, ŝafideto mia, estis iu en sia tempo, povinta eligi timon el sia koro. Sed tiu ne atingis Anatonion.

- Estis printempo de 1915 jaro, - diris la fabelisto. - La prepara tempo de masakro de tuta popolo aŭ la prepara tempo de oferdono de ŝafido, tiu nomo devis forviŝiĝi el nomlibro. Sed ankoraŭ ne venis la vera tempo. Ankoraŭ kondukiĝis paroladoj, ekzemple, kun via patro, kiu estis ordinara aŭ eksordinara vilaĝano, ĉar li estis sterkvendisto, ankaŭ nokta gardisto k.t.p.. Li ankaŭ estis poeto. Sed ankoraŭ la tempo ne estis oportuna. Oni ankoraŭ okupiĝis per li. Oni lin alkondukis tra la malliberujo, montris, kiel iuj hufferis pastron. Oni al li montris ankaŭ iliajn torturmanierojn, pri kiuj nun mi ne tute volas rakonti, ĉar... Tie estis eltirintaj ungoj, dentoj. Krevitaj ventroj, plenitaj

kun kanalarakvoj kaj puso, verŝita tra buŝoj, pusataj piedpartoj – vergbatataj dum tuta tago de turkgardistoj, finfine segilitaj kaj forĵetitaj, ĉar ili ne toleris fiordon. Via patro vidis ĉion, vidis ankaŭ kadavrokaleŝojn, ĉiutage veturintajn el korto de malliberujo. Li aŭdis ankaŭ hurladon de hundoj, ĉar fiordoj de putrado kaj gangreno ne restis ĉe murzono”.

Kaj la fabelisto, nomita sin Meddah diris:

- Via patro sole sidas en sia kelo. Kaj tamen li ne estas sole, ĉar li sidas ĉirkaŭita per societo de siaj timoj. Ĉu taŭgos rakonti al vi pri liaj timoj?

- Jes, - diris la Lasta Penso.

- Ĉu ankaŭ pri liaj veksituaj sonĝoj, kiujn flustras timoj en liaj oreloj?

- Jes, - diris la Lasta Penso.

- Aŭ ĉu mi devos lasi, ke timoj mem rakontu?

- Kiel vi volas, - diris la Lasta Penso.

Kaj timoj de Vardan Ĥatisjan rakontis al la fabelisto historion de veksitua sonĝo, ke li vidis en sia kelo. Kaj la fabelisto rakontis tion al la Lasta Penso.

- lumatene, - diris la fabelisto, - larĝe malfermiĝis pordo de kelo kaj kun akompano de du zaptiĥoj eniris la mjudio. Sed ekstere staris la tria zaptiĥo kaj unu eta kurbpieda homo, kiun la tria zaptiĥo pakis vindmaniere kaj kiun li puŝis en kelon. Nun ili estis kvinope – la mjudio, tri zaptiĥoj kaj kurbpieda hometo. Vidante kurbpiedan hometon, via patro tre timis, ĉar hometo similis mortanĝelon, viditan dum infaneco en sia sonĝo de via patro. Li aŭdis ankaŭ kiel la mjudio diris:

- Je l'onomo de Alaho, ni ĝuste lin atendis.

Poste via patro senkonsciĝis.

Rekonsciĝante, via patro rimarkis, ke la mortanĝelo ankaŭ timas. Tiu estas hometo kun grandaj nigraj timitaj okuloj. Li estas aglonaza kaj havis strangajn kurbajn piedojn.

La mjudio diris:

- Li estas cementafera majstro.

La mjudio kun ŝurado batis postaĵon de unu el zaptiĥoj:

- Ĉu vi scias, kio estas cemento? - demandis li.

- Ne, mjudio bejo, - diris zaptiĥo. - Je l'onomo de Alaho. Mi ne scias.

La mjudio demandis aliajn zaptiĥojn, ĉu ili scias, kio estas cemento?

Kaj zaptiĥoj respondis:

- Ne, mjudio bejo. Je l'onomo de Alaho. Ni ne scias.

La mjudio demandis mortanĝelon, kiu reale estis eta timema armeno kun kurbaj piedoj, granda kalvaĵo, agla nazo, grandaj nigraj okuloj.

- Ĉu vi scias kio estas cemento?

Kaj la hometo diris:

- Jes. Mi estas cementafera majstro.

- En ĉi tia landparto ne estas cemento, - diris la mjudio al via patro.

- Sed en Konstantinopolo kaj aliaj grandaj urboj cemento estas. Tiu ĉi homo, - kaj li montris timantan etan armenon, - estis en Zmjurnio, kie laboris ĉe fremda konstruisto, kaj li alportis saketon da tio diabla polvo.

- Saketon mi kunalportis, - diris hometo.

- Rakontu por li, - kaj la mjudio montris vian patron, - kio estas cemento kaj kion eblas fari per ĝi.

- Cemento estas polvo, - diris la hometo, - kion oni inventis en Okcidento, tie inventiĝadas ĉio diabla... Se ĉi tiun polvon miksi kun iometa sablo kaj akvo, post difinita tempo ĝi firmiĝos. Kaj ĝi nomiĝos betono.

- Ĉu betono?

- Jes, betono.

- Kaj kian firmecon havas betono?

- Ĝi estas tre firma, mjudio bejo.

- Kion okazos, se miksanĉe cementon, iu senatente ŝovos fingron en ĝi?

- En kia miksaĵo?

- En cementa miksaĵo.
- Tute nenio, mjudiro bejo. Nenio okazos, se tuj eltiros fingron.
- Kaj ĉu iu ne eltirus, sed lasus en ĝi?
- La fingro restus en miksaĵo. Ĉar miksaĵo post difinita tempo iĝis betonon. Kiel mi diris iomete antaŭ.

- T.e. senakviĝos.

- Jes.

- Ĉu estos firma, fortika maso?

- Ĝuste tiel.

- Ĉu povas signifi, ke homo neniam povas eltiri fingron?

- Jes, mjudiro bejo. Plu neniam.

- Kaj kio okazos, se iu sian voston ŝovos en tian cementan miksaĵon?

- Tute nenio, mjudiro bejo. Nenio okazos, se homo tuj eligos sian voston.

- Sed se li ne eligos ĝin?

- Do, vosto restos tie.

- Kaj ĉu plu ne povos eltiri ĝin?

- Ĝuste tiel.

- Do ĉu vosto por ĉiam firme fiksiĝos?

- Jes, mjudiro bejo. Por ĉiam kaj eterne.

La fabelisto diris al la Lasta Penso:

- Ĉu vi vidas, kiel ili timigas vian patron? - Poste ree diris: - Kion mi diris al vi: tiu, kiu detruis senton de timo, neniam atingis Anatolion.

- Nur senkreduloj povas inventi similaĵon, - diris la mjudiro, - kaj ĉasitaj de satanoj.

- Jes, - diris la hometo, - estas ĝuste. - Kaj diris, - mi estas cementafera majstro.

- Tiu ĉi cementafera majstro estas armeno, - diris la mjudiro al zaptiĥoj. - Li apartenas al raso, kiu estas fripona kaj konspiras kontraŭ

tuta homaro. La armenoj estas tromemfidaj kaj ribelaj, sed se oni punus, ili rampos antaŭ piedoj de punantoj. Ĝenerale ili estas timema raso kaj tiu fakto tuj ligiĝas kun ilia fekundeco. Tiu ĉi hometo, - kaj li ree montris cementaferan majstron, - havas dek tri infanojn. Kaj li ĝuste scias, kion mi faros kun liaj infanoj, se li ne faros tutan tion, kion mi postulas de li.

- Mi faros ĉion, kion Vi postulas de mi, - diris la cementafera majstro.

La mjudiro diris:

- Ĉiuj armenoj estas konvinkitaj, ke ili estas gefratoj. Diru al via frato, kion mi postulis de vi, kaj kion vi devos fari kun li?

- Vi postulis, ke mi cementu liajn elirajn aperturojn.

- Kiajn eliriajn aperturojn? Klarigu por via frato.

- Unua estas elira aperturo, - diris la cementafera majstro, - tra kiu eliras nedigestaĵoj. Kaj la dua, tra kiu eliras akvo.

Nun la mjudiro ridante turnis al via patro.

- Ĉu nun Vi subskribos konfeson?

- Ne, - diris via patro. - Mi nenion subskribos.

- Ĉio okazonta en gardistejo, - diris la fabelisto, - estas antaŭdecidita, kaj ni duope – vi kaj mi, ŝafideto mia, ĝenerale ni devos esti nur senfantaziaj, ni devos havi primitivan zaptihan fantazion, por ke imagi sekvantan veksonĝon: la mjudiro ordonis ŝnurligi vian patron. Zaptiĥoj ŝovis ŝaflanon en lian anuson, ĉar vato mankis kaj nur en germana kuracejo eblis trovi ĝin. Zaptiĥoj ŝovis ŝaflanon ankaŭ en lian urinaperturon (ili ne havis pinĉileton kaj pro tio uzadis alumetojn, akriĝintajn per tranĉilo), plenigis liajn aperturojn kaj ree firme presis, neatentante kriojn de via patro, ankaŭ ne atentis cementaferan majstron, kiu dume prenis sian saketon, ankaŭ unu lignon, ujon kaj komencis verŝi subtilan polvon, poste li eliris alporti iomete sablon kaj akvon, kaj revenis kun longa vipo, per kiu miksis brunan miksaĵon.

- Ni ambaŭ, - diris la fabelisto al la Lasta Penso, - nur estas observantoj, kaj mi – la fabelisto, povas fari ĉion, kion vi ne povas, ŝafideto mia. Mi ankaŭ povas legi pensojn. Sed pensojn de cementafera majstro mi ne deziras legi. Sed mi povas imagi ilin. Kaj mi tiel diros al vi: li ĝenerale nenion pensas, ĉar timas siajn pensojn. Aŭ li ekzemple pensas,

“ĉu saflano sufiĉas fermi aperturojn? Kial la mjudio volas, ke krom tio mi stuku aperturojn? Por mi neniam zorgo. Urina aperturo estas tre mallarĝa, anuso estas iomete pli larĝa, ol ĝi, sed ankaŭ ne sufiĉe larĝa, por ke taŭgos la tuta cementprovizo. Mi havas tutan saketon da ĝi”.

Post tio, vestinte malliberejan bluzon, via patro estis pendumita antaŭ krada fenestro. Zaptiĥoj lin pendumis tra akceloj, kaj li estas pendumita, kiel sekata lavaĵo.

- Kiom da tempo taŭgas por sekiĝo de tiu materialo? - demandis zaptiĥo.

- Kelkaj horoj, - diris la cementafera majstro. - Post ĝi iĝos betonon.

- Kaj poste ĉu li neniam povas nek feki, nek urini? - demandis unu el stultaj zaptiĥoj.

- Plu neniam, - diris la mjudio.

- Vi havas kelkajn horojn pensadi pri subskribo de afero, - diris la mjudio al via patro. - Se Vi frue subskribos, ni povas eligi cementon. Sed Vi devos rapidi. Ĉar post sekiĝo estos tre malfrue. Poste Vi ne povos nek fekadi, nek furzi. Kvankam Vi estas armeno, sed tiuj bezonoj estas tuthomaraj... Kaj ĝis Alaho finos Vian vivon, Vi hurlados. Kaj Vi hurlos tiel forte, ke birdoj falos malsupren el ĉielo.

- Se la suno penetros tra la fenestro en kelon, - diris la cementafera majstro, - tiu ĉi materialo pli rapide sekiĝos.

- La suno ankoraŭ ne estas super korto de malliberejo, - diris la mjudio.

Kaj unu el stultaj zaptiĥoj diris:

- Laŭ mia opinio, ĉar nun estas frumatene, la suno atingos ĉi tien nur iomete antaŭe tagmeza preĝo.

Via patro sole estis pendumita en sia kelo. Ie sonis la voĉo de lia patrino. Li klare aŭdis ĝin:

- Mia filo, kial mi naskis vin?

Li estis kvinjara kaj sidis sur genuoj de sia patrino.

- Kiel mi naskiĝis, patrino?

- Mi ne scias, mia eta paŝao.

- Kaj kiu scias?
- Via avino scias.

- Avino, kiel mi naskiĝis?
- Kiel ĉiuj armenaj infanoj.
- Sed kiel, avino?
- Nu, armenaj knabinoj naskiĝas sub figarbo.
- Kaj ĉu armenaj knaboj?
- Sub vito.
- Sed ĉi tie, ĉe ni ne estas vitoj.
- Estas ĝuste, - diris la avino. - Ĉi tie estas montmondo kaj ĉi tie estas nur malĝojozaj kampoj.
- Kaj kie estas mia vito?
- Malantaŭ kurdaj montoj. En kontraŭa flanko. Tie, kie estas maro.
- Ĉu ĝi estas malproksime?
- Ne, mia eta paŝao. Du tagoj, se veturi en azenĉareto.
- Ĉu malantaŭ montoj, kie estas maro?
- Jes, mia eta paŝao.
- Ĉu tie estas lando de vitoj?
- Jes. Tie estas lando de vitoj.

- Kiam naskiĝas armenaj infanoj, la Dipatrino ridetas kaj benas ĉiujn figarbojn kaj vitojn kaj anĝelvoĉe ĉirpadas ĉiuj birdoj de Armena mondo.

- Rakontu, kiel mi naskiĝis.
- Mi tiom ĝuste ne scias, mia anĝeleto.
- Sed kiu scias ĝuste?
- Nu, kiu, se ne via vito? Ĝi scias, mia anĝeleto.

Kaj liaj gepatroj ensidis azenĉareton, veturis alporti lin. Lia patrino havas grandan ventron kaj estis naŭa monato de gravedeco. Kaj ĉar naskdoloroj jam komenciĝis, ŝi kriis kaj ĝemis. La patrino diris al lia patro:

- Pelu azenon. Ĝi devos rapide kuri. Ĉar mia eta Vardan kuŝas sub vito kaj atendas nin, por ke gepatroj prenu sin...

Kaj la patro diris:

- Jes, mi stimulos azenon, ke ĝi rapidu. Sed azeno estas azeno. Nenia vipo, eĉ la plej bona, ne povas devigi azenon rapidi.

La azeno paŝis malrapide, tra Kurdistano. Montoj iom post iom pli altiĝis, iliaj pintoj miksis nubojn.

- Azeno estas azeno, - diris la patro.

- Do, preĝu al nia Savanto.

Kaj lia patrino ekpreĝis al tiu, kiu mortis por ĉiuj ni.

- Jesuo, - murmuris ŝi. - Helpu min!

Kaj ŝi aŭdis, kiel Jesuo diris:

- Mi helpas vin. Vi nenian doloron plu sentos. Kaj vere doloroj ĉesiĝis. La azeno tra la nuboj tiradis ĉaron. Tiel altaj estis kurdaj montoj, ke kapo de homo turniĝis, rigardante malsupren – duonnomadajn kurdajn vilaĝojn, aŭ pli malproksimen tute malsuprajn kampojn, kie vivas armenoj.

- Mi plu ne havas doloron, - diris lia patrino al lia patro. La Dio aŭdis mian voĉon.

- Nu, bone, - diris lia patro.

- Ĉu vere necesas du tagoj atingi vitojn?

- Jes, se azeno ne haltus.

- Kaj ĉu vi pensas, ke nia Vardan tiom longe atendas nin?

- Certe atendas.

Tamen survoje mamoj de lia patrino pleniĝis per multa lakto. La mamoj poste multe ŝvelis kaj grandiĝis, ĝis finfine iĝis du pezajn saketojn kaj pendiĝis tra flankligno de azenĉareto.

- La lakto plu ne povas atendi, - diris lia patrino al lia patro.

- La lakto serĉas buŝeton de nia eta Vardan, - diris lia patro.

- Sed nia Vardan ja ankoraŭ kuŝas sub vito.

- Li kuŝas tie, - diris lia patro.

- Ni devis kunpreni hundidon, - diris lia patrino. - Ciganinoj faras tiel, kiam havas tre multan lakton, ili donas mamon al hundido suĉi.

- Baldaŭ ni estos tie, - diris lia patro. - Tiom da tempo la lakto atendos.

- Kiom da tempo?

- Ĝis vi prenos nian etan Vardan kaj aldonos patrinlakton.
- Verŝajne li havas malsatan muzeleton.
- Jes, - diris lia patro.

Sed la lakto ne volis atendi. Kaj azeno kapricis, pli kaj pli iradis malrapide. Iam post iam ĝi haltadis kaj ne volis daŭrigi vojon. Sed la lakto ne povis atendi.

Kaj subite patrinaj grandaj laktosaketoj krevis. Kaj realaj laktaj fontoj ekfluis sur montoj malsupren kaj akvumis anatoliajn valojn. Kaj pli multe kaj multe da lakto fluadis. Fontoj iĝis riverojn, riveroj – marojn. Tuta mondo pleniĝis per lia patrinlakto. Nur vito, sub kiu estis kuŝita nia eta Vardan, estis sur seka loko. Kaj eta Vardan kriis kaj kriis. Li kriis pro patrinlakto – estinta ĉie, sed ne ĉe li.

Vardan Ĥatisjan estis pendumita, kvazaŭ por ke sekiĝu antaŭ krada fenestro, en sia kelo. Li sentis postulon de sia natura bezono, sed ne povis. Li alvokis sian patrinon. Sed venis nur zaptiĥo.

Kaj li demandis:

- Kio okazis?
- Mi pli ne povas toleri, zaptiĥo agao.
- Ĉu mi alvoku la mjudiron?
- Jes.

La mjudio venis en kelon.

- Ĉu ni malfermu Viajn elirojn?
- Jes, mjudio bejo.
- Kaj kiel estos la demando de konfeso? Ĉu Vi subskribos?
- Ne.

- Sed, efendio... Ĉu Vi ne komprenas? Nur tiam ni ekkomencos malfermi Viajn elirojn, kiam Vi estos preta subskribi.

Vardan Ĥatisjan ekhurlis. Kaj la mjudio momente atendis, ke li hurlo.

- Vere, mi komplezas, permesante Vin, subskribi, - diris la mjudio. - Tio estas granda komplezo, kaj pri tio Vi devos peti min.
- Mi plu ne povas toleri, mjudio bejo.

- Ĉu Vi subskribos, efendio?
- Jes, mjudiro bejo.
- Ĉu Vi petas pri tio?
- Mi petas pri tio, mjudiro bejo.

Ili malligis Vardan Ĥatisjan. Cementon, ankoraŭ ne sekitan kaj ne firmitan, ili forigis, ŝaflanon fortiris el urintruo kaj anuso. La zaptiĥo alportis por li pantalonon kaj helpis lin vesti. Sed ĝis li povos butonumi pantalonon, okazis la neeviteblaĵo.

- Li faris en pantalono, - diris la zaptiĥo.
- Nenion, - diris la mjudiro. - Estis atendonta.

La Lasta Penso provis senti sian patran timon, sed ĉar li jam trovis ekstere timo, nenion sentis. La fabelisto sidigis la Lastan Penson sur skribtablo de la mjudiro, kaj ĉar neniu estis en oficejo (pordo ankaŭ estis ŝlosita) kaj la fabelisto dissternis malhelkoloran fabelkovrilon sur la ĥjukjumeto, murzono, malliberejo kun lia patra kelo, li nenion povis vidi kaj nenion povis imagi.

- Ĉu tio estas ĝusta historio aŭ ne?
- Ĉio farita en homa kapo, estas ĝusta, - diris la fabelisto, - malgraŭ tio estas alia realeco, ol reala realeco, kiun ofte ŝajnas al ni senreala.
- Sed tion mi ne komprenas.
- Ne gravas, - diris la fabelisto. - Pli frue mi eksplikis al vi, tiuj estas timoj de via patro, kiuj rakontis al mi ĉi tiun historion, kaj mi rakontis al vi. Tiuj estas inkuboj de liaj inkuboj.
- Kial mia patro ne povas forpeli siajn timojn?
- Ĉar li iĝis cedema, ŝafideto mia. Ĉar lia animo plu ne havas fortojn. Ĉar tro multon li vidis en tiu ĉi malliberejo, ĉar scias, se la mjudiro volos, povas realigi inkubojn. La fabelisto atendis gravan demandon de la Lasta Penso, tio estas: "Ĉu mia patro subskribis? Ĉu li krimon akceptos"? Sed la Lasta Penso ne demandis. Pro tio la fabelisto nun diris:

- Via patro vidis, kiel ili ĥufferis pastron, li vidis ankaŭ pli malbonajn iojn, li aŭdis kriojn de turmentitoj, komence nur de malproksimo, kaj poste de mateno ĝis vespero, kaj pli malfrue – dum

tuta nokto. Tuta malliberejo estis plenita per krioj. Kaj kiel mi diris al vi, via patro iĝis senvola. Kaj la plej antaŭe li ne sciis, kiajn intencojn havis la mjudiro kontraŭ lin, kaj tio lin preskaŭ frenezigis, ĉar komencis imagi neimageblan. Kaj unu matene...

- Kio okazis unu matene?

- Unu matene la mjudiro postulis, ke zaptiĥoj portu vian patron en sian laborĉambron. Li ĝentile demandis:

- Ĉu Vi scias, kiel fartas Via edzino?

- Mi ne scias, - diris via patro. - Mi ne havas sciigon pri ŝi.

- Ni scias, ke ŝi estas graveda, - diris la mjudiro... en kvina monato, ĉu estas ĝuste?

- En sesa, - diris via patro.

- Kaj ĉu estos knabo?

- Ni esperas, - diris via patro.

- Ĉu Vi volas heredanton?

- Jes, - diris via patro.

- Kiel Vi nomos Vian filon?

- Ni volas nomi lin Tovma, - diris via patro.

- Tovma Ĥatisjan, - diris la mjudiro, - estas vera armena nomo.

- Jes, - diris via patro.

- Ni malliberis Vian edzinon, - diris la mjudiro. - Nun ŝi estas en virina malliberejo de Bekiro.

- Tio ne povas esti, - diris via patro. - Tamen tio ne eblas.

- Kaj kial ne povas esti?

- Ĉar ŝi nenian krimon faris.

- Multoj, kvazaŭ nenian krimon faris, - diris la mjudiro..., - kaj tamen devos malliberiĝi.

- Jes, - diris via patro.

- Vian edzinon ni tenas nur kiel garantiulinon, - diris la mjudiro, - ... kaj...

- Ĉu kiel garantiulinon?

- Jes, - diris la mjudiro.

- Vi ne timu, - diris la mjudiro, - Via edzino troviĝas sub mia persona protekto. Nenio okazos kun ŝi. Ni nur mortigos nenaskitan infanon, se Vi ne subskribos.

- Ĉu mian filon, Tovma?

- Vian filon Tovma.

La mjudio ridetis kaj poste eliris unu el kestojn de sia skribtablo kaj eligis kelkajn aĵojn de via patrino. Tiuj estis enlanda pasporto, nomiĝata **teskere**, ankaŭ kelkaj ornamaĵoj, aĉetitaj de via patro, ankaŭ ĉeestis edziĝfestena vualo – ĉiuj konataj aĵoj.

- Rigardu, - diris la mjudio. - Ni vere malliberis Vian edzinon. Ĉu Vi kredas tion?

- Jes, - diris via patro.

- Kaj kun Via edzino ni malliberis ankaŭ Vian filon, kvankam li ankoraŭ ne naskiĝis.

- Ĉu mian filon – Tovma?

- Vian filon – Tovma.

- Ĉu mian filon? - diris via patro. - Mian filon?

- Li estas ĉiuloke, kie estas Via edzino.

- Tovma, - diris via patro. - Mia eta Tovma!

- Mi nenion faros kun Via filo, se Vi subskribos. Ĉu Vi subskribos?

- Jes, - diris via patro, - mi subskribos.

Via patro subskribis. Li metis sian subskribon apud aliaj subskriboj, jam atestantaj, ke subskribantoj vidis, kiel li subskribis per lia propra mano. La mjudio estis tro afabla. Li diris:

- Certe tio ne sufiĉas. Vi devos ankaŭ...en Konstantinopolo... antaŭ monda socio... doni depozicion.

- Jes, - diris via patro.

- Kaj en Konstantinopolo Vi ne rezignos, ĉar ni Vian edzinon tenos kiel garantiulinon tiom da tempo, ĝis Vi ĉion konfesos en Konstantinopolo.

- Jes, - diris via patro.

- Kaj ĉu Vi scias, kio okazos kun Via filo, se Vi en Konstantinopolo rezignus Vian konfesion?

- Mi nenion rezignos.

- Ĉi tie ankaŭ estas io, - diris la mjudio. - Postmorgaŭ kelkaj sinjoroj venos en mian oficejon. Tiuj sinjoroj tre volus aŭskulti buŝe tion,

kio estas skribita en konfeso. Do, Vi devos tian skribitan konfeson, subskribitan per Via propra mano, lerni parkere, kaj parkere ripeti antaŭ ĉeestontoj postmorgaŭ. Tio estas io simila al grava repeticio, laŭ ĝi ni scias, kian depozicion Vi donos en Konstantinopolo. Por ke faru nenian eraron, ĉu Vi komprenas?

- Mi komprenas, - diris via patro.

- Efendio, prenu kopion de skribita konfeso en Vian kelon. Kaj lernu parkere. Kaj antaŭ sinjoroj konfesu ĉion estantan tie.

- Jes, miudiro bejo.

- En skribita konfeso mankas kelkaj ioj. Laŭ Vi kompletigu kaj respondu ĉiujn demandojn, kiujn mi aŭ sinjoroj donos al Vi. Respondu koncize kaj klare. Tiuj devos soni kredinde kaj nature, kaj neniel parkerlerne. Ĉu Vi komprenas?

- Jes, miudiro bejo.

- Kaj pensu pri Via eta Tovma.

- Jes, miudiro bejo.

- Post du tagoj kio ludiĝis en mjudira oficejo, ankoraŭ ne estis granda juĝo, - diris la fabelisto, - ĉar tio devos okazi en Konstantinopolo, kaj ĉar sinjoroj, ĉeestintaj en mjudira oficejo, ne estis juĝistoj, nur estis atestuloj. La mjudiro insistis, ke tio estas nur ĝenerala parkera ripeto de konfeso, sed reale tute ne estis tiel. Reale tio estis nur unu konfeso de tuta serio ĉeeste atestuloj ĝis ĝenerala konfeso, kiun devis refari via patro en Konstantinopolo en juĝa halo antaŭ tutmonda socio kaj por oreloj de juĝesploristoj. Ĉu vi komprenas tion?

- Ne, - diris la Lasta Penso.

- Nu, bone, - diris la fabelisto. - Mi klarigos al vi: via patro devos konfesi tion, pri kiu, ni ambaŭ – vi kaj mi, nenian ĝuston scias. Ni nur scias, ke la mjudiro mem elpensis tian konfeson. Kaj tia konfeso ligiĝas kun mistera armena tutmonda konspiro kaj iel via patro estis miksita en tio. Ĉi tiu konfeso estas elpensita tre brave, rimede de scienca kunlaborado de la mjudiro, valio, mutesarifo kaj supera skribisto. Tio estas elpensita senhonte, sed baziĝas sur tute evidentaj fikciaj punktoj. La mjudiro sian elpenŝaĵon skribe verkis kaj devigis vian patron

subskribi. Tiun cirkonstancon, ke subskribo estas vera, siaflanke atestas aliaj sinjoroj – la valio, mutesarifo, kajmakamo, certe ankaŭ mjudio kaj supera skribisto, kvankam antaŭ subskribo de via patro.

- Tion mi komprenas, - diris la Lasta Penso.

- Ĉion mi jam foje diris, sed ree diras. Kaj mi ree diras, ĉar nun via patro devos buŝe ripeti, kio estas en skriba konfeso, por ke poste li devus doni depozicion en Konstantinopolo antaŭ tutmonda socio. Konstantinopolaj sinjoroj ne bezonos riski, se oni donos eblecon depozicii antaŭ monda socio. La donita konfeso en la mjudira laborĉambro tute ne estis la ĝenerala ripeto, kvankam la mjudio tiel nomis ĝin, sed nur unu ripeto inter multaj ripetoj, iutage prosperontaj al ĝenerala ripeto kaj poste al finfina depozicio antaŭ socio de mondo.

- Mi ekkomencas percepti, - diris la Lasta Penso. - Sed, vere, kion volas konfesi mia patro?

- Baldaŭ vi aŭskultos, - diris la fabelisto.

6.

- Do, vi devos imagi, - diris la fabelisto, - ke en laborĉambro de la mjudio kolektiĝis ĉiuj ili, kiujn la mjudio invitis, kiel portempaj atestantoj. La valio de Bekiro, kajmakamo, supera skribisto, kelkaj aliaj turkaj oficiroj, ankaŭ tri germananoj, inter ili estis korpetula homoseksa leŭtenanto, ankaŭ la majoro kaj parenco de valio, krom ili unu aŭstria ĵurnalisto, kiu translokiĝis ĉi tie – en loĝejo, nemalproksime de fronto. Ankaŭ estis ĉi tie **kadi** – musulmana juĝisto, sed nur kiel atestulo kaj aŭskultanto, ĉar la afero ne estis por juĝprocezo, sed nur por aŭskulto. Vi ankaŭ devis imagi, ke ĉambro estas tiel plenita per fumo, ke homoseksuala leŭtenanto (li ne fumas) ofte tudas, kiel ankaŭ la supera skribisto, kiu, kiel estas sciate, ankaŭ ne fumas. Vi devas imagi kafon, plenitan en fajnaj tasetoj... kaj dolĉaĵojn kaj **raki**¹⁵. Tri turkaj oficiroj kaj kadi sidas sur kanapo, sed alioj – sur planko, sur oportunaj kusenoj, sur planko sidas ankaŭ germananoj kaj aŭstria ĵurnalisto. Ili ne volas

¹⁵ Alkoholaĵo

fiksrigardiĝi kaj ĝojas, ke povas sidi sur planko, kaj nek sur kanapo, aŭ nek sur du frankaj seĝoj, metitajn ĉe skribtablo. Tri germananoj kaj aŭstrianano delonge komprenis – neniu riskas sidi sur frankaj seĝoj. Tio ne estas deca. Sinjoroj flustras, brutrinkas kafon kaj rakion. Kelkaj sinjoroj kun ĝojego gustumas paŭlvaon, alioj nur maĉadas pipon. Tri germananoj kaj aŭstrianano iam post iam observas malliberulon, kiu sen ĉenoj, timite kaj maltrankvile sidas ĉe skribtablo.

- Vere, kion signifas ĉi tiu tuta spektaklo? - flustras malgrandkorpa homoseksuala leŭtenanto al la majoro. Li parolas germane, kaj scias, ke el turkoj neniu komprenas lin.

- La mjudio volas esti fama en Konstantinopolo, - diras la majoro. - Jam kelkmonate en Konstantinopolo oni serĉas ĉefan kulpulon kaj ne povas trovi.

- Kian krimon faris la malliberulo?

- Baldaŭ ni aŭskultos.

- Efendioj, - diris la mjudio, - domaĝe mi ne havas geografian mapon, kvankam antaŭ kelkaj jaroj mi postulis. Sed kiel vi vidas, mi ne havas. Kaj kial? Nu, diru vi al mi, kial? Ĉar servisto, okupanta pri turkaj mapoj en Konstantinopolo, estas armeno kaj spite li ne sendis al mi mapojn.

La mjudio montris skribtablon.

- Nu, rigardu vi ĉi tiun skribtablon. Ĝi tute estas kovrita per polvo. Zaptiĥo, kiu okupiĝas pri tiu afero, puras polvon nur de unu angulo, kie mi havas kutimon sidi. Kaj dum jaroj... mi mem ne ekvidis tion... Kaj rigardu vi ĉi tiun malpuraĵon sur skribtablo. Eĉ estas mortitaj, tiel dirita balzamitaj muŝoj, kovritaj per polvo, ankoraŭ de Balkana milito en 1912-1913 jaroj. Kaj kion fari, se mi bezonas geografian mapon? Nu, konsilu! Nu, diru mi al vi tre klare – sur tablo en polvo mi pentras mapon, rimede fingro. Nu, ekrigardu tien. Ĉu vi vidas mapon de Turkio? Estas tie.

La sinjoroj nun ekstaris kaj ekrigardis mapon. Precipe miris la germananoj, ĉar vere ili vidis pentritan per fingro geografian mapon en tombejo de mortintaj muŝoj, kovritaj per polvo de tempoj de Balkana milito.

- Kiel turka patrioto, - diris la mjudio, - preskaŭ ĉiam mi konservas mapon en mia menso.

Nun la mjudio paŝis tien kaj reen antaŭ skribtablo, ĝis la sinjoroj denove okupis siajn lokojn.

- Kaj kiu estas kulpulo de tia situacio? - diris la mjudio. - Kiu nin – turkojn, tiel oportune situigas kaj lulante dormigas? Nu, divenu, bonvolu!

- Armenoj, - diris la valio.

- Estas tiel, - diris la mjudio. - En ĉio kulpuloj estas armenoj. Ili nin hipnotis.

- Estas tiel, - diris la valio.

La mjudio nun ree invitis sinjorojn ĉe mapo. Per fingro li pentris cirklon en koro de Turkio.

- Ĉi tiun landon, troviĝantan en koro de Turkio, ni nomas Anatonion. Sed armenoj ĝin nomas Armenion aŭ Hajastan.

- La nomo Armenio ankaŭ estas skribita sur multaj geografiaj mapoj, - diris la germana majoro.

- Kun nomoj Granda Hajk kaj Malgranda Hajk, - diris la aŭstria ĵurnalisto. - La Granda Hajk kvazaŭ devus atingi ĝis persaj kaj rusaj limoj, sed tion mi ne povas ĝuste diri, ĉar mi ne povas ĝuste konservi geografian mapon en kapo, kiel la mjudio.

- Vi estas tute prava, - diris la mjudio, - sed nin ĉimomente interesas nur turka parto de tiu ĉi supozata ŝtato – Granda Hajk.

- Jam estis reĝlando Granda Hajk, - diris la aŭstria ĵurnalisto, - kaj ĝuste ĉi tie.

- Sed tio estis tre delonge, - diris la mjudio, - tiel delonge, ke ne povas konsideri kiel ĝusteco.

- Sekve, ĉu estas fabelo?

- Estas fabelo, - diris la mjudio.

- Sed armenoj volas fabelon de armena reĝlando denove revivigi en estanteco, - diris la mjudio. - Ili esperas, per helpo de rusoj ĉi tie krei armenan ŝtaton, ĉi tie – en koro de Turkio.

- Ĉu ekzistas pri tio pruvoj?

- Referencoj ekzistas, - diris la mjudio. - Referencoj pri armenaj perfidoj, kiuj portas al pruvoj.

- Ĉu finfine ekzistas pruvoj aŭ ne?

- Tio ne gravas, - diris la mjudio. - Gravas nur la kredo, kredo de pruvo, kiu apogas sur kredindaj referencoj. Ĉu vi komprenas tion?

- Ne tute - diris la aŭstria ĵurnalisto.

- La timo sidiĝis sur lango de via patro, - diris la fabelisto, - kaj tiu fakto, ke kun sia eta, ankoraŭ ne naskita filo povas okazi io, se li ne diros tuton, kiun volis aŭskulti la mjudio de li, plus ankoraŭ kelkaj glutoj da rakio, aldonitan de la mjudio por drinki, fortiris timon de la lango de via patro, kaj timo en mensogaj vestaĵoj disvastigis en ĉambro.

- Mi pafis aŭstrian princon kaj lian edzinon en Sarajevo, - diris via patro. - Kaj tion mi faris en la nomo de armena popolo kaj laŭ konvinkeco.

Via patro silentis, poste drinkis unu-du glasetojn da rakio. Sinjoroj ankaŭ silentis, ĝis unu el ili ekridis. Tiu estis aŭstiano.

- Sed, sinjoroj! - diris li. - Tio estas simple ridinda. Kaj tute ne kredebla. Malgraŭ mi estas nur eksterlanda ĵurnalisto de unu viena ĵurnalo, sed scias faktojn, atingintajn ekbrulon de milito. La aŭstria princo kaj lia edzino mortiĝis per mano de bosniana junula naciisto, maltrankvilkaraktera fanatikulo, gimnazisto Gavrilo Princip. Tiu konspiron protektis krimgrupo de serbaj oficiroj kaj **krna ruka – Nigra mano** – sekreta organizaĵo, ĉefa komandanto estas serba kolonelo Dragutin Dimitrieviĉ.

- La ĵurnalaro estas malbone informita, - diris la mjudio. - Kvankam bosniana fanatikulo pafis princon kaj lian edzinon, sed kartoĉoj, trafintaj Kronprinc Franc Ferdinandon kaj lian edzinon estis de tiu ĉi armeno.

- Kaj kiel Vi pruvos?

- Li mem pruvos.

- En 1898 mi elmigris en Amerikon, - diris via patro. - Mi elmigris, ĉar esperis tie trovi laboron, gajni monojn, por ke iutage reveni patrujon, kiel riĉulo. Ne pro tio elmigris, ĉar ĉi tie oni persekutas armenojn, en Turkio neniam oni persekutas armenojn. Tio estas mensogo, elpensita de armena tutmonda konspiro. Tiu mensogo ĝi elpensis, por kompromiti turkojn en mondo.

- Sed tio ne estas ĝusta, - nun diris la aŭstria ĵurnalisto. - Ili mem – junturkoj kaj nuna registaro konfesas, ke dum tempo de antaŭa fiaskita registaro armenoj persekutiĝadis.

- Dum registeco de Abdul Hamid, - nun diris la germana majoro.

- Ĉu Vi parolas pri supozata masakro je la 1895-a jaro, dum kiu kvazaŭ pereis 300 armenoj? - demandis la mjudio tre singarde.

- Statistiko parolas pri 300000, - diris la germana majoro.

- Tio nur estas ciferoj, - diris la mjudio. - Ciferoj nenion signifas.

- La antaŭan registaron ni lasu ekstere de ludo, - diris la valio. - Antaŭa registaro kun ĉefeco de Abdul Hamid estas mortinta. Nun ni havas modernan, progresan kaj justan registaron.

- Jes, valio bejo, - diris la mjudio. - Vi parolas laŭ pensado de ĉiuj.

- Armenoj ĉiam sin fartis bone, - diris la valio. - Kiuj faras egajn biznesojn en Turkio? En kies manoj estas komerco kaj metioj? Kiuj plenventre manĝaĉas je la konto de turkoj?

- Armenoj, - diris la mutesarifo.

La kajmakamo ankaŭ kapjesis kaj diris:

- La armenoj.

- Kaj armenoj ne rajtas plendi kontraŭ ia lando, kie ili fartas bone kaj ĉiam sentis bone. Kaj eĉ se antaŭa registaro mortigis, aŭ pendumis, aŭ pafekzekutis k.t.p. kelkajn da ili, jam delonge armenoj kontraŭ tio ricevis kompenson. Ĉar ili estas tre fekunda popolo kaj havadas multajn infanojn. Kaj aliloke kie naskiĝas milionoj da ili? Kaj kial ili daŭras vivi ĉi tie, se ili sin fartas malbone aŭ iam sentis sin malbone?

- Estas vere, - diris la mjudio.

- Ni ĉiuj sentis sin bone, - diris via patro. La persekutado de armenoj dum tempo de Abdul Hamid estas troigita. Grandparte estas elpensita kaj falsita. Kaj refreŝigo de tiu ĉi mensogo povis deveni nur en delira cerbo de armena tutmonda konspiro.

- Kion Vi scias pri armena tutmonda konspiro? - demandis la mjudio.

- Mi scias multon, - diris via patro. - En Ameriko mi ekrigardis, ke armenaj bonfaraj organizaĵoj daŭre kolektas monojn. Ili venis en mian loĝejon kaj petis donacaĵon.

- Por kio? - demandis la mjudio.
- Kvazaŭ por orfaj infanoj.
- Sed Vi certe scias, ke tio ne estas ĝusta.
- Jes, - diris via patro. - Certe ne povas esti tiom da orfaj infanoj.
Por mi de komenco estis klare, ke tiom da kvanto de monoj certe fluas al poŝoj de naciistoj, por ke aĉeti armilojn.

- Kiaj naciistoj?
- Daŝnakoj... membroj de partio armenaj daŝnakistoj. Ilin ankoraŭ oni nomas **daŝnakistoj**.

- Kaj Vi de kie scias tion?
- De mia bofrato Pesak Muradjan, kun kiu mi havis korespondadon kaj poste mi ankaŭ havis personan paroladon kun li.

- Kiam Vi parolis kun li?
- Post mia reveno. En 1914 jaro.
- Tiu Pesak Muradjan estas unu el gvidantoj de daŝnakoĵ, - diris la mjudio, - danĝera naciisto kaj konspiranto. Li volas ĉi tie, en koro de Turkio, fondi sendependan armenan ŝtaton. Jam kelkmonate ni serĉas lin. Sed li senspure malaperis.

- Daŝnakoj, - ridis aŭstria ĵurnalisto. - La armena nacia partio! Tio vere estas ridinda, mjudio bejo!

- Kial estas ridinda?
- Ĉar ĝi vere ekzistas. Sed kiel mi estas informita, tio estas legitima partio, aŭ estis tia ĝis ekbrulo de milito, la partio rekoniĝis de jure de junturkoj en 1908, post konkero de la regado.

- Estas ĝuste, - diris la mjudio.
- Daŝnakoj jam delonge deklaris pri siaj streboj de sendependeco, - diris aŭstria ĵurnalisto. - Kiam junturkoj konkeris la regadon, ili rezignis kunigite funkcii kun subpremitaj naciaj minoritatoj.

- Estas ĝuste, - diris la mjudio.
- Ĉar junturkoj promesis la samajn rajtojn, kiel al ĉiuj osmanaj civitanoj, tiel ankaŭ al armenoj.

- Estas ĝuste, - diris la mjudio.
- Do, pro kio taŭgas armiloj por daŝnakoj?

- Taŭgas, ĉar ili kun rusoj sekrete kunlaboras, - diris la mjudio.
- Kaj ĉar ili kondutas, kiel kunaganto, sed reale preparas ribelon.
- Ĉu Vi havas pruvojn pri tio?
- Ni havas referencojn, - diris la mjudio.

- Tie – en Ameriko, mi ne interesiĝis pri politiko, - diris via patro.
- Sed al mi ŝajnis sufiĉe suspektinde, kiam venadis monkoklektantoj.
Mi tute ne povis imagi, ke tiom da multajn monojn oni bezonas por tute neekzistantaj orfaj infanoj.

- Sumoj da miliardoj, - diris la mjudio, - ĉar bankmastroj kaj aferistoj en Ameriko kaj tuta mondo abunde financas ilin.

- Jes, - diris via patro. - Estas ĝuste.

- Kaj de kie li povas scii? - demandis la aŭstria ĵurnalisto.

- Mi jam diris, - diris via patro. - Mi tion scias de mia bofrato Pesak Muradjan, vere ĉiuj armenoj scias pri tio, ankaŭ kiuj insistas, ke nenion scias.

- Tiam mi ankaŭ ne sciis ion ĝustan pri armena tutmonda konspiro, - diris via patro, - kvankam vere sciis, ke ekzistas io simila.
Sed kiel mi diris, tie mi ne interesiĝis pri politiko.

- Li estas poeto, - diris la mjudio. - La poetoj pensas, ke ili estas super ĉio kaj tute ne bezonas interesiĝi pri realaj, palpeblaj aĵoj. Sed ĝuste la poetoj iĝas danĝeruloj, kiam eniĝas aferojn, kiujn oni devos lasi al praktikuloj.

- Estas tiel, - diris via patro.

- Kiam Vi ekpartoprenis en praktika realigo de armena celo?

- Pli malfrue, - diris via patro. - En junio de 1914, kiam mi decidis mortigi aŭstrian princon.

- Ĉu ankaŭ lian edzinon?

- Ankaŭ lian edzinon.

- Ĉu tiu ĉi rekomendo povis Vin admiri, kiel poeton?

- Jes, - diris via patro. - Kiel poeto mi havis malklaran imagon pri mondo, kiel ankaŭ pri reciprokaj rilatoj, rimede kiuj vivas homaro. La evento en realigo de kiu mi persone devos partopreni, ekscitis min.

- Kaj ĝenerale kiel Vi atingis tion?
- Rimede rezulto de hazardo, - diris via patro.
- Sed, efendio, - diris la mjudio - Estas nenia hazardo. Ĉio estas fatala kaj antaŭdecidita.

- Printempe, en 1914, mi decidis iomtempe foriri el Ameriko, - diris via patro. - Mi volis renkontiĝi kun mia familio, vivanta en Turkio. Krom tio, mi volis edziĝi kaj elekti edzinon ĝuste en nia vilaĝo.

- Antaŭe Vi jam estis edziĝita, ĉu ne?

- Jes, sed mia unua edzino mortis pro akuŝo.

- Kaj ĉu Vi ne havas heredanton?

- Vi pravas. Mi ne havas heredanton.

- Vi volas havi filon, ĉu ne?

- Jes, mjudio bejo. Antaŭ ĉio mi volas havi filon de mia kunvilaĝanina, honorinda virino, kiu ne montras siajn piedojn al ĉiu fremdulo.

- Ĉu ankaŭ vizaĝon?

- Jes, ankaŭ vizaĝon.

- Mia vojaĝo daŭris kelkajn semajnojn, - diris via patro. - Mi veturis en germana pasaĝera ŝipo, nomita **Graf Ŝverin**. La ŝipo estis tro granda – naĝanta urbo, naĝante tiel trankvile, ŝajnis, ke ĝi navigadis tra lago, tra paca lago.

- Jes, germananoj scias konstrui ŝipon, - diris la mjudio, - kaj estas la same – pasaĝera aŭ milita. Nu, memoru **Gjoben** kaj **Breslaŭ** germanajn militŝipojn, naĝantajn nun sub turka standardo. Anglanoj – tiuj prostituitinfiloj, neniam povas konstrui similajn ŝipojn. Ĉu estas ĝuste, efendioj, aŭ ne?

- Estas ĝuste, - diris la valio. - Rimede Gjoben kaj Breslaŭ ni kanonadis Odeson.

- Germananoj ĉion faras kvalite, - diris la mjudio. - Tio estas nekontestbla. Kaj mi povas bone imagi tion germanan grandan ŝipon Graf Ŝverin, kiu kvazaŭ navigadas tra la lago.

- Germana aferscio estas konfidinda, - diris la valio. - Mi vetas kun vi, efendioj, ke sur simila germana ŝipo neniu suferas pro

marmalsano, kaj mem senkreduloj ne vomadas surtabligatan tie frititan porkaĵon, kaj la plej granda Alaho mem (estu benita lia nomo) rilate germanoj fermas unu okulon, por ke neniu suspektu pri ilia aferscio.

- Nenia marmalsano estas, - diris via patro. - Vi tute pravas, valio bejo.

- Jen, pri kio mi diris, efendioj, - diris la valio.

- Sur la ŝipo mi renkontis armenojn, - diris via patro, - sed ili ĉiuj estis senkulpuloj, havantaj nenian rilatojn kun armena tutmonda konspiro, almenaŭ mi tiel supozis. Ili estis aferistoj. Mi paroladis kun ili, ĉar ili parolis armene. Ni renkontadis sur ferdeko, en restoracio, dum naĝado aŭ dum vesperkunvenoj. Tio estis vere plezura vojaĝo en tia granda germana ŝipo.

- Kiel multaj turistoj, mi ankaŭ kunprenis fotilon, - diris via patro, - por ke hejme mi havu impreson ĉe konatuloj kaj amikoj, pli multe – ĉe miaj familianoj, kun miaj vojaĝaj fotoj, infana ludo, kaj en tio estis nenia politikaĵo, noci Turkion aŭ foti malpermesitaĵojn, kaj nenan penson havis mi disponigi grandajn fotomaterialojn al anglanoj, francoj aŭ rusoj. Vere mi ne havis similajn pensojn, efendioj. Mi estis tute senkulpa turisto kaj krom tio, kiu sciis ankoraŭ en komenco en 1914 jaro? ke tiu ĉi jaro alkondukos grandan militon, milito, alportonta katastrofon por multaj popoloj. Ne, efendioj, tiujn mi ne sciis, kunprenante fotilon, kreu min.

- Parolo nun ne temas pri Via fotilo, - diris la mjudio. - rakontu pri Sarajevo.

- Mi sidis trajnon, veturintan al Parizo, - diris via patro, - kaj ekpensis, al mi ne taŭgas sidi okcidentan ekspreson, por ke veturi de Vieno al Konstantinopolo, sed poste pensis, ke mi devos veturi tra Sarajevo.

- Ĉar Vi tien havis onklon kaj Vi devus doni al li monojn, ĉu ne?

- Jes, mjudiro bejo. De mia alia onklo, kiu estas lia frato kaj vivas en Ameriko. Mi tion promesis.

- Ĉu fripona variaĵo de kambio?

- Pri tio mi tute ne pensis.

- Ĉu krimo pro afableco?

- Jes, mjudiro bejo.

- Daŭrigu rakonti.

- Komence mi trovis nenian plezuron devii de la deca vojo – al Sarajevo, sed poste mi pensis, devos esti sufiĉe amuze, ĉar mia onklo estis kafemastro.

- Kia amuzaĵo povas esti en kafejo?

- Tie ne estas vera kafejo, nu, estas kiel bordelo.

- Kiel ni komprenu tion, efendio!

- Tio estas kafejo kun sekretaj ĉambroj, nomigitaj **separe**¹⁶. En kafejo estis knabinoj, vendeblaj knabinoj, kiujn oni povis konduki el unu de tiuj ĉambroj.

- Kaj ĉu Vi sciis tion?

- Nia tuta familio sciis. Nia tiu onklo estas malgloro de familio. Li havas bonajn rilatojn nur kun amerikana frato. Foje li financis lin alveturi en Amerikon kaj ŝuldiĝis monojn.

- Mi komprenas, - diris la mjudiro.

luj sinjoroj ekridis. Turkaj oficiroj ekflustris inter si.

- Do, ĉu Vi en Sarajevo ne volis nur transdoni monon al Via onklo, sed ankaŭ volis amuziĝi? - la mjudiro afable ridetis. - Mi perceptis, ke malgranda plezuro... antaŭ dua edziĝo... estas balzamo por animo, kiel oni diras, ĉu lasta gustumo de libereco?

- Vi pravas, mjudiro bejo. Mi pensis – veturi Sarajevon, fordoni monon, poste iomete amuziĝi en kafejo, finfine estis digne post kruela laboro dum pasintaj malfacilaj jaroj en Ameriko, soleco... Mi min diris – iomete vivu sen zorgoj ĝis reveno hejmen, poste edziĝos kaj finfine sin ligos kun edzino.

- Tion ni komprenas, - diris ankaŭ la dika valio, kiu ekkomencis sub nazo mallaŭte kaj emociĝite ridi. Lia grasa vizaĝo brilis. En Bosnio estas

¹⁶ Aparta ĉambro (franc).

belulinoj, - diris li, - kvankam oni ne povas akiri ilin en tre juna aĝo, kiel ĉi tie en bordeloj de Bekiro. Ili ĉiuj apartenas al armenoj.

- Ne ĉiuj, - nun diris unu el turkaj oficiroj.

- Rakontu al ni pri Sarajevo, - diris la mjudio al via patro.

- Kiam mi atingis Sarajevon, - diris via patro, - la ĵurnalaro ĝuste tiotempe per batalemaj linioj proklamis ŝtatan viziton de Aŭstria princo kaj lia edzino. Estis ĝuste konata ankaŭ vizittago: en 28 junio de 1914 jaro. En Sarajevo oni apenaŭ povis senti antaŭpreparitan okazaĵon, kiu devos reŝanĝi mondon. Kvankam vere stratoj puriĝis kaj forportiĝis balaaĵo, precipe en kvartaloj de moskeoj kaj de stratoj, ĉirkaŭ bazaroj. Vere, sur stratoj estis pli multe da policoj, ol antaŭe, kaj aŭstria regionaj armeopartoj de garnizono, sed vere antaŭe kelkaj tagoj la ŝtata vizito, ĉio tute ne estis okulfrapa.

- Persone por Vi, kio estis okulfrapanta? - demandis la mjudio.

- Persone por mi estis okulfrapanta tiu, ke tre multaj da armenoj aperis en Sarajevo, kiuj ne estis ĉiloĝantoj.

- De kie Vi sciis, ke tiuj armenoj ne estis ĉiloĝantoj?

- De kafejaj kelneroj, ankaŭ de mia onklo kaj certe de aliaj gastoj, precipe de knabinoj. Ili paroladis pri fremduloj.

- Ĉu vi vidas, efendioj? - diris la mjudio kaj samtempe triumfe rigardis grupon de sinjoroj. - Dum atenca tago armenoj svarmis en Sarajevo, armenoj – tute ne ĉiloĝantaj. De kie venis tiuj ĉiuj? Kaj kial ili venis?

- Sed, mjudio bejo, - diris aŭstria ĵurnalisto. - Ja estis grava tago, ŝtata vizito! De tuta mondo estis vizitantoj, ankaŭ ĵurnalaraĵ laboristoj. Eĉ mi deziris esti en Sarajevo.

- Ĉu Vi estis en Sarajevo?

- Ne, - diris aŭstria ĵurnalisto. - Mia ĵurnalo jam kolegon sendis. Mi ĝis tiu ĉi tago domaĝas pri tio.

- Tio certe estis granda okazintaĵo, - diris la valio.

- Jes, estas tiel, - diris la mjudio.

- Oni antaŭsciigis aŭstrian princon, - diris la mjudio. - Eĉ ni – turkoj, antaŭsciigis lin, ĉar bosnianoj estas danĝera popolo. Ili estas

tiom neantaŭvideblaj, kiom serboj. Tiam estis sciate ebleco de atenco dum ŝtata vizito Bosnion kaj tio ne estis prenita el aero. Mi eĉ dirus: “Ĉiu sciis, ke okazos atenco”.

- Estis tiel, - diris la valio, - ĉiu sciis tion. Eĉ erchercogo sciis. Sed la erchercogo estis tro fiero, por ke deiri.

- Li estis fiero homo, - diris la germana majoro. Enkorpigo de germana oficiro.

- De aŭstria oficiro, - diris aŭstria ĵurnalisto.

- Li ankaŭ sciis, ke mem estis ne amita, - diris la valio. - Kaj tamen li veturis al Sarajevo.

- Tio estis evidenta aŭstria defio, - diris la mjudio. - Ĉar aŭstrianoj nenie estis tiel neamitaj, kiel en Bosnio kaj Hercogovino.

- Estis defio, - diris la valio. - Sed ankaŭ estis gesto de la granda lando, montri al malgranda – kiu estas mastro de lando.

- Estas ĝuste, valio bejo, - diris la mjudio. - Kio okazos, se grandaj montros al malgrandaj, ke mem timas?

- Okazos malbonaĵoj, - diris la valio.

- Rigardu, efendioj, - diris la mjudio. - Nu, ni estu tute sincere. Al kiu apartenas Serbio? Kaj al kiu apartenas Bosnio kaj Hercogovino? He, nu, diru, efendioj! Tiuj provincioj apartenas al ni – turkoj.

- Estas ĝuste, - diris la valio.

- Kaj kiu ribelis je la sepdekaj? Ĉu la turkoj? Ne, efendioj. La serboj ribelis. Kaj kontraŭ kiu? Kontraŭ ni – turkoj. Kaj kial, se vi permesos min demandi? Mi petas, mi diros al vi, efendioj. Nur pro orgojlo. Sen ia kaŭzo. Ĉar kun niaj inklinoj ni ĉiam kondukis bone, malgraŭ ili bredis porkojn kaj lasis kuradi sub malkovra ĉielo en nia lando, kie regas ĝustkreduloj.

- Estas ĝuste, - diris la valio.

- Poste la serboj memstariĝis, - diris la mjudio, - kvankam tuj porkbredistoj neniam povas regi sin, kaj rusoj – tiuj prostituitinfiloj, ankoraŭ helpis ilin. Tio estis dum fino je la sepdekaj jaroj.

- Jes, - diris la valio.

- Sed aŭstrianoj programojn de serboj fiaskigis, kiam en 1878 iliaj armeoj eniris Bosnion kaj Hercogovinon.

- La programon ili fiaskigis, - diris la valio.

- Ĉar serboj deziris unuigi Bosnion kaj Hercegovinon kun sia nova ŝtato, kion ne povis realigi.

- Ĉu ĉar aŭstriaĵoj subite okupis tiujn du provincojn? - demandis la valio.

- Logike, - diris la mjudio.

Ankoraŭ aŭstria ĵurnalisto diris:

- Logike. Tiam ĉi tiujn du provincojn, postulitajn de serboj, ni draste konkeris.

- Ĉi tiuj du provincoj laŭleĝe apartenas al ni, - diris la mjudio.

- Kiel ankaŭ malnova ĉefurbo de Bosnio – Sarajevo, estas turka urbo. Malgraŭ iam mi mem ridadas, kiam pensas, kion okazis tiam – je la 1878-a, kiam Aŭstrio okupis tiujn du provincojn. Mi ridas, ĉar ĝojas, ke serboj ne povis rompi persistecon de tiuj du provincoj.

- Tio estis piedbato al postaĵo de serboj, - diris la valio.

- Tio estis piedbato al iliaj testikoj, - diris la mjudio.

- Nenio tiel afliktis serbojn, - diris la valio, - kiel perdo de Bosnio kaj Hercegovino. Vere estis tiel, ke okupinte tiujn landpartojn, aŭstriaĵoj kvazaŭ fortranĉis testikojn de serboj.

- Kaj pro tio en mondo ne ekzistas popolo, tiel malamanta aŭstriaĵojn, kiel serboj.

- Estas ĝuste, - diris la valio.

- Jam estas tridek ses jaroj, ribeloj ne ĉesas en Bosnio kaj Hercegovino, - diris la mjudio. - Tridek ses jaroj. Vera barelo de pulvo, efendioj, kiu iutage eksplodos.

- Lutage, - diris la valio. - Nur limtempo ne estis fiksita.

- Ĝi fiksiĝis, kiam la erchercogo veturis en Sarajevo.

- Estas tiel, mjudio bejo.

- Ni parolas pri Sarajevo.

- Jes. Pri Sarajevo.

- Ni klaris, - diris la mjudio, - ke plenumita atenco estis antaŭdestinita. Ĉar mi opinias, ke bosniaj naciistoj ne povis permesi similan provokon: aŭstriaĵojn oficialan viziton en sian ĉefurbon.

- Monstra provoko, - diris la valio.

- Se mi ne estus aŭstiano, - diris la aŭstria ĵurnalisto, - kaj fidela civitano de kajzero, mi povus preskaŭ kompreni tiujn bosniajn naciistojn. Sed, efendioj, vere kian aferon havas armenoj ĉi tie?

- Ekspliku por sinjoroj, - diris nun la mjudio, sinturnante al via patro, - kian aferon havas armenoj, kaj kial la tutmonda armena konspiro speciale interesiĝas pri atenco de princo kaj lia edzino?... Kvankam, verdire, tio estas interna afero de bosniaj naciistoj.

- Mi eksplikos por vi, efendioj, - diris via patro.

- Ekspliku.

- Jes, mjudio bejo.

- Tio estas tre grava.

- Tre grava, - diris la valio.

Via patro timoze ĉirkaŭrigardis. Li ŝvetis kaj per vestmaniko viŝis ŝviton de frunto. Momente lia rigardo renkontis kun rigardo de la supera skribisto, kaj en rigardo de la supera skribisto li legis jenajn frazojn: "Ĉi tiu homo mensogas konvene presita teksto. Kaj mensogo estas ensorbita en liaj ĉiuj truetoj, kiel ŝvito aperas sur frunto... Mensogo sur lia frunto estas presita kun grasa literaro, kaj ĉiuj ĉi tie povas legi tion. La mensogo. Malgraŭ li nun klopodas forviŝi tian mensogon...". Li legas ankaŭ aliajn frazojn: "Tiu ĉi homo timas. Se li ne dirus, kion volas aŭskulti la mjudio, lia nenaskita filo neniigis ĝis naskiĝo. Tiu ĉi homo estas en malfeliĉa situacio. Sed li ne havas elekton".

- Efendioj, - diris via patro. - Armenoj, veturintaj en Sarajevon de fremdaj landoj kaj urboj tuj antaŭ ŝtata vizito, estis servopretuloj de armenaj tutmondaj konspirantoj.

- Tion ni scias, efendio, - diris la mjudio. - Pli bone rakontu por ni, kian utilon havis la armena tutmonda konspiro en mortigo de Aŭstria princo kaj lia edzino? Kaj kial ili elektis ĝuste Vin pafi erchercogon kaj lian edzinon?

- Jes, - diris via patro, - mi rakontos por sinjoroj.

- La armena tutmonda konspiro ĝusttempe sendis siajn agentojn en Sarajevon, por ke sekure klari, ĉu afero de atenco plenumiĝas laŭ programo?

- Do, ĉu la armena tutmonda konspiro sciis pri venonta atenco?
- Tuta mondo sciis pri tio, - diris via patro.
- Kaj ĉu en Sarajevo?
- Certe, ankaŭ en Sarajevo. Ĉiuj ankaŭ sciis. Ĵus ĵurnalaro informis pri vizito, por ĉiuj jam estis klare. Oni flustris sur stratoj, paroladis, disputis pri tio en kafejoj. Tia provoko delonge ne estis en bosnia popolo.

- Kaj kion faradis armenoj? - demandis la mjudio.

- Subite armenoj eksvarmis en Sarajevo, - diris via patro. - Ili renkontis en restoracioj kaj kafejoj, precipe apartenantaj al armenoj. Kelkaj armenoj, veturintaj el aliaj urboj, ĉiutage renkontis en la onkla kafejo.

- Ĉu malkaŝe?

- Jes, - diris via patro. - Ili renkontis ĉiutage post tagmanĝo, trinkis kafon, kartludis, ŝercis kun knabinoj, izoliĝis en separeoj.

- Ĉu kun knabinoj?

- Ne. Sen knabinoj.

- Kaj kion ili faris tie?

- Ili programis konspiron.

- Ĝis la atenco mi ankoraŭ vivis en hotelo, - diris via patro, - sed tuttage sidadas en onkla kafejo. Antaŭ du tagoj ĝis ŝtata vizito, mia onklo vokis min flanken kaj parolis kun mi.

- Pri kio li parolis kun Vi?

- Foje mi rakontis al li, ke mi estas senmaltrafa pafisto, - diris via patro. - Armenaj vilaĝanoj ne rajtis havi armilon, ĉar tiam, kiam regis landon de Abdul Hamid, t. e. antaŭ revolucio, estis severe malpermesita, tamen en nia vilaĝo ni havis kaŝitajn kelkajn pafilojn kaj pistolojn, kiujn taŭgis defendi kontraŭ kurdaj rabistoj. Foje mi en adoleskaĝo mortigis kurdon.

- Kaj ĝis nun, ĉu Vi ne mortigis iun?

- Ne, nur unu kurdon. Certe mi mortigis ankaŭ sovaĝajn anasojn kaj anserojn, iam ŝercante mortigis paseron, flugantan en aero. Niaj vilaĝanoj diris, ke filo de Ĥatisjanoj povus mortigi eĉ muŝon en beko de pasero.

- Do, ĉu Vi estas tia celtrafulo?
- Jes.
- Kaj kion volis de Vi via onklo?
- Li diris, ke armenoj en separeo serĉas celtrafulon.
- Kaj ĉu tio ne miris Vin?
- Mi estis tre mirita.

- Poste, tiuj armenoj parolis kun mi. Ili diris al mi, ke bosniaj fanatikuloj programas atencon kontraŭ hercogo, kaj ke krimgrupo de serbaj oficiroj protektas bosnianojn. Ili diris, ke havas ligojn kun ĉi tiu oficira krimgrupo.

- Kaj ili kion volis de Vi?

- Armenoj diris, ke nek serba oficira krimgrupo, nek bosniaj naciistoj, agantaj solidare, nek unua, nek alia estas povebla plenumi veran atencon, ĉar ili ĉiuj estas fantazuloj kaj sentrankvilkarakteruloj. Pro tio (tiel diris armenoj) flanka homo devos fari tiun aferon, kiel mi, kiun neniu suspektos, tian celtrafulon, kiu sukcesos tion. Armenoj ankaŭ diris, ke mi tute ne timu, ĉar tutan krimon oni impotos al serboj kaj bosnianoj. Mi nur devos fari ĉion ĝustege, trankvile, lerte el kaŝejo... poste malaperiĝi en amaso.

- Armenaj konspirantoj al mi klare eksplikis sekvonton. La mortigo de Aŭstria princo kaj lia edzino kun rekomendeco de serba oficira krimgrupo (tio estos variaĵo de ŝtata deklaro) alkondukos al eniro aŭstria militgrupoj Serbion, ĉar aŭstrianoj jam delonge serĉas pretekston finkalkuli kun serboj. Tamen, ĉar rusoj kaj serboj havas militan interhelpan pakton, do, rusoj spontane eniras ludon. Sed mobilizacio de rusoj devos maltrankvili germananojn, kiuj en sia vico, ankaŭ mobiliziĝos. Anglio kaj Francio ankaŭ ne estos trankvile. Tiele, armenoj sciis, ke mortigo de princo kaj lia edzino sur bosnia teritorio, t.e. en Sarajevo, ekbruligos mondmiliton. - Via patro mallonge paŭzis. Poste diris: - En tia tutmonda milito, nature, Turkio ne povos sin deteni. Kaj ĉar turka armeo jam de pasinta jarcento perfektigis kun helpo de germana armeestraro, ne malfacile antaŭvidi, ke Turkio frue aŭ malfrue de germana flanko partoprenos en milito.

- Neordinara antaŭvido de armenaj konspirantoj, - diris la valio.
- Jes, - diris via patro.
- Kaj kian utilon havis armenoj de tia tutmonda milito?
- Armenoj interesiĝis, - diris via patro, - ke Turkio miksu en milito kontraŭ Rusujo. Ĉar estis klare, ke partopreno de Turkio en milito flanke de Germanio kaj Aŭstrio, signifis ankaŭ milito de Turkio kontraŭ Rusujo.
- Klare, - diris la valio.
- Sed rus-turka milito por armenoj signifis forĵeti turkan jugon.
- Kion Vi komprenas, dirante **turkan jugon**, efendio?
- Tute nenion, valio bejo, - diris via patro.- Mi nur klopodas klarigi, kion komprenis armenaj konspirantoj.
- Kaj kion ili komprenis?
- Ili komprenis jenan: antaŭ ĉio Kaŭkazan fronton. Ili pensis, ke neniu povas rezisti rusan fortan atakon. Rusoj alvenos tra Kaŭkazo, eniros Turkion kaj liberigos milionajn armenojn, vivantajn sur turka tero.
- Ĉu okupo Anatolion de rusaj armeopartoj?
- Ĝuste tiel. Okupo de Anatolio. Liberigo milionajn armenojn en apudlimaj regionoj.
- Kaj kion atendas armenoj de rusoj kaj tiel nomata de liberigo?
- Kreeco de Armena ŝtato sur turkaj teroj, ĉar tiu ĉi landparto iam apartenis al armenoj,- diris via patro.
- Estas ĝuste, - diris la germana majoro. - Armenio vere apartenis al ili.
- Anatolio aŭ Armenio aŭ Hajastan. Ili estas la samaj,- diris via patro.
- Kaj ĉu tiu armena ŝtato estos sendependa? – demandis la majoro.
- Ne tute, - diris via patro. - Armena ŝtato sub rusa protekto. Tio estas antaŭvidita.
- Kaj ĉu armenaj konspirantoj konsentas?
- Nur kiel portempa disiĝo, - diris via patro, - sed ili pensas ankaŭ, ke juna ŝtato dum unu momento ne povas rezigni rusan defendecon.
- Ĉu inter armenaj konspirantoj estis rusujaj civitanoj? - demandis la majoro.
- Kelkaj armenoj havis rusajn pasportojn.

- Sed Vi de kien sciis tion?
- Ili parolis armene per tia dialekto, per kiu nur parolas tie – en rusa flanko. Mi sciis de mia onklo, ke ili vere estas rusarmenoj kaj ankaŭ havas rusajn pasportojn.
- Ĉu povas esti, ke armenoj kun rusaj pasportoj estas de rusa sekreta servo?
- Eblas, - diris via patro.
- Ĉu el **oĥrankao?** - demandis la mjudio.
- Mi ne scias, - diris via patro.
- Estas videble, - diris la germana majoro, - ke oĥrankao ion faris, ĉar finfine okupo de Anatolio estus ankaŭ utile por rusa caro.
- Estas tiel, - diris la mjudio.
- Kaj ĉu **daŝnako**j, - demandis la valio, - armenaj naciistoj?
- Ili devus helpi rusojn – eniri landon, - diris via patro.
- Ĉu armena ribelo malantaŭ turka linio?
- Jes, - diris via patro. - Estis antaŭvidita, ke milionoj da armenoj en apudlima regiono kaj malfronto devus ataki turkojn dorsflanke, ĝis cara Kaŭkaza armeo antaŭmarŝos.
- Kaj de kien Vi scias?
- Parton mi sciis de armenaj konspirantoj, multon eksciis de mia bofrato Pesak Muradjan... pli malfrue, kiam por mi klariĝis diversaj ligoj.

- Do, ĉu armenaj konspirantoj venis en Sarajevon, kiam la ŝtata vizitafero de aŭstria princo kaj lia edzino jam sciiĝis? - demandis la mjudio.
- Jes, - diris via patro.
- Kaj ili, se mi ĝuste komprenis, ĉu havis ligojn kun serba oficira krimgrupo?
- Jes, - diris via patro.
- Sed ili ne kredis, ke oficira krimgrupo kaj iliaj servopretuloj vere povus plenumi similan atencon. Kaj pro tio Vi devos fari, ĉu ne, efendio? Vi devos mortigi erchercogon kaj lian edzinon.
- Estas tiel.
- Ĉar ĉu oni Vin ne suspektus? Ĉar ĉu Vi estis flanko homo? Kaj ĉar ĉu oni konsideros respondulojn bosnianojn kaj serbojn?

- Jes, mjudiro bejo.
- Kaj Vi konfirme kaj obstine insistas, ke Vi mem mortigis aŭstrian princon.

- Jes, mjudiro bejo.
- Kaj ankaŭ lian edzinon.
- Estas tiel, mjudiro bejo.

- Kiel mi diris, kelkaj tagoj antaŭ ŝtata vizito (antaŭ kvar tagoj) la konspirantoj konfidis min. Mi supozas pro tio, ke mia onklo diris al ili pri mia bonstato, pri patriotismo, krom tio, ke mi estas poeto.

La konspirantoj longe persvadis min. Ili eksplikis, ke saveco de turkarmenoj realiĝos, se rusoj eniros en landon, kaj necesas ekbruligi militon. Ili diris, ke mi povas iĝi savanton de nacio, se mi efektivigos tiun aferon. Finfine mi cedis. Mi estas poeto, efendioj. Tio kortuŝis min. Mi, vere, vidis min, kiel savanto de armena popolo. Mi vidis mian nomon en estontaj historiaj libroj.

- Jes, - diris la mjudiro.
- Armenaj konspirantoj donis al mi pistolon, - diris via patro. - Ili tion aĉetis de serbaj oficiroj, kun kiuj havas ligan, kaj tiu ĉi Braŭning - pistolon, oni elprenis de serbarmea arsenalo.

- Kiam aldonis oni ĉi tiun pistolon?
- En tiu tago, kiam la princo kaj lia edzino alveturis en Sarajevon.
- T. e. ĉu tuj antaŭ atenco?
- Jes.

- Ĉu tuta Sarajevo dum tiu tago devus esti sur stratoj? - demandis la mjudiro.

- Sur urbaj stratoj svarmis grandegaj amasoj, - diris via patro, - kaj precipe ĉe riverbordo, sur ponto. Ĉie estis policistoj. Ĉie estis strataj barieroj. Kiam malkovrita veturilo de princo kaj lia edzino, veturante de flanko de urba parlamenta konstruaĵo, turnis al strato Franc-Jozef, mi staris tre proksime. Mi kunprenis mian fotilon, ankaŭ pistolon, kiun kaŝigis sub jako, malantaŭ fotilo. La amaso estis maltrankvila. Sur vizaĝoj desegniĝis malamo. Kiam eskorto de

veturiloj proksimiĝis, la amaso rompjis policistan ĉenon tie, kie mi staris, kaj atakis malkovritan veturilon de princo kaj lia edzino. Certe policistoj tuj forpuŝis homojn, sed veturilo restis halte.

- Kaj ĉu Vi tiam pafis?

- Ne, efendioj. Mi ankoraŭ hezitis. La malkovrita veturilo, kie sur malantaŭa benko sidiĝis Franc Ferdinand apud sia edzino, ree ekveturis, sed tre malrapide. Mi klopodis kuri apude la veturilo, sed daŭre depuŝiĝis. Mi kuris kaj kuris apude la veturilo, kiu ree haltis sur angulo de stratoj Franc-Jozef kaj Rudolf.

- Kaj subite mi ekvidis junulon kun pistolo en mano. Li similis studenton. Li staris tre malproksime de mi. Mi vidis, kiel li kuris al la veturilo, rompjis policistan ĉenon, kaj vidis, kiel li pafis princon kaj lian edzinon.

- Tiuj estis Sarajevaj historiaj pafoj, - diris la germana majoro, - mortigaj pafoj de Gavrilo Princip, mortigintaj erchercogon kaj lian edzinon.

- Laŭ rekomendo de serbaj oficiraj krimgrupoj, - diris homoseksuala leŭtenanto.

- Tiel devus okazi, - diris via patro. - Sed la kugloj ne celtrafis erchercogon. Kaj nek lian edzinon. Post kelkaj sekundoj de pafado de bosniano, pafis ankaŭ jam mi. Sed mi estis celtrafulo kaj celtrafis hercogon, celtrafis ankaŭ lian edzinon, sidantan apud li.

- Sed, tamen, ne povas esti tiel, - diris la germana majoro. - Estas pruvita, kiu mortigis princon kaj lian edzinon. Eĉ oni komparis la kuglojn. Tiuj ellasiĝis el pistolo de bosnia naciisto Gavrilo Princip. Ĉi tie estas nenia miskompreno.

- Nia malliberulo havis ĝustan pistolon, kiel bosniano, - diris la mjudio, - el serbarmea arsenalo, senditan de serba krimgrupo, tiuj estas samspecaj pistoloj.

- Ĉu Vi volas konfirmi, ke kugloj poste eligitaj el korpoj de viktimoj, povas eliri ankaŭ el pistolo de ĉi tiu homo?

- Jes, ni volas konfirmi ĝuste tion, - diris la mjudio.

- Kaj kiel Vi volas konfirmi ĉion? - demandis la germana majoro.
- La depozicio de tiu ĉi homo estas pruvo.
- Sed, tamen, tio ne sufiĉas, mjudiro bejo. Kie estas lia pistolo?
- Li forĵetis.
- Estas ĝuste, - diris via patro.
- Kaj ĉu estas atestuloj, - diris la germana majoro.
- Atestuloj ne estas, - diris la mjudiro. - Armenaj konspirantoj delonge malaperiĝis en siaj montoj, kaj iliaj veraj nomoj estas ne konataj por ni. Kaj rilate de onklo de malliberulo, dumtempe li forpasis.
- Bedaŭrinde, li forpasis, - diris via patro. - Kaj verajn nomojn de konspirantoj mi ne scias. Ili ne estas tiaj stultuloj, por ke informi al mi.
- Kaj kie estas familio de Via onklo?
- Tio ne koncernas al familio. Nenia familiano estas informita pri afero.
- Kaj ĉu kelneroj?
- Ili same.
- Kaj ĉu knabinoj?
- Knabinoj ankaŭ ne estis informitaj.
- Malgraŭ, necesas ilin juĝesplori, - diris la majoro.
- Tio estis malŝparo de tempo, - diris via patro. - Nek knabinoj, nek kelneroj povis scii, pri kio oni parolas en separeoj, tiuj povis esti ankaŭ kontraktoj, diversaj transakcioj. Kaj dum parolado pri atenco mi estis sole. Tute sole. En tiu grandega amaso neniu min ekrigardis. Neniu min vidis.
- Estas monstre, - diris la majoro. - Sed tio estas akuzo sen atestuloj kaj sen pruvoj.
- Tiu ĉi homo estas atestulo, - diris la mjudiro.
- Estas monstre, - diris la majoro. - Sed neniu kredos tian depozicion.
- Ni prizorgos, por ke oni kredu, - diris la mjudiro.

- Post la atenco mi iomtempe restis en Sarajevo, - diris via patro.
- Neniu vidis mian pistolon, kion mi kaŝis sub mia fotilo. Oni apenaŭ aŭdis pafojn, sed pro densa amaso kaj bruo, oni konfuzis kun pafoj de bosniana atencisto.

- Jes. Mi ankoraŭ dum kelkaj semajnoj restis en Sarajevo, - diris via patro.

- Pro lia venera malsano, - diris la mjudio.

- Pro ŝajninta venera malsano, - diris via patro.

- Sed ĉu Vi ne havis alian kaŭzon prokrastadi Vian vojaĝon al Turkio?

- Ne, - diris via patro.

- Mi certe atendis aŭstrian ultimaton, - diris via patro. - Sed sukcese mi povis atendi tion en Turkio. Kaj estis nenia politika kaŭzo prokrastadi estontan mian vojaĝon.

- Kaj kiel kun ultimato?

- La tempo pasis, - diris via patro, - kaj ĝi prokrastadiĝis. Pasis semajnoj, kaj nenio okazis. Mi jam pensis, ke aŭstrianoj en la lasta momento timis sekvontaĵojn, kaj atendata milito ne ekbruliĝas.

- Ĉu la milito devus bruliĝi?

- Ĝuste tiel.

- En fino de julio mi decidis finfine daŭrigi mian vojaĝon, kaj tiel en 25 mi atingis Konstantinopolon.

- Ĉu en 25 de julio? Ĉu tri tagoj antaŭ milito?

- Jes.

- Ĉu tio estis hazardeco?

- Nur hazardeco.

- Ĉu Vi ankaŭ ne pensis, ke tiun hazardecon ekrigardos turkaj potenculoj?

- Pri tio mi ne pensis.

- Ĉu poste Vi fotis ĉirkaŭaĵojn de Konstantinopolo dum vaporŝipa promenado? Bosporon, marbordojn de Marmaro, eniron de Dardaneloj, se mi ne eraras.

- Jes, mjudio bejo. Sed mi havis nenian rekomendon kaj faris laŭ propra kuraĝeco.

- Por kia celo?

- Tiam por mi ne tute klare estis, mjudio bejo. Sed mi pensis, se ekbruliĝos milito, mi donos ilin al mia bofrato Pesak, kiu havas ligojn kun rusoj.

- Ĉu, por ke rusoj povu surbordiĝi en Dardaneloj?
- Mi pensas, jes.
- Ĉu aŭ anglanoj kaj francoj surbordiĝu, havantaj pli bonajn ŝiparojn?
- Tiam por mi ne estis tute klare.

- Aŭstrianoj kaj serboj deklaris mobilizon, - diris via patro, - kaj post kelkaj tagoj popoloj ekmilitis. Sed en 25 kaj 26 de julio, t. e. kelkaj tagoj antaŭ de milito, tio preskaŭ ne sentiĝis en Konstantinopolo. Turistoj jam ankoraŭ povis rigardi Bosporon, promenadi en ŝipo, foti. Kvazaŭ turkoj vivis kun sia kutima vivo. Mi restis dum kelkaj tagoj kaj fotis. Ankaŭ mian vestaĵon mi aldonis purigi, preteksto, per kio okaze esplordemando eblos argumenti, kial mi kelkaj tagoj deviĝis resti en ĉefurbo.

- Ĉar ĉu Vi atendis vian vestaĵon?
- Ĝuste tiel.
- Ĉu ĉar ne decas en malpuraj vestaĵoj alveturi hejmen?
- Jes, mjudiro bejo.

- Poste mi vojaĝis al mia familio.

- Ĉu al Anatolio? Ĉu al Bekiro, kaj poste al Jedi Suo?

- Jes, mjudiro bejo.

- Ĉu tie Vi edziĝis?

- Mi edziĝis.

- Ĉu poste Vi havis edziĝvojaĝon al Siria marbordo?

- Jes, mi veturis.

- Kaj ĉu tie ankaŭ Vi fotis?

- Jes.

- Antaŭ ĉiun marbordojn, ĉu ne? Ili estas krutajaj bordoj, sed ekzistas ankaŭ golfetoj, kie malamiko povos surbordiĝi.

- Mi fotis ĝuste lokojn de surbordiĝo.

- Tio estas granda perfido, efendio, - diris la mjudiro.

- Granda perfido, - diris la valio.

La mjudiro sin turnis al grupo de sinjoroj.

- Ni trovis multajn fotoĵojn en lia loĝejo, efendioj, sed tiuj estas senkulpaj fotoĵoj. Gravegajn ni ne trovis. - La mjudiro ridetaĉis, kaj al

ĉirkaŭsiditaj sinjoroj ŝajnis, ke lia okulvitro ankaŭ ridetaĉas.

- Rakontu al sinjoroj, kial ni ne trovis gravajn fotoĵojn, - diris li, sinturnante al via patro.

- Ĉar tiujn mi donis al mia bofrato, - diris via patro.

- Estas tiel, - kun kontento diris la mjudio. - Li donis ilin al sia bofrato Pesak Muradjan – al la plej serĉita daŝnaka gvidanto, kiel vi scias, li estas unu el homoj, kiuj dorsflanke fronto programas ribelon, kunlaborante kun rusoj. Tiuj ĉi homoj nur atendas signalon de rusoj – signalon frapi.

- Ĝuste tiel, kiel diras la mjudio, - diris via patro.

Unu el turkaj oficiroj nun diris:

- Rusoj ĉiam elektas firmteran vojon. Ilia ŝiparo estas ne sufiĉe forta, por ke riski surbordiĝi.

- Maran vojon elektas anglanoj, - diris la dua turka oficiro. - Tamen, supozeble, rusoj tiujn fotoĵojn disponigis al anglanoj.

- Estas ĝuste, - diris la valio.

- Surbordiĝo de anglanoj sur Siria marbordo, kiel ankaŭ Dardaneloj kaj duoninsulo Galipolio, tre faciligus rusan atakon. T. e. por rusoj estas utila, se fotoĵojn ricevos anglanoj.

- Estas tiel, - diris la valio.

En ĉambro sonas voĉo de la fabelisto, kiu surdigis ĉiajn aliajn voĉojn. La fabelisto diris:

- Ili parolu, ŝafideto mia. Ili drinkas rakion kaj trinkas kafon, ĝuas dolĉan paŭlvaon, fumas pipon, cigaredon kaj nargileon. La mjudio aplaŭdas, kaj zaptihoj kuras tien kaj reen kaj alportas freŝan rakion.

Kaj la fabelisto diris:

- Krepuske ili foriris. Zaptihoj la malliberulon alkondukis sian kelon. Ĉiuj iris laŭ sia vojo. Ambaŭ germananoj kaj aŭstriano denove promenis al Beatecpordego. Nun tie estis pendumitaj aliaj armenoj. Kaj ne tri, sed kvin armenoj.

- Kian opinion Vi havas pri konfeso de malliberulo? - demandis la majoro.

- Nenan, - diris aŭstriano. - La kulpulo estis sub premado. Lia konfeso estis absoluta mensogo de komenco ĝis fino. Ŝajnas, ke antaŭe ili tion diktis al li.

- Kiu, ĉu la mjudio?

- Mi supozas.

- En Konstantinopolo oni serĉas kulpulon.

- Oni serĉas multnombrajn kulpulojn.

- Ĉu Vi opinias, ke Enver paŝao laŭ ĉi tiu konfeso de kulpulo povas ekkomenci aferon?

- Ne, mi ne opinias. Tio ne estas argumentita.

- Kaj ĉu la mjudio?

- Li estas mizera fanfaronulo, unu el intelektuloj, kiuj ricevis klarecon en Okcidento kaj volas famiĝi en Konstantinopolo.

- Sed ŝajnas, ke li havas protekton de la valio, ankaŭ de la kajmakamo kaj la mutesarifo.

- Certe. Se la mjudio sukcesos kaj konvinkos Enver, ili ankaŭ havas parton de gloro.

- Kaj ĉu se ne?

- Do, la mjudio iĝos respondeculon.

- Tiu homo estas glorema.

- Certe, estas tiel.

Paroladantaj tri sinjoroj haltis sub la pendumitoj. Malgrandstatura homoseksuala leŭtenanto alflanktiris la majoron kaj aŭstrianon, pli grandajn kaj altajn, ol si, ĉar ektimis, ke iliaj kakikoloraj ĉapeloj tuŝos piedojn de mortintoj.

- Vi scias, - diris la aŭstriano. - La afero de armena tutmonda konspiro evoluas en multaj kapoj. Sed la afero estas en tio, ke estas pli iluzita ideo, ol percepta. Militministro Enver paŝao, kvankam estas fanatikulo kaj iomete ankaŭ idealisto, sed ne estas stultulo, por ke aferon de atenco en Sarajevo atribui al armenoj, ĉar la tuta mondo scias, kiuj estas la veraj kulpuloj. Ne, sinjoroj, similan farson des pli dum publika juĝproceso, Enver paŝao ne permesos sin.

- Vi pravas, - diris la majoro. - Nek Enver, nek iu el lia estraro.

- Precipe Taleat bejo, la ministro pri internaj aferoj, neniam permesos tian malsaĝecon. Taleat estas kruela realisto, senemocia pensanto. Kun tia koncepto, kia estas **tutmonda konspiro**, simila homo nenion povas ekkomenci. Li armenojn konsideras nur kiel interna malamiko.

- Interna malamiko. Povas esti. Sed tia malamiko, kiu havas helpan potencon de ekzilitaj armenoj.

- Tiel aŭ aliel, - diris la aŭstriano. - Registaro ne devos havi aferon kun ia juĝado, kiu estas farso kaj malhonoras sin.

- Kaj kion devos fari la registaro?

- Ĝi devos trovi ian konvinkan pretekston, ian pretekston, apogantan sur pruvoj, por ke antaŭ monda socio kaj antaŭvice aliancaj ŝtatoj pravigi certajn registarajn aranĝaĵojn.

- Sed estas nenia konvinka preteksto, pravigeblaj aranĝaĵoj kontraŭ tuta popolo.

- En Konstantinopolo verŝajne havas ian intencon.

- Ĉu Vi ne opinias, ke restas tre malmulta tempo?

- Kion Vi volas diri? – demandis la aŭstriano.

- Nu, mi volas diri, ke registaraj aranĝoj jam komenciĝis, kaj ĝenerale ne konata estas, kian krimon havas armenoj?

- Hieraŭ mi parolis kun germana konsulo, - diris la majoro.

- Ĉu pri armenoj?

- Pri multaj arestoj kaj mortpunoj.

- Kion diris la konsulo?

- Li jam informis al Berlino kaj protestis al la plej alta instanco. Sed tie jam delonge ili estis informita.

- Ĉu kajzero ne povas ion iniciati kaj postuli ĉesigi tiujn multnombrajn arestojn kaj mortpunojn?

- Kajzero ne miksiĝas en ĉi tiaj aferoj. Krom tio estas milito. La arestoj estas permesitaj ĉie.

- Ĉu ankaŭ mortpunoj?

- Ankaŭ mortpunoj.

- Sed ne kun tia amplekso.

- Vi pravas. Ne en tia amplekso.

- Ĉu ion alian diris la konsulo?
 - Jes. Li diris: “Turkoj preparas masakron”.
 - Ĉu masakron de armenoj?
 - Jes.
 - Ĉi tie ĉiam estas masakro. Tio ne estos novaĵo.
 - Estas ĝuste.
 - Ĉu ion alian ankaŭ diris la konsulo?
 - Jes. Li diris: “Turkoj preparas masakron, kian la monda historio neniam vidis. Tio superpasos historiajn ĉiujn masakrojn”.
 - Kaj de kie li sciis tion?
 - Li ricevis komunikon.
-
- Koncize, ĉu estos granda masakro?
 - Jes.
 - Kiam?
 - Ne estas sciigita.
 - Kion atendas la turkoj?
 - La konvinkigan akuzaferon.
 - Ĉu, por ke turkoj povus akuzi tutan armenan popolon?
 - Jes.
-
- Sed la kajzero devos iniciati decidigajn aranĝojn.
 - Devos.
 - Finfine turkoj pafadas rimede germanaj armiloj.
 - Vi pravas.
 - La konsulo devos informi kajzeron. Li devos telegrami – antaŭvidiĝas masakro, kian ne vidis la tutmonda historio. La oferoj estas kristanoj.
 - Tio neniel helpas.
 - Kial?
 - Ĉar kajzeron ne interesigas, kio eblas okazi.
 - Ĉu Vi opinias, ke antaŭ devos io okazi?
 - Ĝuste tiel.
 - Ĉu necesas faktoj? Ĉu taŭgas konkretaj raportoj?
 - Estas tiel.

- Por ke poste oni petu lin enmiksiĝi?

- Jes.

- Sed poste estos malfrue.

Du germanoj kaj la aŭstria iomete ankaŭ interparolis pri atendota masakro, poste la juna leŭtenanto adiaŭis, por ke en kurda kvartalo dungi hamalon, unu el fortaj ŝarĝportistoj, kies pikstango sub malpura pantalono ne nur tiklis... La germana majoro kaj aŭstria ĵurnalisto ankaŭ pensis pri disŝargo de siaj seksaj streĉoj kaj senrapide paŝis al urba bordelo.

- Ĉu vi pensas, ke germanaj kondomoj gardas de franca malsano? - demandis la germana majoro.

- Ni devos provi, - diris la aŭstria.

- Turkoj sifilison nomas **franca malsano**.

- Jes, mi scias, - diris la germana majoro.

- Necesas sendi telegramon al kajzero Franc-Jozef, - diris la aŭstria.

- Ĉu pri sifiliso, minacanta germanajn armegrupojn.

- Ne. Tio estus kompetenco de kajzero Vilhelm la Dua.

- Tiam, pro kio sendi telegramon al kajzero Franc-Jozef?

- Pro armenoj. Verŝajne li povas enmiksiĝi dume ne estas tro malfrue.

... dume ne estas tro malfrue. La fabelisto ekridis.

- Vi sciu, ŝafideto mia. Kiam potenculoj de ĉi tiu mondo sidas tre oportune kaj nevolonte movas siajn postaĵojn... aŭ kiam moviĝo de ĉi tiu korpparto kontraŭas difinitajn profitojn, do la postaĵo ĉiam restas en absoluta ripozo, ĝia movo malfruiĝas, kaj la konscienco, situita ie sub la postaĵo, trankviligas potenculojn de ĉi tiu mondo per sekvontaj vortoj: "Pli malfrue!" ... Kaj mi certigas, ŝafideto mia, ĉar "pli malfrue" ĉiam estas tro malfrue, ĉifoje ankaŭ ne estos alimaniere.

Kaj la fabelisto diris:

- Du germanaj oficiroj kaj la aŭstria ĵurnalisto perceptis tion.

- Kion ili perceptis?

- Ke neniigo de armenoj en Turkio, mortpunado de tuta popolo, finfine ne dependis nur de neniigantoj, sed ankaŭ de silento de iliaj alianculoj.

- La Granda masakro, - diris la fabelisto. - Ĉiu en ĉi tiu lando sciis, ke tio estos, sed nur malmultoj povis imagi ian konkreton. Kiajn intencojn havis turkoj rilate armenoj? Ĉu armenoj ĉiuj devis buĉiĝi, kiel oni buĉas ŝafojn? Kaj ĉu tio antaŭ okuloj de civila mondo? Kiu helpos armenojn? Ĉu la kajzero Vilhelm la Dua, kiu timas fari ion mizeron, kolerigantan aliancanajn turkojn? Ĉu aŭ la kajzero Franc-Jozef, kiu estis maljuna kaj havis malfacilojn urinate? Ĉu povas helpi rusoj, aŭ anglandoj, aŭ francanoj? Ĉu ili ne estas tro malproksima de plenumito... aliflanke de fronto? Ĉu aŭ tio nur restos en kriadula ĵurnalaro, por ke poste, miksiĝante kun polvo kaj malpuraĵo de malnovaj ĵurnaloj, malaperiĝi? Sed vi kredu min, ŝafideto mia. Estas la sama, kio ĉirkaŭigos nin, historiistoj ridetaĉos sub siaj nazoj, precipe la kompetentuloj de nuntempa historio, ĉar ili, por ke interrompi enuon bezonas novan materialon prilabori. Malgraŭ manko de imago, ili serĉos nombrojn dislimi kaj taksi amasojn de mortigitoj: ili, tiel dire, rezonos: ili serĉas vortojn, por ke karakterizi kaj skrupule klasigi grandan masakron. Ili ne scias, ke ĉiu homo estas unika, ke eĉ stultulo de via patra vilaĝo estas aparta homo. Ili grandan masakron nomas **buĉado de popoloj** aŭ **buĉado de homaj amasoj**, kaj ceteraj sciencistoj diros: "Tio nomiĝos **genocido**". Unu saĝa fekadanto diros: "Tio nomiĝos **armenocido**". Kaj la plej lasta spertulo-malsaĝulo foliumaĉados vortarojn kaj finfine konfirmos: "Tio nomiĝos **holokaŭsto**".

FINO DE LA UNUA LIBRO.

La Armenia Esperantista Unuiĝo esprimas sian grandan dankon al ĉiuj laborantoj de Erevana Ŝtata Universitato, laborintaj sur tiu ĉi libron kaj speciale al rektoro, korespondanta membro de Scienca Akademio de Respubliko Armenio, profesoro Aram Simonjan, por organizo de traduka, eldona kaj dissenda aferoj.

EDGAR HILZENRAT

LA FABELO DE LA LASTA PENSO

ROMANO

LIBRO UNUA

Desegna dekoracio –	G.V. MARIKJAN
Komputila dekoracisto –	L.B. MELIKJAN
Tekston enkomputilis –	M. TIRACUJAN, H. TIRACUJAN
Korektistino –	H. MKRTĈJAN
Konsilistino –	E. TANTINI (ITALIO)

Eldonkvanto-300. Mendo-31.

Eldonejo EŜU, EREVAN, Al. Manukjan 1.

Subdivido de operacia poligrafio de Erevana Ŝtata Universitato
Armenio, Erevan, Al. Manukjan 1.
www.ysu.am

Նկարչ. ձևավորումը՝	Գ.Վ. ՍԱՐԻԿՅԱՆ
Համակարգչային ձևավորող՝	Լ.Բ. ՄԵԼԻԿՅԱՆ
Տեքստը հավաքել են՝	Մ. ՏԻՐԱՅՈՒՅԱՆ, Հ. ՏԻՐԱՅՈՒՅԱՆ
Սրբագրիչ՝	Հ. ՄԿՐՏՉՅԱՆ
Խորհրդական՝	Է. ՏԱՆՏԻՆԻ (ԻՏԱԼԻԱ)

Տպաքանակ՝ 300: Պատվեր՝ 31:

ԵՊՀ հրատարակչություն, Երևան, Ալ. Մանուկյան 1:

Երևանի պետական համալսարանի
օպերատիվ պոլիգրաֆիայի ստորաբաժանում
Երևան, Ալ. Մանուկյան 1: